

JOAN LLONGUERAS

(1880)

Joan Llongueras, naskiĝinta en Barcelona, estas unu el la multaj katalunaj muzikistoj literaturamantaj. Li estas komponisto kaj poeto. Disciplo de Jaques-Dalcroze, li fondis la katalunan "Institut de Gimnàstica Rítmica", kiu ĉiujare okazigas la "Festa del Ritme i de la Dansa".

Li, kiel direktoro de la "Escola Municipal de Música" kaj de "Escola Choral" de Terrassa, entuziasme laboris por la popola muziko, verkante harmoniaĵojn por multaj katalunaj popolkantoj kaj kolekton de kantoj kaj ludoj por infanoj. Kelkaj el liaj "kanzonoj kun gestoj" (kiujn li verkis same pri la teksto kiel pri la muziko) fariĝis tre popularaj. Li havas poemojn tiel delikatajn kiel la sekvanta "Dankante flordonacon".

Bibliografio: Nativitat (teatraĵo); Lluminoses (poemoj); Cançons i jocs d'infants; La Gimnàstica Rítmica; Del Ritme i de la Dansa; Els cants de la Nativitat; Orientació i organització del moviment musical popular a Catalunya; k. a. Traduko: Cançons amb gestos i rondes infantils, de Jaques-Dalcroze.

DANKANTE FLORDONACON

Kia lum' estis sur vizaĝo via,
ho vi, freŝa knabino hel-okula,
tiun-ĉi posttagmezon, kiam ĝoje
vi donacis al mi brilan bukedon!
Viaj vivaj okuloj nigraj helis
kun la ĝojo belecon disĝuigi,
kaj estis gloraj la paroloj viaj
en la parfum' de la donac' humila.
Ne scias vi, gracia knabineto,
kion vi donas donacante florojn.
Vi sentas ja pri tio ĝojon puran
kvankam ne scias kial vi ridetas,
kaj vi havas, portante florojn, geston,
se vi ĝin vidus, tiel larĝan, vastan!
Tio estas beldoni beldonacon!

JOAN LLONGUERAS

Vi ne rimarkas vian sindonemon,
ĉar vi donas sen vol' pri rekompenco,
vi donas sen fier' de donantino,
pro nura ĝoj' de delikata ago,
pro dezir' rilatiĝi kun la floroj
kaj belaranĝi kaj proponi ilin,
por ke sur ilin la rigardoj venu.
Kaj doni florojn estas graco-stato:
feliĉa kiu ilin scias doni!
Du aĵoj faras bonon al donanto:
la floroj en brilec' kaj l' akvo freŝa.
La brilkoloroj sub vizaĝo via
estas milda ripoz' por la rigardo,
ĉar la floroj posedas sorĉan ĉarmon
kiu igas nin bonaj kaj humilaj.
Dankon al vi, knabino hel-okula,
pri la belec' de la donaca gesto.
Dankon al vi pri gesto tiel larĝa!
Bela estas la don', ne la donajo,
ĉar la floroj forvelkos ja tre baldaŭ,
sed por mi via ago ĉiam helos.

MIQUEL ROGER I CROSA

(1881)

La prozisto Miquel Roger i Crosa naskiĝis en Palamós. Li verkis kelkajn interesajn noveletojn, kun tre alloga stilo. Simile kiel okazas ĉe Joaquim Ruyra, en la verkoj de Roger i Crosa reflektiĝas la bela medio de la "brava marbordo", kun sia ĝoja vivo kaj pentrindaj belecoj. Liaj figuroj estas simpatiaj kaj vantaj. Li certe estas unu el niaj plej bonaj verkistoj pri popolaj kutimoj.

Bibliografio: La ratxada (noveleto); Vida triumfant (noveleto); Viatges d'amor; La pera de plata.

LA TESTAMENTO DE TOMEU

La melankoliaj frapoj de la sonorilbatilo, ritmaj kaj malrapidaj, falis en la silenton de la vilaĝo, kiel forta pluvego en kvietan lagon. Plenmalfermiĝis fenestroj, malfermiĝis pordoj, kaj, tuje, horo de voĉoj kriegantaj kaj akraj murmuris:

—Kiun oni sakramentas?

—Ĉu vi scias kiun oni sakramentas?

—Eble la avinon de Xico Ros...—

—Ne, malsaĝulino, ja ŝi estas tute resaniĝinta! ĝuste hodiaŭ ŝi manĝis teleron da supo.—

—Ja kiom da fojoj piedfrapis la morton ĉi-tiu maljunulino!—

Okaze preterpasis sinjoro kuracisto, rekte tien kie tia babilado resonis, kaj, tiam, kompreneble, la scivolemaj okuloj de la kritikemaj virinoj brilis de kontento.

—Oportune vi alvenis, sinjoro Jozefo. Ĉu estas eble scii, kiun oni sakramentas?—

Sinjoro kuracisto, kiu vojiris priokupata kaj meditema, rapide haltis, rigardis serioze ĉiujn stratoflankojn por kapti per la rigardo tiom kaj tiom da kapetoj elmontriĝantaj el la fenestroj, kaj ŝultrokuntiriĝante, respondis:

—Ja, mi scias nenion.

Se liaj mensokupoj ne estus estintaj tiel profundaj, nek la sciencaj pripensoj tiel regantaj lian spiriton, sinjoro kuracisto, certe, estus aŭdinta la litanion da moko per kiuj insultis lin la babilemaj virinoj.

—Kia malplaĉa kaj malafabla homo!

—Ĉar eble li estas kulpa je tiu mortmalsano... pro tio li ne malfermas la buŝon.

—Kiel ruza estas tiu viglulo! Neniam paroli, jen taŭga maniero ne sin kompromiti.

Ankoraŭ daŭris la ironia litanio, kiam la bigotaj virinoj de la vilaĝo, elirinte el ĉie, sin direktis al la preĝejo, facilmove kaj rapidege.

Tuj kiam ili maltrankvile, nerve estis forlasintaj la hejmo-kupojn, ekresonis en la kvietan aero la malgajaj sonorilbatadoj, kaj multaj el ili, pro sia dezirego profiti la tempon, surmetis sur sin la mantilon, ĉe la strato, dum vojirado.

—He, Mari-Agno.

—Aŭskultu, sinjorino Ronjo, ĉu vi scias kiun oni sakramentas? —ripetis la horo de kritikemulinoj.

—Ha, filineto, mi ja tion ne scias.

La kritikemulinoj estis pravaj. Estis strange ke, en trankvila vilaĝo kiel Auli, sinjoro kuracisto, la bigotulinoj, la kritikemulinoj ne estus sciintaj kiu estas la animo petanta religian helpon. Kaj estis kurioze vidi kiel la bigotaj virinoj, en la preĝejo, dum la akvopreno, dum la surgenuiĝo, demandis unuj la aliajn:

—Ĉu vi scias kiun oni sakramentas?

La religia sekvantaro eliris al strato je la horo kiam la subiranta suno iĝas brila kiel oro kaj purpuro. La brilegaj radioj malheligis la lumecon de la kandeloj. Kortuŝita de la beleco de tiu lumo, la animo ne povis pripensi pri dolora danĝerokazo: pli bone ĝi imagis spektaklon de la Kristkorpo festo, kun himnoj de laŭdado kaj pompoj de gloro, kun muzikoj de kvietaj religieco, kun odoro de stipfloroj kaj flirtflugado de multkoloraj damaskoj.

La religia sekvantaro, flankenlasinte la straton "Major", sin direktis al la maro.

La bigotulinoj rigardis sin mirigite, scivoleme.

Grave kantis la pastro, sed lian plenan voĉon, lian tondran voĉon, de tempo al tempo superregis la akraj notoj de sonorileto.

Jus ekvidinte la maron, la ŝipon ankrumitan en la golfeto, kaj du boatojn albordigintajn ĉe la sablaro, kiel du birdoj en ripozo, ĉiuj virinoj spiris plaĉe kvazaŭ en tiu momento ili liberigis el forta subpremo.

—Ja mi ne sciis, ke en la ŝipo estas malsanuloj.

—Kaj estas la franco, ĉu vere?

Sed alveninte ĉe la bordo de l' akvo, la paroĥestro sin turnis al la amaso de la fideluloj, kaj mallaŭte diris:

—Ni devas iri al la golfeto "Mirajosa" sakramenti la maljunan Tomeu.

La surprizo elŝiris sopiron el ĉiuj koroj. Hezito ekmontriĝis en multaj rigardoj. De Auli al "Mirajosa" oni bezonas tutan unu horon, tra la maro, kaj eĉ tian, forte kaj rapide remante. La maljunulinoj plej kadukaj kaj malfortaj, kiuj, kun bedaŭro, ne povis akompani Nian Sinjoron, murmuris:

—Ni, certe, ne povas tien iri.

Kaj dum ili tion diris, la pastrohelpanto kun la pluvombrelo, la akolitoj kun grandaj lanternoj, kvin aŭ ses viroj kaj la junaj kaj kuragaj virinoj, saltis sur la boatojn, kiuj reflektis brilon de poluraĵoj.

La du boatoj pleniĝis de punktoj lumaj kaj facilmovaj, kiuj duonelvaporiĝis en la radioŝprucado de la brilanta suno, en la granda amaso da blindiga lumo.

La originaleco de tiu sankta procesio superŝutis la animojn de nova ne konata sento, kaj de rava emocio kies plej bela elmonro estis silento. Kia silento! La komerca vivo haltis kiel haltas la batado de koro antaŭ la grandeco de imponanta okazantaĵo. La havenlaboristoj, blasfemaj kaj kriemaj, surprizitaj, mirigitaj, restis senmove, kun la ĉapo inter siaj maldelikataj manoj, kun la kapo klinita.

La maristoj kondukantaj la ŝipojn remis timeme, kun singardo, ĉar ili timis disverŝi ŝprucojn kaj akverojn malgraŭ tio ke ondovado ne vidiĝis en la glata surfaco de la maro.

Kantis la pastro solene kaj lian tondran voĉon de tempo al tempo superregis la akraj notoj de sonorileto.

Ĉe la ekstremo de la haveno, kankaptisto de fiŝoj ne sciis kian sintenon alpreni, kaj liaj okuloj montrantaj malspritecon vagis ĉien, je ĉiuj flankoj, kvazaŭ kaptitaj de fantazia vizio.

La du boatoj, rapidglitantaj kiel paro de cignoj, desegnis sur la olea surfaco, du longajn postsignojn similtajn sulkojn de vojo tre larĝa.

En tiu preciza momento, fendante la orajn akverojn flosantajn en la aero, flugilbatis mevo preskaŭ tuŝante la atlasan pluvombrelon. Ĉiuj virinoj ekkriis, sed la mevo, rapide flugilbatante, malaperis.

La vilaĝo ricevis, en tiu horo, plenan kisdadon de la suno. Ĝiaj vitroj estis blindigaj, ĝiaj domoj elrigardis kiel brila neĝblanko. Altiritaj de tiu brilo, la bigotaj virinoj direktis al ili siajn rigardojn, malgraŭ la vundoj el ili ricevataj. Estas tiel alloge revidi kaj koni, de la maro, de longa distanco, la vicon da domoj de la naskiĝvilaĝo! Ĉe la ekstremo de la linio, en la marbordo, ĉiu el ili vidis ankoraŭ la figurojn de la malfeliĉaj, kadukaj maljunulinaj, senmovaj kiel statuoj.

Ĉe la tagmezo, eliris el la fundo de la maro la sono de sonorilo malrapide balanciĝanta, kiu similis, en tiu soleco, ĝemojn de kortuŝanta plendo.

—Estas la funebra sonorilo, diris la akolito de la sonorileto kun sinteno ektimigita kvazaŭ li ekliberiĝus de fantazia sonĝo.

Kaj de tiam, kvazaŭ la knabeto estus doninta plian solenecon al la sono eliranta el la akvoj, li ĉesis sonorigi.

—Kiel bela estas ĉio-ĉi!

—Mi estas tute emociiĝinta—diris mallaŭte la virinoj inter si.

Kaj admirante ĉiuj la spektaklon kiun prezentis la kvieta

maro, kun ĝia bela franĝo el lumaj punktoj, la mildeco de la aero kaj la flugado de la mevoj, ili ĉesis konsideri la doloran staton de la maljuna Tomeu, de tiu malfeliĉa maristo al kiu la sama maro forrabis lian edzinon kaj lian filon dum tago de furiozo kaj malamo.

Malfeliĉa, maljuna Tomeu! Kiel asketo, li rifuĝis de post sia malfeliĉo, ĉe la Mirajosa, golfeto nealirebla de la vilaĝanoj. Kaj tie li vivis solece, kun sia doloro, same kiel Artamanto pri kiu parolas al ni Sofoklo.

Kelkaj fiŝkaptistoj, kiam ili renkontiĝis kun la procesio, mallevis rapide la velojn, kvazaŭ ili estus mallevintaj flugilojn, kaj religie, malkovrante la kapon, ili surgenuiĝis. La emocio pro la ĉeesto de Nia Sinjoro en ilia kampo de batalo kaj de laboro, en la loko de kie tiom kaj tiom da fojoj, dum terurigaj noktoj, dum klaraj tagoj ili preĝis al Li, envolvis ilin de kortuŝeco.

“Savu nin, ho sinjoro, de la furiozoj de la akvoj, de la perfido de ĉi tiu maro, de la frapegoj de la ventoj!”

Ĉiuj bigotulinaj, senescepte, estis altiritaj, en tiu momento, de la avideco preĝi.

La boatoj, flankon ĉe flanko, interniĝis en la golfeton “Mirajosa”. La maro estis vera spegulo. Ĝi reflektis la nigrecon de la rokaro. La ŝtonegoj montris pendornamaĵojn el beraroj. En kavaĵo ŝajnis ke smeraldo kuŝas.

Post alboridigo de la du boatoj, la sekvantaro malsupreniris silente, fiksante la rigardon sur la kabaneton konstruitan inter la rokoj de la malfeliĉa Tomeu.

La tuta marbordo tapiŝita de ŝtonetoj kaj sablo, grincis kiel metala vibrado. La lumetoj de la kandeloj, fortikiĝinte pro la vesperigo, elrigardis kiel koboldaj flametoj vagantaj tra la marbordo.

En la kabano de la maristo ne sole eniris sinjoro paroĥestro kaj helpantoj: la plej kritikemaj virinoj incitataj de forta scivolemo, ankaŭ eniris en la maldelikatan ĉambron, kies tegmento estis konstruita el pinbranĉoj kaj faskoj de lignaĵoj. La lumo pala kaj mortanta trapenetris tien, heligante makabre la kadavran vizaĝon de la mortanta maljunulo.

La virinoj pene genuiĝis. Incitataj de la stranga aspekto de la maldelikata kabano, ili rigardis ĉion, esploris ĉiujn angulojn, konjektis pri la du portretoj pendantaj apud la lito, ĉe ambaŭ flankoj de pia figuro. Ĉiu el ili komprenis la maldolĉajn rememorojn de multaj objektoj. La malgajo de tiuj restaĵoj kantantaj la detruadon de feliĉa hejmo, aperis nuda kaj kruela antaŭ la rigardo de la virinoj. Kaj granda kompato moligis iliajn korojn.

En la kvieta kaj milda golfeto, adorinda restadejo, komforta nesto oferdonita de la naturo al la homo, resonis “Te Deum”. Kaj tiu himno de laŭdado disvastiĝis sur la maron kaj disverŝis ĉe la marbordan arbaron sian dian parfumon.

La du boatoj, tiam tre bone lumigitaj, glitis sur la trankvilaj kaj dormantaj akvoj. La steloj tremoviĝis. Ĉe okcidento oni vidis ankoraŭ finiĝon de la jus mortinta ondo.

La kanto de la pastro kaj la sono de la sonorileto, en tiu vespera silento, havis imponan severecon.

Sub la impreso de malgaja morto, oni ektimis trairi la mis-
teran abismon kaj la randon de abrupta rokaro eniganta siajn
radikojn en tiun abismon.

La animoj, kortuŝitaj kaj pentintaj, kompatis tiun malfeliĉan
homon kiu mortis en mizero kaj soleco. Sed tiuj el la vilaĝo kiuj
ne ĉeestis tian funebran spektaklon, sciinte la morton de Tomeu,
montris kruelan indiferentecon.

—Mi pensis ja ke li mortis!

—Multajn jarojn da avantaĝo!

—Li estis homo tre stranga!

Sed kiam la sciigo ke Tomeu lasis tutan sian havaĵon al la
mizeruloj de la vilaĝo disvastiĝis rapidege, tiam la vilaĝo, kiel
dismovita lago, kiel avarulo ekvidinte la brilon de l' argento, kiel
militistaro tuj disdonanta inter si la aviditan akiraĵon, entuzias-
miĝinte freneze, honoris tre laŭte la memoron de l' mortinto.

—Li estis bona viro!

—Koro de anĝelo!

—Li suferis multe, malfeliĉulo, en ĉi-tiu mondo, kaj li volis
lasi konsolon al la mizeruloj.

—Ke Dio lin pagu per ĉiela gloro!

—Ni, mizeruloj, eterne benos lian rememoron.

Kaj kiam la loĝantaro eksciis ke sinjoro paroĥestro estas la
disdonanto de la monheredaĵo, ĝi alkuris al la paroĥo, en senfina
procesio, plorema kaj peteganta.

Sinjoro paroĥestro, ekvidinte tian longan vicon, restis terur-
plena, ĉar liaj kalkuloj pligrandigontaj longatempe la monhere-
daĵon por favoro kaj profito de la mizeruloj, rezultis ja eraraj.

Ĉiu estis senhava. Ĉiu rakontis bedaŭrojn kaj mizerojn.
Ĉiu vivis malriĉe.

—Ne povas esti,—al si diris sinjoro paroĥestro,—la vilaĝanoj
multe laboradas, manĝas bone kaj amuziĝas pli bone. Oni ne
trovas virinon por lavi la litotukojn de la hospitalo.

Sed kiel ajn estis, post la senfina litanio de plendoj kaj mal-
feliĉoj, la testamentaĵo de Tomeu forflugis kaj malaperis kun
nekredebla rapideco.

Tamen por honoro de la vilaĝo oni diru—kaj tio estas certa,—
ke la enterigon kaj funebran ceremonion de tiu kiu en la mondo
estis soleca animo, ĉeestis grandega homamaso, tiel ke ĉiuj buŝoj
kun malofa kunmikso de malĝojo kaj ĝojo, murmuris:

—Laŭ mia rememoro, neniam mi vidis demonstracion tiel im-
ponantan.

Trad. ISIDRE TORRENTS

RAMON SURINYACH SENTIES

(1881)

Bibliografio. — Poezio: Coses meves; De la vida. Prozo:
L'amic; L'estrany; Petites proses; Croquis cubans; Proses d'amor
i pietat; Llibre del convalescent; Gent; El tresor dels pobres;
La nora; Verge; Poema de clínica. Teatro: Núvols en creu;
L'únic consol; Cel que s'obre; Contraclaror.

BENO DE LA MANGOTABLO

Vi benu mangotablon, ho Sinjor',
provizitan de ni kun helpo via,
kaj kiel nevidebla kunmangant',
vi restu ĉe la rondo familia;
ĉar tiujn dolĉajn fruktojn ŝuldas ni
al viaj kampoj sub lazur' ĉiela,
kies vasteco igas antaŭ si
nian figuron eta kaj malhela.

Se l' panon igis karn' kaj vinon sang',
Vi igu amo ĉiujn niajn vortojn,
kaj al ni donu ĉiam, ie ajn,
vian gvidon sur voj' kaj viajn fortojn;
ĉar atingi nur estas nia cel',
post ĉia provo kaj klopod' senpova,
nin vidi kunigitajn kiel nun,
en via Pac' eterna, ĉiam nova.

EUGENI D'ORS (XENIUS)

(1882)

Bibliografio: Glossari (1906-1914); La Ben Plantada (1912); La llicó de tedi en el parc (1916); Filosofía de l' home que treballa i que juga; artikoloj en "Quaderns d'Estudi" k. t. p.

Eugeni d'Ors hele brilas inter ĉiuj modernaj katalunaj verkistoj kaj lia personeco havas la plej grandan reliefon. Lia plej konata verko estas la "Glosaro", tiu riĉega aro de ĉiutagaj "Glosoj" pri aktualaĵoj literaturaj, filozofiaj, artaj, sciencaj, politikaj, k. c., kiun li aperigis sur kataluna ĵurnalo kun la pseŭdonimo "Xenius".

Sed, krom fama verkisto, li ankaŭ estas eminenta filozofo, pedagogo, kvazaŭ majstro de skolo kiu kalkulis inter siaj adeptoj la plej valorajn katalunajn intelektulojn. Dum multaj jaroj li montris sian aktivecon okupante la Direkcion de Popola Instruado de la "Mankomuneco de Katalunujo," partoprenante la taskojn de la "Filozofia Seminario" en Barcelona, gvidante la starigon de la "Popolaj Bibliotekoj", inspirante la katalunan revuon pri pedagogio "Quaderns d'Estudi". Li estas ankaŭ talenta paroladisto kaj tre lerta arta kritikisto.

Limigante tiun-ĉi malgrandan studon je la analizo de lia verkista karaktero, ni prefere konsideros la ecojn de liaj "Glosoj". Ilia valoro iĝas aparte mirinda, se oni atentis ke ili aperis preskaŭ seninterrompe ĉiutage dum longa tempo, kaj sekve ili eble estis foje verkataj kun tiu neevitebla urĝeco de la laboroj destinitaj aperi sur ĵurnalo. Tiuj glosoj pritraktis la plej diversajn temojn: interesajn anekdotojn el ĉiuj landoj, artajn ekspoziciojn, librojn ĵus aperintajn, novajn ideologiojn, politikajn movadojn, gazetajn artikolojn, teatraĵojn, koncertojn, naciajn okazaĵojn, unuvorte, ĉion pli-malpli aktualan en ĉiuj kampoj. Ankaŭ, de tempo al tempo, la "Glosoj" ne estis komentario al io efektive aktuala, sed ĉiam ili estis bela disvolvo de iu ajn interesa penso de l' aŭtoro.

La riproĉoj kiujn oni faris al Eugeni d'Ors, pretendas ke li skribas iom konfuze kaj afekte, en majstro, pri temoj ofte tro komplikataj. Se vere ekzistas ia malklareco en la verko de "Xenius", malklareco ĉiuokaze tre relativa, tio dependas ne de verkista mallerteco, sed de tri aferoj: a) rimarkinda aŭtoro origi-

naleco; b) konstanta lingva pureco; c) eksterordinara kaj neulgara tema alteco, precipe por tiu kiu specife estas leganto de ĵurnalo.

La originaleco de la stilo de Eugeni d'Ors estas tiel granda, ke estas sufiĉe legi nur kvar aŭ kvin liajn pecojn por konstati ĝin. Tiu originaleco reflektas grandegan kaj maloftan kulturon, ĝustan konon pri plej kontraŭaj sciencoj kaj artoj, *universalecon* de spirito observema, delikata, subtila. En lia stilo oni trovas specialan ĉarmon, oni vidas trajtojn nekomunajn, oni rimarkas *formojn* ne antaŭe viditajn, tamen unuavide tute klarajn, se nur oni zorge atentis la *diron* de la aŭtoro, la kurbojn de lia penso.

La afektita lingvaĵo, kiun kelkaj trovis ĉe la "Glosoj", fakte ne obeas al la deziro de la verkinto esprimi sin *science* aŭ tro *solene*; ĝi nur estas logika sekvo de la penso kaj inteligento de Eugeni d'Ors, kiu, posedante profundajn lingvistikajn konojn, ne timis alpreni la unua la plej radikalajn procedojn por purigi la katalunan lingvon de fremdaj influoj kaj redoni al ĝi la genion kiun ĝi havis antaŭ la nacia dekadenco. La frutempa kaj kuraĝa uzado de novaj gramatikaj formoj kaj esprimoj, nun plene akceptitaj, kiun abunde faris la "Glosanto", estis tio kio igis lin prezentata de kelkaj kiel *strangulo* amanta esprimojn malsimplajn, malglatajn.

La iufoje malfacila komprenebleco de la "Glosoj" devenas de tio, ke ili estis verkataj en la supozo ke la leganto konas en sufiĉa grado la temon preparolatan aŭ havas almenaŭ la kapablon eklevi sin al la necesa nivelo. Temoj pri filozofio aŭ psikologio ja ne povas aspekti tute traveblaj al la unua paro de okuloj. Sed, eĉ por nelertuloj, multaj "Glosoj" estas pli ol sufiĉe klaraj por vekti intereson kaj ebligi instruiĝon.

Ĉiurilate estas admirinda la "Glosara" verko. Ĝi estas valora ne nur pro la boneco de la stilo, pro la profundeco de la pensoj, pro la intereso de la pritrakitaj demandoj, sed ankaŭ, kaj ĉefe, pro la spirito intima, propra, nekonfuzebla, kiu vivas en ĝi. Per malmultaj vortoj la aŭtoro montras plej trafe sian opinion, sian senton, sian pasion, ne vundante tamen tro profunde la kontraŭajn opiniojn, sentojn, pasiojn. Liaj laŭdoj estas fervoraj kaj liaj kritikoj severaj. Eĉ kiam eble oni ne konsentas al liaj asertoj, oni admiras la *manieron* laŭ kiu liaj konvinkoj montriĝas. Lia penso foje apartenas al iu difinita sistemo, spiras evidentan particecon, sed ĝenerale liaj opinioj estas serenaj, objektivaj, de ĉiuj akcepteblaj.

Vidu kiel delikate li asertas la superecon de Eŭropo aŭ de la Eŭropa kulturo, per la jena mallonga "Glosa" kies vortoj estas plenaj de subtila senco.

DISTANCOJ

Al mia amiko A. B.

Ne estas, estimata amiko Amerika, la sama distanco de Eŭropo al Ameriko kiel de Ameriko al Eŭropo. De Ameriko al Eŭropo estas kelkaj dolaroj. De Eŭropo al Ameriko estas manpleno da frankoj.

Ankoraŭ pli—kaj tio-ĉi estas gravega, sendube.—De Ameriko al Eŭropo iradas kaprico. De Eŭropo al Ameriko iradas kapitalo. Tial de Ameriko al Eŭropo oni kutime venas kun la iluzio de la bona elspezo. De Eŭropo al Ameriko oni kutime iras kun la deziro de la bona profito.

Ankoraŭ pli—kaj tio-ĉi pliigas ankoraŭ la diferencon.—De Eŭropo al Ameriko oni faras ĉiam vojaĝon “iran”. De Ameriko al Eŭropo oni faras ĉiam ian vojaĝon “revenan”.

Ankoraŭ pli—kaj tio-ĉi jam estas decidiga.—Vojaĝo en Amerikon havas ĉiam ion similan al *esplorado*. Vojaĝo en Eŭropon, ion similan al *pilgrimado*. Dum la unua, nia fantazio, estante sur maro, vidigas al ni en la malproksimo iun arbaron. Dum la dua, nia fantazio vidigas al ni Romon kaj la kupolojn de Romo.

...Sed, estas same! Romo troviĝos ĉiam, amiko karega, tie kie estos homo kiel vi.

En alia gloso, li lerte parolas pri tio, ke ne nur la vortoj de diversaj lingvoj diferencigas, sed ankaŭ la maniero laŭ kiu oni uzas saman vorton en malsamaj lingvoj. Tiun fakton, ke unuavide similaj vortoj de du lingvoj ne ĉiam estas plene ekvivalentaj, ni esperantistoj bone konas.

Jen:

NOMOJ, DIFERENCOJ, NUANCOJ

En angla lingvo la vorto “emfazo”, la verbo “emfazi” aŭ “emfazigi” taŭgas por aludi la fakton ke oni vokas la atenton sur unu vorton, sur unu ideon, en aro da vortoj aŭ ideoj. En franca ligvo la sama afero estas nomata “reliefigi” aŭ “meti la akcenton sur...”.—Ni katalunoj diras pli mallonge “substreki”. (En senco iom malsimila al la “substreki” franca, kiu havas nuancon tute alian).

Ni observu, do, kiamaniere la esprimilo alilokiĝas malsuprenirante de unu al alia lando, pasante de unu lingvo al alia. La esprimobildo estas *optika* ĉe ni; *palpa* aŭ *akustika* en la lando franca; kaj jam *senta* kaj preskaŭ *morala* ĉe la angloj. La espri-

mobildo evoluadas de tiuj pensantaj per la okuloj ĝis tiuj kiuj pensas per la koro... (Pensi per la koro, kio ĝuste ne signifas pensi “sindone”, sed pensi per tiuj “rezonoj ne komprenataj de la racio”).

La moralo de tiu-ĉi malgranda studo pri vortoj, diferencoj kaj nuancoj, kuŝas en tio: humile konfesi kiom estas malfacile ke anglo plene komprenu nin, kaj kiom malfacile estas ke ni tute komprenu anglon.

Pasian laŭdon al la franca lingvo, kies *preteco* donas faritaj al la francaj verkantoj la plej riĉajn esprimojn, enhavas la gloso “Verki artikolojn”. Ĝi esence estas fiera konstato pri la “klareco latina”, kiun oni sentas ankaŭ en la spirito de nia kara Esperanta lingvo. Tiu-ĉi gloso ne estas flataĵo, sed sincera esprimo de la penso de ĝia aŭtoro.

VERKI ARTIKOLOJN

Franca artikolo de Revuo estas estetika produkto perfekta kaj definitiva, kiel estas tiaj greka templo aŭ plado de argentisto el Firenze. Mi hieraŭ pensis pri tio, legante kaj relegante ĉi-tiun artikolon de Maurice Blondel, jam dufoje aluditan en mia Glosaro. Pri tio mi povus esti pensinta antaŭ cent aliaj artikoloj aperintaj la saman tagon sur cent aliaj ĵurnaloj.

La mirindaĵo de bona franca artikolo estas ĉiam ĝia *senerara* konstruo; kaj, en la konstruo, la profunda senco de kontinueco kiu kaŭzas, ke ĉiu parto inter du partoj, ĉiu paragrafo inter du paragrafoj, ŝajnas milde postulataj de la antaŭaj, kaj samtempe delikate influataj de la sekvantaj. Unika fluo de trankvila movo, samtempe majesta kaj viva, pasas de unu al alia paragrafo, de unu al alia parto, kaj kunligas ĉion en admirinda ekonomio. La intelekta spektaklo havas valoron unikan por tiu kiu scias rigardi. Oni sentas plezure ravitaj siajn sentkapablon kaj racion; el la racio, tiun parton kiu jam estas sentema; el la sentkapablo, tiujn elementojn kiuj jam estas raciema.

Verkistoj germanaj aŭ anglaj neniam povos konkuri, en ĉi-tiu ĉapitro de literatura arto: neniam ili scios kun tia perfekteco konstrui artikolon. Unuj kaj aliaj kutimas kunigi tiujn partojn aŭ paragrafojn, pri kiuj ni parolis, per nura *akumulado*, kio estas la ago plej kontraŭa al la *kunmetado* kiu povas ekzisti. La angloj, pro senorda kontinueco. La germanoj pro samtempa disvolvado de pluraj elementoj aŭ *temoj*, kiuj kunpuŝiĝas, ofte tre malgracie.

Tiel, la artikoloj kiujn ni kutimas legi sur revuoj anglaj aŭ germanaj, vekas deziron refari ilin. Tiuj de la francaj revuoj,

ne nur invitas ne tuŝi ilin, sed eĉ senkuraĝigas iomete verki mem artikolojn.

Alispeca laŭdo estas la sekvanta glosa, per kiu "Xenius" elegante komentariis la aktualajon de la tago: la aperon de unua volumo de nova katalunlingva "Biblioteko". Simila laŭdo al la *volo pri scio* estas oftege farita de Eugeni d'Ors. En tiu-ĉi glosa ankaŭ estas kuraĝigata la kreskanta pliedukiĝo de la kataluna laboristaro.

"DES GENS BIEN"

Masonisto laboradis ĉe la rekonstruaj laboroj de la supra parto de la Instituto. Je la sesa kutime li finis la laboron. Tiam li volis destini unu horon al legado en la publika legoĉambro de la Biblioteko. Sed li ne malsupreniris tien tuj post finiĝo de l' laboro. Kun ŝatinda ĝentileco, kun instinkto de admirinda aristokrateco, nia homo unue iradis hejmen, li lavis sin, ŝangis sian vestaĵon kaj reiris tiel al la dezirata legado, en pura vesto kaj deĉe.

Ni ĝoju la dignon kaj la elegantecon de tiu bona laboristo de Katalunujo. Kaj, egale kiel ni ĝojas la ecojn de tiu laboristo, pro tio ke li radiis puran vizaĝon, ni ĝoju ankaŭ tiujn de alia laboristo, amiko mia, pro tio ke li hieraŭ montris vizaĝon ne tiom puran. — Hieraŭ estis jaŭdo, kaj mia amiko laboristo estis forgesinta pasi ĉe la razisto. Sed li portis en la mano, kaj tute senpacience foliumadis, la malgrandan verkon pri "Oceanografio" el la kolekto "Minerva"... Kaj unu volumo el la kolekto "Minerva" kostas tridek kvin centimojn... Ĉu vi komprenas?

Pro la fakto ne esti pasinta ĉe la razisto la jaŭdon, neniu ploras la dimanĉon. Pro tio ke oni ne iras tien hodiaŭ, neniu plendos dum la horo de l' morto. Male, povas esti bone ĉe la morthoro trovi sin iomete informita pri Oceanografio. — Sokrato, en mallibereco kaj atendante la cikuton, provadis flutan melodion. — Ho, Sokrato! — ekkriis disciplo lia; — por kio utilos nun lerni tiun flutan melodion? — Tio utilos al mi — respondis Sokrato — por ke mi havu ĝin lernita kiam mi mortos.

Kaj ni vidu alian, lastan specimemon de la ĉarma prozo de Eugeni d'Ors.

Ĝi estas tiu titolita:

PRI ESPERANTO

La esperantistoj sin movis multe en Barcelono dum la lasta tempo. Ili estas simpatia kaj utila aro, la esperantistoj; kiam ili moviĝas, laboras. Se pri ĉiuj oni povus diri tion, estus tre bone.

Mi devas konfesi, ke, kelkan tempon, Esperanto estis al mi malplaĉa. — Ne pro malsato, principe, al la ideo pri lingvo konvencia kaj universala. Guste tiu-ĉi ideo kunligiĝas plene kun kelkaj el la plej karaj por mi. — Sed, konkrete, kontraŭ la sistemo elpensita de Doktoro Zamenhof, mi havis iajn antaŭjuĝojn, eble devenantajn precipe de iaj optikaj impresoj... — Aliflanke, min suspektigis kontraŭ ĝi la ofte farataj laŭdoj al ĝia simpleco. Mi ĉiam havis la konvinkon, ke bona universala lingvo ne devas troviĝi en la neĉeso esti simpla: ĉar sufiĉe utila rezultus ĝia kono, kaj sufiĉe ĝi ŝparus aliajn laborojn, por ke valoru la penon venki kelkajn malfacilaĵojn plie en la lernado, kun bono por la plej granda perfekteco en la rezultato.

Sed ĉian antaŭjuĝon, ĉian skrupulon restantan en mi forigis jam Esperanto... — Kiel? Per ĝia efektiva triumfo super la gentoj. Ĝi konvinkis min per la unika maniero laŭ kiu io kiel ĝi povas konvinki: *venkante*... — En tio-ĉi ja la plej bona moralo estas tiu de la sukceso... — Jen lingva sistemo kiu prezentigas kun pretendoj fariĝi universala helplingvo... — Tre bone. Nu: kiu estas ĝia rajto?... — La plej forta, la definitiva: esti en la antaŭtago de sia plena universaligo!

Esperanto, ŝajnas al mi, prezentigas jam en tiu situacio. Ĝia triumfo rilate al kvanto, en malmultaj jaroj, estas ja admirinda. La esperantistoj (atentitaj la decaj proporcioj) povus hodiaŭ diri, kiel iam la kristanaj kredantoj: "Ni estas de hieraŭ kaj jam ni plenigas ĉion: la domojn, la placojn, la tendarojn..." Bona estas, do, Esperanto; kiel estas bonaj fizikaj principoj, laŭ Poincaré, la fizikaj principoj "kiuj montriĝas bonaj, kiuj havas sukceson..."

Klopodi ke Esperanto "bone sukcesu" jam estas, eble, ĝenerala homa devo. Se malgraŭ tio jam atingita hodiaŭ per la peno de la unuaj fervoruloj, ĝi morgaŭ malsukcesus, *ĉiuj, kiuj pro manko de fido aŭ pro manko de agoj estus malhelpintaj ĝian triumfon, tiuj devus senti la pezon de granda respondeco, granda konsciencproĉo*.

Tiu favora sinteno antaŭ nia movado igas por ni ankoraŭ pli simpatia la figuron de "Xenius". Homo kiel li, ne povus alimaniere paroli pri Esperanto.

Mi kredas, ke la kelkaj Glosoj prezentitaj pravas la talenton de Eugeni d'Ors kiel *verkisto*, sola aspekto en kiu mi volis prezenti lin. Vi vidis, ke li, eĉ tra miaj tradukoj, estas plene klara kaj

komprenebla. Multon ankoraŭ oni povus diri pri li kiel aŭtoro de artikoloj filozofiaj aŭ pedagogiaj. Sed mi ne plu volas ĝeni vian afablan atenton. Mi restos tre kontenta, se mi sukcesis instigi iun el vi al pli profunda konatiĝo kun la verko de nia fama "Xenius".

(Prelego farita en la Grupo "Barcelona Stelo")

LA AMO AL LA METIO

Tiu amiko, mia filo, kiu venis iun matenon viziti nin — ĉu vi scias? tiu en brikkolora jako, — ne estas homo sufiĉe bonkonduta. Delikata, honesta, laborema, bona patro kaj familiamanta, pri tio malmultaj superas lin. Sed tiu viro estas karikaturisto ĉe ilustrita ĵurnalo. Tio havigas al li vivrimedon, tio okupas liajn laborhorojn. Tamen li ĉiam parolas kum abomeno pri sia metio, kaj tiel ekkrias: "Se mi povus fari pentrarton! Mi devas desegni tiujn sensencaĵojn por vivi. Ne rigardu miajn desegnaĵojn! Ili estas komerco, amikoj, nur komerco..." Tio signifas ke li plenumis sian laboron nur por la gajno; kaj ke li lasis sian spiriton forkuri de la laboro, anstataŭ porti ĝis la laboro sian spiriton. Ĉar li konsideras sian laboron tute sennobla. — Sed via patro certigas al vi, filo, ke se la laboro de la amiko restas sennobla, se liaj desegnaĵoj povas esti juĝataj sensencaĵoj, tio estas ĝuste ĉar li ne alportis al ili sian spiriton. Kiam la spirito ĉeestas, ne estas iu laboro kiu ne iĝas nobla kaj sankta. Tielaj estas same la laboro de l' karikaturisto, kiel tiu de l' ladisto kaj tiu de la stratpurigisto, kaj tiu de la skribanto de banderoloj por dissendi ĵurnalon al la abonantoj. Estas *maniero* desegni karikaturojn, ellabori la ladon, balai la placojn kaj skribi adresojn, kiu klare montras ke en la ago oni oferis amon, zorgon pri perfekteco kaj harmonio, kaj malgrandan fajron de persona fajro, tio kion la artistoj nomas *stilo*, kies florado ĉe neniuj verko nek verketo homa estas neebla. Tiu-ĉi *maniero* de laborado estas la bona. La alia, tiu kiu malŝatas la metion, konsiderante ĝin sennobla, anstataŭ altigi kaj sekrete aligi ĝin, estas malbona kaj memorala. La amiko en brikkolora jako estas do memorala homo, ĉar li ne amas sian metion.

Mia fileto, vi ankoraŭ ne havas tri jarojn, sed mi parolas al vi tiel, kvankam vi ne povas kompreni min, ĉar mi alparolas en vi ĉiujn viajn fratetojn, la infanojn de Katalunujo. Plie, neniam estas tempo perdita tiu kiun oni uzas aŭskultante, kun humileco, aferojn ankoraŭ nekomprenatajn... Tiu-ĉi aferoj laboras nian internon, kaj tago venas kiam oni trovas ilian profiton... Estu, do, kvieta; lasu viajn manetojn ripozi en la miaj; rigardu per surprizitaj okuloj kiel el mia buŝo eliras la parolo, kun ludo de lipoj kaj dentoj... La vorton "spirito" mi multe diras al vi; kaj dirante ĝin al vi mi ĝin diras al ĉiuj katalunaj infanoj. Ili eble demandas min, kio

ĝi estas; mi respondos, ke ili ne povas scii ĝin certe kaj ke ni ne scias ĝin ankaŭ, sed estas necese ke ni parolu pri la spirito senĉese, ĉar, se ni ne komprenas ĝin, ni atingos, kompanse, kompreni nin unuj la aliajn, kaj ĉiuj kune igi nin pli bonaj.

Nu, mi diras al vi, filo, ke la amiko laboranta kiel karikaturisto ne estas morala homo, ĉar li ne estigas spiriton en sia laboro. Ankaŭ ne estas sufiĉe deca la konduto de tiu alia sinjoro, la okulvitruo, kiu scias rakonti al vi tiel belajn rakontojn kaj kiu venas tetrinki kelkajn dimanĉojn posttagmeze. Tiu ĉi verkas por ĵurnalo, estas ĵurnalista. Kaj li ankaŭ parolas pri sia metio kvazaŭ li estus en galerioj: "Neeble estas fari literaturon!... Ha, la literaturon!... Mi, kompatindulo, devis forlasi la literaturon!" Jes, kompatinda, sed ne pro tio kion li supozas. Kompatinda, ĉar li ne scias kunigi sian amon al la literaturo kun la laboro de li farata. Li plendas pro tio ke li devas redakti tiujn mallongajn notojn pri la banalaj okazaĵoj, nomatajn "raportetoj". Sed kiu malhelpas lin redakti bele la raportetojn? Beleco ne signifas ornamon, sed harmonion kaj delikatan adaptigon de la afero al sia uzo. Raporteto povas esti tre bela, same kiel lada laboraĵo, gazeta banderolo kaj forkolekto de balaĵoj, se oni plenumis tion kun zorgo kaj ĝojo pri la rezultato. Se tiu-ĉi amiko redaktus la raportetojn kun ĝojo kaj zorgo pri perfektego, li aliĝus sian laboron iom post iom kaj li ĝin igus tre alta... Via patro, filo, fieriĝas esti farinta tiel pri humila laboro al li konfidita. Por komenci labori en verkado sur la ĵurnaloj, estis konfidata al li fako, kiu ĝis tiam estis konsiderita tute negrava. Ĝi celis nur amuzi la leganton de la ĵurnalo, distrante lin el la seriozaj aferoj, per la priskribo — sub la rubriko "Amuza fako", "De tie-ĉi kaj tie", "Scivolemo" aŭ aliaj samspecaj — de la groteskaj strangaĵoj aktualaj, de la faro de stultulo kiu marŝis per la manoj, de la komikaj ekscediĝoj aŭ la sensencaj vetludoj en Usono. Via patro akceptis tiun modestan taskon kun ĝojo. Li klopodis baldaŭ alporti al la metio spiriton kaj amon. Li ne konsideris ĝin sennobla, sed plialtigebla, se nur volo kaj pacienco kuncelus al tio. Li ne hontis pri ĝi, sed male per ĝi li aspiris laŭdigi sin... Spirito kaj amo plenumis baldaŭ la deziratan miraklon. Sekrete, per neperceptebla ŝanĝo, la speco de l' laboro aliĝis. Hodiaŭ ĝi jam estas nerekoncible, kiel la sama. Kiu ne memoras ĝian senbrilan originon, tiuj opinias ĝin nova fako. Hodiaŭ, fileto, la laboro de via patro ĉe la ĵurnaloj estas konsiderata de unuj bona, de aliaj malbona, sed de ĉiuj kiel verko de Filozofio, kiu estas la plej alta kaj malfacila el la intelektaj aktivecoj... Sed mi diras al vi ke ĉia metio iĝas Filozofio, iĝas Arto, Poezio, Elpenso, kiam la laboristo al ĝi donas sian vivon, ne permesante ke tiu ĉi dispartigu en du ĉuonojn, unu por la idealo, alia por la ĉiutagaj bezonoj, sed farante el la ĉiutaga bezono kaj el la idealo unu saman aferon, afero kiu samtempe estu devo kaj libero, rutino rigora kaj inspiro renovigata.

Juvelo, fileto, ĝojo de via patro! Via patro havis kiel Patronon, en multaj momentoj de sia ekzisto, grandan homon, kiu devus esti tia al ĉiuj metiaj laboristoj, kaj kiun konas la historio per la nomo Bernard Palissy. Ian tagon mi donos al vi legi lian vivon, kiu estas rakontita de la franca verkisto Alphonse de Lamartine, kaj kiu estas verketo kiun mi donus legi al ĉiuj katalunaj infanoj. En ĝi vi vidis kiamaniere tiu metiisto alvenis ĝis la grandeco, kaj estis kio plej alta oni povas esti en la mondo; bonega artisto, lerta elpensinto, majstro en scienco, fama verkisto, homo societama, de societo kortega kaj tre alta, kaj homo religia, modelo kaj spegulo de konsciencoj, sen iama forlaso esti metiisto, kontraŭe kun ĉiam metiista sento, ĉar li faris belajn elpensojn kaj elpelis al admirinda perfekteco sian metion. Li ne ŝanĝis ĝin, escepte nur por transiri de metiisto de koloraj vitroj, kia estis komence, al metiisto de argilaj potoj, kiel li restis poste dum la tuta vivo. Sed, potfaristo, li altigis sin el laboraĵoj de fajenco al tiuj de porcelano; li retrovis la sekreton de l' majolikoj, pli delikataj kaj belaj, sekreto kiun estis posedintaj la ĉinoj kaj kiu poste estis perdata. Li laboradis super forno por baki siajn argilaĵojn kaj tie, ĉiam serĉante, ĉiam esplorante, li eltrovis la plej bonajn trovaĵojn. Ĉar li ne havis alian deziregon ol siaj elpensadoj, liaj najbaroj eĉ fine kredis lin komplete freneziga. Iun tagon, farante unu el siaj bakadoj, li bruligis la tegmenton de la domo. Li kaj liaj familianoj travivis longajn jarojn da misero. Li fine triumfis: fabrikis la plej belajn pastojn kiujn iam vidis homaj okuloj en Okcidento. Tiam estis kiam, elpensisto, li ankoraŭ iĝis artisto. Li donis vivon per siaj elpensitaj materialoj al mil perfektaj artaĵoj. Li dekoraciis ilin per la figuroj de diversaj animaloj, de helikoj, de lacertoj, de koloraj fiŝoj, kiuj montris admirindajn rebriĵojn. Por plenumi tiun-ĉi laboron, jen por kio la artisto volis ankoraŭ fariĝi sciencisto, studante kun profito la naturon kaj la sciencojn de la naturo. Kaj poste li estis plue verkisto, ĉar li redaktis en plaĉa maniero la regulojn de sia arto, kaj projekton por beligo de ĝardenoj, kaj la rememorojn pri sia vivo. Kaj, en siaj lastaj jaroj, li enprofundiĝis en la Bibliion, kaj ĉar estis epoko de religiaj malpacoj en Francujo, Bernard Palissy estis persekutata pro sia religia kredo, kaj oni enfermis lin en kastelo, kaj tiel pro sia kredo li estis malliberigata. Ĉar antaŭe li estis estinta dum kelka tempo kortegano kaj la reĝo estimis lin treege, oni rakontas ke tiu-ĉi iris lin vidi en lia malliberejo, por proponi al li la liberecon ŝange de malkonfeso, eĉ nur ŝajna, pri sia religio. La respondo de Palissy estis inda je lia perfekta konscienco de metiisto. Li rifuzis fieri. Ĉar li estis laborinta sian konsciencon kiel iun el siaj artoverkoj. Kaj ne estis pro la gajno kial li faris tiujn, sed nur pro amo al sia metio kaj al la rezultatoj de sia metio... Filo, ekzistas modernaj barbaroj, kiuj elpensis por armilo de siaj bataloj, intence difekti, aŭ fari nekompleta aŭ volonte malsupera la verkon kiun ili fabrikas per siaj pro-

praj manoj. Tion ili nomas *sabotado*, kion katalune ni nomus *galoŝado*, ĉar ĝi venas de homoj kiuj detruis per batoj de galoŝo la verkojn plej delikatajn kiujn la laboristoj estis farintaj. Tiuj homoj estis malbonuloj kaj la sabotado granda blasfemo; ĉar la homoj neniam rajtas sur la verkon de li faratan. Ĉar la verko estas supera al la homo; kaj la devo de la homo laboranta estas oferi sin al sia verko, kaj neniam oferi ĝin por aliaj celoj. La ekzemplo de Bernard Palissy donu al ni ĉiuj la esencan lecionon alporti amon kaj spiriton al la propra metio, kaj tiel havigi al ĝi la plej altan indon. Kaj al vi, filo mia, ĉar vi estas aŭskultinta min tute kviete, ĉar vi lasis ripozi en la miaj viajn manojn, kaj ĉar vi rigardis kun iom da miro, ne troe, eliri la vortojn el mia buŝo, hodiaŭ, tago de Sankta Luĉio, mi aĉetos al vi en la foiro kelkajn figuretojn. Inter ili estos anasinoj kaj porko, lignohakisto kun "barretina" kaj maljunulino sidante ŝpinanta. Ne rezultos la verkoj tiel perfektaj kiel tiuj de Bernard Palissy; sed eble ilia nekonata aŭtoro estos fervorulo enamiĝinta en la propran laboron, kaj, tial, homo pli belkondata ol nia amiko, la ĵurnalisto okulvitruo, kaj ol nia amiko, la karikaturo en brikkolora ĵako.

KIO ESTAS FILOZOFIO?

Jen. Ni imagu filozofon.

Ĉu homo sidanta sur oportuna seĝo aŭ — estas same — sur roko? Ĉu homo kun la okuloj fermitaj, la vasta frunto sur la manplato? Ĉu "Le Penseur" de Rodin kun la mentono en la pugno kaj la muskoloj en streĉo?... Jes, sed, ĉu "Le Penseur" havus tiajn muskolojn, se li estus restinta ĉiam sidanta? Ĉu tiam li ne estus pli kvazaŭ Budho kun sep faldoj sur la ventro kaj sep faldoj sur la submentono?

Alia imagaĵo: Fakiro meditanta. De antaŭ du monatoj li restas senmova. Liaj manplatoj turnitaj al Oriento. Oni povas piki liajn brakojn: li nenion sentos. La homoj, kiuj preterpasas apud li, diras, ke li estas sanktulo; la diskretuloj asertas ke pro la filozofado li estas eniĝinta en la internon de la Granda Tuto.

Sed mi alvenas kaj krias per la tuta voĉo envolvita en rido:

— Trompantoj, hipokrituloj!... Ĉu vi kredas, ke vi pensas "Penseur"? Ĉu vi lasas min diri, ke vi meditas, fakiro? Mensogo, mensogo! al vi mi krias. Eksidinte, "Penseur", vi ja komencis pensi. Ekgenufleksinte, fakiro, vi certe komencis mediti. Sed, nun, post du horoj, post du monatoj! Ni ja iom scias la psikologion, kunuloj! Ni scias, homo sidanta, ke via menso nepre devas troviĝi malplena post duhora kvietado. Ni scias, ke via ripozo nur estas la dormo, homo genustaranta. Kaj ĉu ni permesos, ke por pravigi vian refalon en la animalecon vi uzurpu la altan nomon de la filozo-

fio?... Finiĝu la mensogo! Ĉesu la trompo! Filozofio estas penso. Penso signifas movon. Do filozofio estas movo. Nu! Nu! Al vi mi venas diri la filozofion de la homo en aktiveco. De la Homo, kiu Laboras kaj kiu Ludas.

* * *

Nun preterpasas apud ni kamparano post sia plugilo, sin dominte al la laboro kaj kalkulo pri sia gajno; kaj dancisto kvazaŭ ebria pro la turniĝoj de la danco.

— Kamparano, vi vivas kontante kaj pensas pri la jaro kaj la sezonoj; aŭ — same valoras — pri via mallonga vivo kaj pri tio, kion vi postlasos por viaj gefiloj, post via mallonga vivo. Dancisto, vi ne plu vidas la mondon, kaj vi nur vivas en la momento.

“...Sed, ĉu mi diris la veron? Ĉu eble mi vin kalumnias?”

“Ĉu vi povus labori, kamparano, se ĉiun matenon, ekforlasinte la postdorman malspriton, vi ne armus vin instinkte per kelkaj imagoj kvankam konfuzaj pri aferoj eternaj? Kio estas laboro? Ĉu ĝi ne signifas povon, kiu venkas malcedon? La povon ĉu vi ne sentas el vi, ĉu ĝi ne estas vi mem? La malcedon ĉu vi ne sentas el la mondo, ĉu ĝi ne estas la mondo mem? Ĉu ne vere, ke malklara kono en via spirito prezentas al vi tiun batalon, kiel eternan? Ĉu ne vere, ke en la fundo de la fundo vi reduktas al tio la konojn pri la Bono kaj pri la Malbono? Sed tio estas tuta metafiziko. Metafiziko, kiu armas vian brakon kaj ne lasas ĝin cedi. “Kaj, se la agrikulturo — diris nia Majstro Bernard Palissy — estas kondukata sen filozofio, estas same kiel detruai, leĝrompi la teron ĉiutage, kaj estus mirige, se la tero kaj ĝiaj produktaĵoj ne restus venĝemaj...” (Vera recepto).

“Nun venu al mi, tiu de la danco. Ekvidinte vin ludi mi diris, ke vi vivas nur en la momento. Ankaŭ mi eraris. Via danco estas ludo. Ĉiu vera ludo estas iel danceca. Mi volas diri — ĉar danco estas ritmo, — ke ĉia vera ludo estas iel ritma. Kaj ritmo signifas: “ke momento pasinta postulas obeon de la nuna momento kaj de ĉiuj es-tontaj momentoj”. Ritmo estas traduko de leĝo. Tiel, de io eterna... Dancu, dancisto, dancu! Viaj turniĝoj enskribiĝas en la eternecon. Kaj en la eterneco vi dancas, dancisto. Kaj sen malklara kono pri eterno vi ne dancus”.

En ĉia laboro, kaj en ĉia ludo, estas eterneco kaŝita. Filozofi estas ĝermigi kaj florigi tiun eternecon, kiu estas en la laboroj kaj en la ludoj. Tio, sen ĉeso de laboro aŭ de ludo. Sed haltigante la laboron kaj la ludon en ĉiu momento.

Jen simpla kaj vulgara komparo: la filozofio estas al la realo, kio la kinematografia filmo estas al la movo, kiun ĝi projekcias.

Kiel klara elestas post tio la difino, kiun mi publikigis antaŭ du jaroj en la “Almanacco de Coenotium” (Lugano, 1910).

Per ĝi mi protestis kontraŭ la dirata aforismo: “unue vivi, poste filozofi”.

Kaj mi diris:

“Primum vivere, deinde philosophari...”

Nego. In hoc nescio primum, nescio deinde.

Philosophari enim vivere est.

Philosophus Publius vocetur quia in conscientia *vivit* oeternitatis momenti”, k. t. p.

Kio, vulgare dirita, estas:

“Unue vivi, poste filozofi?”

Mi ĝin neas.

En tio mi konas nek “unue” nek “poste”.

Ankaŭ filozofi estas vivi.

Publius estas nomata filozofo, ĉar li vivas en konscio pri la eterneco de la momento.”

Jen, ŝerco kaj lude, difino pri la filozofio. Filozofio estas: serio de ripozoj rompantaj movon. Sed ĝi estas nek ripozo sen movo, nek movo sen ripozo.

Ĝi estas la enskribo de la eterneco en la vivon.

Trad. DELFi DALMAU

LA BELTALIA (fragmento)

Epizodo de Magdalena, amikino de Teresa, la Beltalia

Nun venas la festo de la Virgulino de Aŭgusto, kaj tiam la tuta tero estas matura. Magdaleno, pretigu vian korpon por dancadi, ĉar la tempoj estas ankaŭ maturaj, kaj de la branĉo de la estonto, falos rekte mezen de la rondo de via danco, tiu orita frukto plena de parfumoj, kiun vi nomas fianĉo.

Fianĉo estas la plena heleco de la ĉieloj fariĝinta rigardo, kaj la plena senco de la mondo fariĝinta lipharo. Fianĉo estas io forta kiel la vino, kaj dolĉa kiel la sukera kuko, kiun oni vendas en la butikoj. Fianĉo venas, rigardas, diras malgrandan vorton nur, kaj jam la tuta via eta vivo fariĝas dependa kaj tremanta, kiel araneaĵo en arbaro subtenata nur per unu branĉo, kaj pri kiu ni ne scias ĉu restos tie ankoraŭ post minuto. Fianĉo estas iu, kiu dancas, sed ne multe. Li venis tute sola, per veturilo, kun valizo el felo kaj nikelo kie estas gravuritaj liaj komencaj nomliteroj. Li estas amiko de junuloj, kiujn vi ja certe konas. Kaj unue ŝajnas ke li iras kun ili ĉien, ŝerci kaj moki pri tio kaj alia. Vi, knabinoj, lin ekvidis pasantan, kaj oni ne scias kiu rakontis al la aliaj la mirindan historion. Li estas nomata *Pons i Serra*¹; li estas nomata *Ignasi de Fuster*, li estas nomata *Soŭé i Soŭá*, aŭ li estas nomata simple *Ludoviko*. La literoj de tiuj nomoj ŝajnas skribitaj per diamantoj rozaj, sur juvelo el koro-

1. Vulgaraj nomoj.

ta plateno, aŭ desegnitaj ĉe la nokto per raketoj, steloj kaj helaj artfajraĵoj. Mankas al li unu jaro por fini la karieron. Kiam mankas unu jaro por fini la karieron, la vivo larĝigas antaŭ la okuloj kvazaŭ dioramo en vasta amfiteatro. Suno el oro brilas sur la frunto de junulo, al kiu mankas unu jaro por esti el la Fakultato, kiu tinkturas al li el ruĝkoloro eĉ la subon de l' oreloj. Lia sango kuras triumfanta, sed kun perfekta reguleco. Li povas eniri, rigardi ĉirkaŭen, eksidi kaj suprenigi antaŭ la eksido la du kanalojn de sia pantalono. Li surportas sur la blanka ŝuo ŝtrumpetojn violkolorajn, kun nigraj floroj, kaj rigardi ilin estas io netrankviliganta, kiel peko. Ankaŭ li surportas ĉe la butontruo floron, eble donacitan de virino. Li eltiras ĵurnalon el sia poŝo, bruligas cigaredon, kaj tiel povus pasigi horojn kaj horojn, fumante kaj legante, sed, jen, subite lia destino lin puŝas. Li stariĝas, akompanata de siaj amikoj, kaj ekiras al vi, fraŭlino. Li haltas, povus residiĝi, povus preni alian vojon. Sed ne; iras antaŭen, antaŭen, antaŭeniras al vi, antaŭeniras ĝis vi. Kaj nun liaj amikoj diras al vi lian nomon kaj nun estas neokupita seĝo apud vi. Jen li sidiĝas, kaj vi demandas lin, tuta tremante, ĉu estas tiu-ĉi la unua fojo, ke li estis tie-ĉi.

Brilu astroj de l' ĉielo, brilu helegaj lampoj de l' dancoj: skuigu ventumiloj, kvazaŭ la aplaŭdoj de amaso: odoru pli forte, bukedoj pretigitaj sur la tablo por la *Danco de Floroj!* La junulo sidadas apud vi, kaj li ne foriras, ĉiam parolanta. Vi ne bone scias, kiamaniere via ventumilo estas nun en lia mano, li ventumas sin kaj vi sentas kiel de li al vi alvenas viaodoro. Kaj vi ekdivenas ke same kiel li fariĝis mastro de viaodoro, li fariĝis mastro de via tuta vivo. Kiam li estas dancinta kun vi, neniu alia invitas vin al danco, alproksimiĝas. Nun vi fermas la okulojn kaj pensas, ke staras kontraŭ vi ĉiuj viroj kaj virinoj, kaj ke vi riskas danĝeron kaj estas li via defendanto; via patro kaj patrino ĵus mortis kaj vi ne havas timon, ĉar li estas kun vi. Fianĉo altiras ĉiun forton kaj disponas je ĉiu forto. Fianĉo estas la propra espero parolanta apud la orelo kaj li havas du brakojn ekster vi. Li estas la ĝojo de la sango, kaj la sorĉisto havanta la ŝlosilon de ĉiu printempo kaj somero venontaj. La fianĉoj al kiuj mankas unu jaro por fini la karieron, povas edziĝi post du jaroj. Dume ili donas ĉiutage novan certajon kiel plian kusenon. Kaj oni estas feliĉa, oni estas fiera, oni estas distrita kaj revema, kaj oni pensas pri la bela ĉemizo, kiun oni devas ornami, kaj pri la gajeco de la etaĝoj nove meblitaj, kie la spegulo-ŝrankoj povas surprizi ankoraŭ meze de l' mallumo, ĉe eniro en ĉambron nekonitan ankoraŭ, sed kiu ricevis jam la plej grandan sekreton de la vivo.

Nun estas la Virgulino de Aŭgusto, kiam la tuta tero estas matura. La Virgulino de Aŭgusto estas kiel bela arbo, kaj al la knabino dancanta ĉe ŝia piedo, ĝi lasas fali belan fianĉon meze de la rondo de ŝia danco.

Trad. JACINT BREMON, L. K.

GIRONA

Girona, Girona nemortema! Nun estas nokte kaj viaj ruinaĵoj timigas. Malantaŭ la Katedralo estas sabato de sorĉistoj, aliformitaj en arkitekturajn strukturojn. Estas nigra abismo apud la nuda rando de altega muro. La akutaj steloj vivas tre supre kaj la strigoj tre malsupre. Kaj en la placo solena kaj terura — kie laŭfantoma ŝtuparego konfuze elvokas en la penso de la vojaĝanto rememoron je stranga revo de antaŭ dudek jaroj — nevideblaj infanoj, kiujn eĉ je iliaj malbonagadoj la urbo genio inspiras, ludas teruran ludon; kaj en la silento de la alta vespero pordfrapilo batas, ĝi sola, la domon de retordita maljunulino.

Sed, jen estas tagiĝo. Kantas la kokoj, kaj la Devesa, apud la rivero, mildiĝas kaj paradiziĝas, kvazaŭ la bosko kie Beatrice montriĝis.

Jes, Girona. Vi aspektas ordaranĝita de febro el Dante. La muregoj, la Infero. La preĝejoj, la Purgatorio. La arbaroj, la ĉielo.

Viaj artistoj skribas akrajn rakontojn timigajn aŭ desegnas skeletojn kun ĉapelaĉo duonkovranta la senharaĵon kaj pipo inter la makzeloj.

Sed vi kaŝas en via interno, Girona, la junan aman Arkitekturiston. Tiun kiu havas la animon tiel nova, pulsbatanta, suka kaj plena de estonteco kiel unu el tiuj primitivaj organismoj en la fundo de la maro, kiuj sin movis malkviete ĉar ili gardis, laŭ la zoologoj, en sia patrino gelateno, la plasmon de ĉiuj estontaj organismoj, de ĉiuj animaloj kaj plantoj kiuj estas pleningintaj la mondon de varieco.

Girona, vi estas kvazaŭ maljuna militisto invalida kaj eksterbruligita de la fajro el la timegindaj bataloj, kaj en leŭ aperas, de tempo al tempo, ĉe la hirta lipharo, hela boneco de infano.

Vi estas, Urbo, malmola nukso, kun ŝelo ŝtona kaj sulka, sed blanka interne, mola, lakta, dolĉega.

Trad. JOSEP MARIA DALMAU

JOAN PUIG I FERRETER

(1882)

Joan Puig i Ferreter naskiĝis en Selva del Camp. Li verkis bonajn poemojn, sed li estas pli konata per siaj dramoj, ĉar Puig i Ferreter estas unu el la plej bonaj dramistoj katalunaj. En la lasta tempo li verkis novelojn, el kiuj distingiĝas "Les facècies de l' amor", verko tre interesa, same en la fundo kiel en la formo, kaj vera modelo de romano psikologia.

Bibliografio: Dramoj: La dama alegre (3 a.); El gran Aleix (3 a.); La dama enamorada (5 a.); La innocent; Desamors; Arrels mortes; Aigües encantades; Drama d'humils; Garidó i Francina, k. a. Noveloj; La novella d'Esther; L'home que tenia més d'una vida; Les facècies de l'amor. Tradukoj: Els menestrals (4 a.), Gorki; El domini de les tenebres (5 a.), Tolstoi.

KRUT-ROKO AL EBENAĴO: LUPO AL HOMO

Mi volas aŭdi blekon de la vento,
sidante ĉe krut-roko sur plejalt',
dum fundon de l' abismo, kun atento
serena, rigardadas mi sen halt'.
Mi volas aŭdi blekon de la vento,
kun libera harar', en la momento,
kiam vent' polveriĝas en resalt'.

Mi volas aŭdi kverkon kraki tuŝe
kun alia falante, pro veter'
uragana torditan, dum mi puŝe
de l' vento balanciĝas en l' aer'.
Mi volas aŭdi kverkon kraki, tuŝe,
kaj al rok' min kroĉante unge, buŝe,
mi volas lerni lukti kun danĝer'.

Mi volas aŭdi ŝtorman laŭt-sonon,
kaj hu-blekon de lupo, kaj imponon
de fulmoj en ĉiel' kun tondra kri'.
Mi volas, kiam ŝajne sin dispremas

la giganta krutaj' kaj mondo tremas,
kanti festan kanzonon,
kvazaŭ Dio de l' Tero estus mi.

Kaj, venkinte militon de Naturo,
mian domon sur mont' apud lazuro
mi forlasos kaj luktos kontraŭ Hom':
(Ĉu li estas la monstro de la Tero!)
Se venkinton de ŝtorma la kolero
venkas li, mi reiros sen fiero
sur giganta krutaj' al mia dom'.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LA PETOLAĴOJ DE AMO.

Ĉapitro VII

Marti, post la tagmanĝo, entreprenis la vojon al la *Comba*, pli frue ol kutime. Estis la horo, kiam la suno havas pli da pezeco, kiam la fosiloj, sen forto por mordi la teron, ĝin gratas kun mallaboremeca bruo; kiam eĉ la arboj ŝajnas lacaj pro la sunumado kaj montras sian svenecon per la velkado de siaj folioj. Tiam la furiozeco de la somero iĝas nekvietigebla vipado, ĝia tuta ĝojvivo koncentriĝas je la kanto de la cikadoj, ebriaj de lumo.

Marti vojiradis, kun la spirito subpremata de kontraŭaj movoj. Rememorante ĉiujn siajn dumnoktajn pensojn, li al si proponadis, ke li ne kolerigos la familianojn *Cogull* per senutila enamiĝado je *Lina*. Li tro respektadis la memoron de la mortinta amiko, kun tiu altareto sur la komodo—la portreto, la floroj el drapo, la kandeligoj—kie *Teresa* kaj li servadis daŭran kulton, por fermi al si la pordon de la *Comba* kaŭze de sencerbulino, ĉar tia li konceptis *Lina'n*. Li tamen bedaŭrus ke fratinoj *Cori* kaj *Lina* estu forlasintaj la farmodomon. Estis gaja la somertempo kun ili. Kaj la spektaklo de la *Cogull'o*j enamiĝintaj, fariĝadis preskaŭ drameca. Li estis prefa plenumi la deziron de *Lina*. Li iros ĉiujn tagojn al la *Comba*, ne por pli-malpli facila flirtado, sed serene, kun atendanta sintenado, kun la celo observadi la *Cogull'o*jn kaj reteni *Lina'n* apud ili. La scivolemo estos pli pova ol la eknaskiĝanta inklino por *Lina*. Ĉar se li enamiĝus, li ne plu klarvidus la kazon de la *Cogull'o*j, ĉiam pli maltrankviligan. Anstataŭ rimarki kiamaniere pro amo al sama virino suferas plenaĝulo kaj infano, kun la diversaj fenomenoj kaj nesuspektitaj sekvoj, li mem suferus, se li enamiĝus, kaj tiam forflugus ĉia ebleco pri obser-

vado. Li mem iĝus nova elemento de la kazo, kaj ĉi-tion li konsideradis maldigna. *Lina* estis tro vulgara por ke li risku sian superecon. Li vidigos al ŝi, iom post iom, ke al li oni ne tiel facile turnas la cerbon, kiel al la krudecaj *Cogull'oj*

Ĉe lia alveno al la *Comba*, *Lina* observadis ĉe la ombro de juglandarbo, kiu staris ĉe la rando de la vojo, kelkajn paŝojn pli sube de la farmodomo. Evidente ŝi atendadis lin. *Cori*, venkita de la dumnokta nervemeco, estis foriĝinta por posttagmeza dormeto. *Andreu* kaj *Biolet* senfoliigadis la vinberujaron de la deklivo, preter la olivarbejo, por ke la suno kaj la aero plentuŝu la vinberojn kaj ili plejbone maturiĝu. *Teresa* mastrumadis interne de la farmodomo.

Lina kaj *Marti* disvolvis belan interparoladon sub la juglandarbo. La ombro estis bona, freŝa venteto blovis.

—Ni ne moviĝu el ĉi-tie — diris *Lina* —. Tio estas la plej bona loko. Ni estos aŭdataj de neniu kaj povas esti vidataj de ĉiuj. Tiel neniu el ili suspektos...

—Tio, kio plej interesas al mi — diris la studento — estas scii kiu el vi ambaŭ hodiaŭ matene diris la veron. Al mi ŝajnis — sincere — ke vi estas la mensogantino...

Lina konfesis. Estis vera tio, kion *Cori* estis dirinta. Aŭdiĝis bruo, oni intencis penetri en la ĉambron. Sed kian timon ŝi devis senti, sciante ke ili estas interne bone fermitaj? Estis vera, ankaŭ tio, ke viro senmova troviĝis antaŭ la farmodomo. Tiu viro estis *Biolet*, ne *Andreu*. Ŝi estis rekoninta lin, kiel nun ŝi rekonas *Martín*, kiun ŝi havas kontraŭ ŝi, plentage. *Cori*, pro la nervemeco, ne estis kapablanta distingi. Tio estis *Biolet*, la vere freneza pro ŝi, tiu kiu plej timigis ŝin. Ĉar la patro, ĉu pro la aĝo, ĉu pro la malestimo de ŝi montrata, ĉu pro tio, ke li sin vidis ridinda pro sia enamiĝo, aŭ pro tio, ke li estas honta, jam komencis lasi ŝin trankvila. Kontraŭe, la junulo montriĝis ĉiam pli kuraĝema. Estis neimagebla afero. Nur ŝi, kiu tion vidis de proksime — ĉar la knabo malfidis al ĉiuj kaj kaŝis kiel eble sian pasion —, sciis ĝis kia ekstremo *Biolet* febras pro ŝi. *Lina* bedaŭradis esti, en la komenco, montriĝinta iom komplezema apud li. Ne grave, sed ŝi estis permesinta ke li premu al ŝi la manon, ŝi estis tolerinta iajn petolaĵojn; ian tagon la junulo kisis ŝin, kaj ŝi devus koleri pli ol ŝi faris. Ĉio kune ne havis ian gravecon. Sed kiu povus diveni...

Marti observadis ŝin ĝisfunde, sed kaŝe, por ne suspektigi ŝin. Ŝajnis al li, ke *Lina* nur duone diras la veron.

—Ĉar vi estas kun mi tiel sincera, — li diris — mi dezirus scii alian aferon: tiu ekkrio, tiu sveno kaj tiu serpento...

Lina ekridis. Tuj ŝi estis kompreninta, ke *Marti* ne englutas la mensogon. Ne ekzistis tiu serpento. *Andreu*, kiu fosadis en la legomejo, sin estis ĵetinta sur ŝin, kvazaŭ ebria, kaj ŝi vere — kaj tiam ŝi ne mensogis — estis sentinta grandan ektimon.

—Nu, *Lina*, kiel vi povas tion toleri? Kia intereso la via, kaŝi la veron?

—Ĉar mia fratino estus volinta foriri tiun tagon, kiel ŝi volis foriri hodiaŭ.

—Kaj vi ne sentas avidon forlasi lokon kie vin minacas la furiozaĵoj de du tiaj barbaroj, kiaj estas la *Cogull'oj*?

—Antaŭe mi ja volis foriri. Nun, ne.

—Kial nun ne?

—Tial ke vi ŝirmos min de ili.

—Vi aljuĝas al mi povon, kiun mi ne havas. Mi supozas, ke vi bezonas nek min, nek iun ajn, por vin gardi.

—Kompreneble ne. Sed se ia danĝero estis, nun ne estas. Via ĉesto gardas min, mi estas certa.

—Ŝajnas al mi, *Lina*, ke vi ŝatas ludi kun fajro.

—Jes, iam.

—Ĉu vi ne timas brulvundon?

—Ne multe.

—Atentu, *Lina*, ke vi suspektigas min, ĉu vi incitis la patron kaj la filon.

—Ne tiom...

—Almenaŭ, konfesu, ke malgraŭ ĉio, al vi plaĉas esti ŝatata kun tioma perforto de la *Cogull'oj*.

—Ĝi estas sovaĝa afero...

—Kiun vi sentime vidas alproksimiĝi...

—Anstataŭ timigi min, ĝi min amuzis.

—Vi, do, konsideras tion kiel spektaklon.

—Kiel ion similan.

—Ĉu vi ne komprenas, ke tio estas danĝera ludo?

—Ĉiam ŝajnis al mi, ke la fulmotondro estas malproksima.

Ĉu ne rezultis nekomprenebla tiu virino ŝajne tiel vulgara?

Marti ne povis finfine kompreni la intencojn de *Lina*, precipe kiam ŝi insiste ripetadis tiujn vortojn: — Vi gardos min — Li decidis aliflanke ataki.

—Vi, *Lina*, havas fianĉon. Oni diris al mi, ke vi edziniĝos ĉi tiun vintron...

—Mia fianĉo? Ĉu mi iam parolis al vi pri li?

—Aliaj parolis pri li.

—Mi deziras ke inter vi kaj mi ne venu li malhelpi — diris *Lina* ridetante, evitema.

—Vi ne amas lin...

—Ekzistas neeblaj aferoj.

—Sed ĉu vi edziniĝos kun li?

—Kompreneble, se ne estas ia rimedo...

Kiaj malnoblaj virinoj! — pensis *Marti*. Sed li ne kontentiĝis per tiuj malprecizaj respondoj.

—Kiu estas via fianĉo?

—Vi demandas kiu estas, aŭ kia li estas?

—Efektive, kia viro li estas?

—Li estas vidvo. Riĉa. Korpulenta, grasa, malrapidema. Ĉu estas al vi sufiĉaj tiuj-ĉi informoj? Ĉu vi volas, ke mi ankoraŭ pli hontu per pliaj detaloj pri li?

—*Lina*, pro Dio! Se vi pensas, ke tiu estas mia intenco...

Lina estis ruĝa kaj plorema. Dolora furiozo fajrerumis ĉe ŝiaj okuloj. Furiozo en ŝi la emo malaltigi, malhonorigi preskaŭ, kaj ŝi plezuradis humiligi sin, groteske pentrante sian fianĉon.

—Ne pensu—ŝi diris kun kreskanta ĉagreno—ke li estas junulo eleganta kaj iluziiga kiel vi. Li estas kvardekkvinjara, li ŝajnas rano, li estas komercisto, havas la magazenojn sub nia etaĝo. Mia fratino kaj mi kune ridis je lia grasa korpulenteo kaj je lia troampleksa pantalono, kiam ni ekvidis lin venantan al la magazeno. Kaj, jen, ian tagon li igis ke oni diru al mi, ke se mi lin akceptos, li edziĝos kun mi, ke li havas bonan moneramasojn kaj ke li traktos min kiel reĝinon... Mi respondis jese, kun la celo fini tiun stultan vivadon, kiun mi faras apud mia fratino. De junaĝo ni estas solaj. Ni vivas izolitaj. Mia fratino estas bigota. Por ke oni opiniu nin honestaj, ŝi tiom troigis la aferon, ke ni vivas malgaje. Ni ne ĉeestas teatrojn, nur de tempo al tempo kinon. Tie ni lernis esti elegantaj kaj, tial ke ni ne estas riĉaj, ke ni devas labori por vivi, ĉiuj nin konsideras afektulinon. Mia fratino, nekomprenibile por mi, kvankam bela, ĉar tion oni ne povas nei, apartigas la virojn de si; mi pensas, ke tio okazas pro ŝia malbona karaktero, kiu montriĝas sur ŝia vizaĝo. Al mi, neniu agraba junulo venis ankoraŭ por paroli pri amo. Ĉiam venis al mi maturaj viroj, masivaj dikuloj kun vizaĝo de promeneja gardisto, sinjoroj kiuj rezultis esti policanoj, urbogardistoj, malsatantaj mizeruloj aŭ viroj korpulentaj kiel kolportistoj. Neniam, unu el tiuj junuloj ĉe kies vido ni pensas: Jen iu, al kiu mi tuj respondus jese—alproksimiĝis al mi por diri vorton...

Lina, hontante pro sia konfeso, sufokadis malfortajn singultojn, kiuj fluidiĝis je akvo en la okuloj. *Martí* ne sciis kiamaniere respondi, pentante esti incitinta tiun eksplodon.

—Kion mi devis fari? Kion mi devis fari?—ekkriadis *Lina* por sin senkulpiĝi.

Kaj subite, per rikana tono kiu perforte superis la doloron, ŝi diris:

—Jen, legu...

El bileto, kiun ŝi portis en sia sino, ŝi eliris leteron de la fianĉo, de ŝi trovitan en la farmodomo, tiun tagmezon, kaj ĝin prezentis al *Martí*.

—Ne, ne; dankon—li diris kun vera senintereso.

—Jam mi mem diros. Ĉiuj estas similaj. Ili ĉiam pli-malpli diras la samon.—Kaj kvazaŭ litaniante, *Lina* murmuris:—Ŝirnu vin de malvarmo je la noktigo. Ne trinku malvarman akvon el la fontoj ĉe tien vi alvenos ŝvita. Ne eliru nokte. Iru dormi frue. Manĝu mul-

te, sed la fruktojn kun zorgo, precipe se ili estas nematuraj. Aŭskultu la konsilojn de *Cori*, pensu ke ŝi estas la pliaĝa fratino, kiu devas agi kiel patrino. Aliparte, ŝi ĉiam montriĝis kun pli da saĝo ol vi...

Kaj subite, ekkolerinte, ŝi ekdiris ŝanĝante la tonon:—Kial, do, li ne enamiĝis je *Cori*, la malspritulo?

Kaj poste, ridetanta, kun tiuj kavetoj sur la vangoj, ŝi aldonis:—Ĉu vi opinias ke mi tiom bezonas zorgi pri mia bonfarto? Kvazaŭ mi ne havus sufiĉan, eĉ por ĝin vendi, bonfarton kaj ĉion, kio mankas al li?...

Martí restadis surprizita kaj ĉagrena.

—Do, ne edziniĝu kun li, *Lina*—li diris—. Vi estos malfeliĉa.

Aperis *Cori* ĉe la pordo de la farmodomo. Ankoraŭ ŝi estis endormema kaj malfermadis la okulojn, vunditajn de la grandega brileco de la ĉielo. La aero tremetis kun reflektoj kaj vibradoj, kvazaŭ ĝi estus removigata per batado de nevideblaj flugiloj. Tio estis la kuneco de etero kaj lumo en la plej kulmina momento de la somerpleno. Forto kaj malenergio influis la korpojn per kontraŭaj efikoj, ilin skuante per ondoj de malfortigo, kaj de ekscito. Eĉ la inerta materio, la apudvojoj rokoj, oni dirus, havas animon, dezirojn kaj voluptojn.

Sajnis ke *Pan*, la kornulo, estis tuj aperonta ĝoja, kronante la vinberujan monteton, kiu staris ĝuste super la vojo al la farmodomo. Anstataŭ *Pan*, aperis *Andreu*, ruĝkolora kaj juna malgraŭ sia aĝo, kun malkovrita brusto, elmontrante la fortan harplenan sinon, kun malordigita kaphararo en kiu ne estis eĉ unu blanka haro. Maldika, nerva, muskolforta kaj krurlonga, li malsupreniradis longpaŝe, rapidege, tra la vinberejo, sekvata de sia filo, kiu estis la printempa bildo de sia patro kaj ŝajnis juna faŭnuso. Ili ambaŭ havis la vizaĝon sunbrila, kaj la okuloj, kiuj magnete sin turnis al *Lina*, brullumadis. La studento divenis sur la okuloj de la knabino, kiuj ne povis sin deteni de rigardado al ili ambaŭ, ian ravemon. La viroj sin direktis al la farmodomo, tra la vinberujaro, ne malsuprenirinte al la vojo, por eviti trairedon antaŭ *Lina* kaj *Martí*. Per salto de forta kaj rapidmova besto, ili eksaltis antaŭ la farmodomon. Ili estis irintaj trinki.

Cori, kiam ŝi vidis ilin alproksimiĝantajn, alkuris al *Martí* kaj *Lina*.

—Rigardu ilin. Ili estas sovaĝaj—ŝi diris.

—Ne tiom—respondis *Lina* senvole—. Ili estas tiel fortaj...

Martí restis unu momenton pensema. Sajnis al li, ke li legas klare en la spirito de *Lina*. Ŝi povas tamen esti honesta, sed ne povas sin deteni de komparado inter tiuj homoj, plenaj de vira vigleco, kaj ŝia fianĉo dika kaj sennerva. La spektaklo de tiu furiozo de pasio, kiun ŝi estis ekscitinta, same fortega en la dekkvinjara knabo kiel en la kvindekjara patro, eble igis ke ŝi ŝanceliĝu.

Kompare al ŝia fianĉo, ili devas ŝajni al ŝi viroj el alia raso. Kaj la sugestio de tiu plej aĝa filo, kiu estis sin mortiginta pro virino! Kiaj intensaj pasiemuloj tiuj *Cogull'oj!*

Li preskaŭ pardonis ŝin esti tro plezuriginta je iliaj krudaj deziroj.

Sed, vidante *Cori'n*, ĉiam tiel serenaj kaj dignaj, kvazaŭ la harmonio de ŝia korpo devenus de la ekvilibro de ŝia spirito, li ekkomprenis ke en *Lina*, kvankam ŝi estas pli alloga ol la alia fratino, estas io malklara, kio povus esti la malkvietiga elemento kiu efikis sur la *Cogull'ojn*. Ĉar neniu el ambaŭ, nek li mem, estis sentintaj inklinon al *Cori*, kiu entute estis pli bela ino ol *Lina*. Tio estis, ke la klareco de la animo de *Cori* lasis ĉiujn trankvilaj ĉirkaŭ ŝi. Ili paroladis ankoraŭ dum kelka tempo, li distrita kun siaj pensoj. Kaj *Marti* decidis, de tiu momento, sin dediĉi pli al *Cori* ol al *Lina*. Kaj li diris:

—*Cori*, se ja ni devas baldaŭ disiĝi, kial ni ne faras belan ekskurson, ĉi-tiun posttagmezon?

La du fratinoj akceptis ĝoje. Ili foriris por ioma tualetto, ĉar tion ili ne povis forlasi eĉ por supreniri la montegon kie ili estus gratvundotaj de la kardoj. Kiam ili alproksimiĝis al la farmodomo, patro kaj filo elŝteligis kvazaŭ hontigintaj, furiozaj pro kolero.

Marti daŭris turnante sian penson:

—Estos pli dolĉe flirti kun *Cori*—li al si diris—kaj tio estos kvazaŭ bonfaro, ĉar *Lina'n* ĉiuj avidas kaj al la alia neniu diras ion.

Tiam alproksimiĝis al li *Teresa*, flatema:

—Ĉu vi vidas? Ili jam cedas—ŝi diris al li—. Ili fine ekrimarkos, ke ili avidas la lunon. Tamen la plej juna, mi pensas, estis tiuj falonta se vi ne estus veninta.

—Sed ŝi, ĉu ja ŝi ŝatis ilin?—diris la studento, kun intereso por vidi klare en la konduto de *Lina*.

—Ŝi ŝatis malsaĝigi ilin. Ne agante malbonon, ŝi komencis montri sin tro komplezema. Nun, ne. Nun ŝi ŝatas vin, kaj ankaŭ la pli aĝa fratino. Mi aŭdas iliajn interparoladojn. Se vi volos, vi ruzetrompos unun kaj alian. Mi helpos vin.

—Tiu ludo estas danĝera.

—Kial danĝera? Por vi, juna, ĝentila kaj libera? Vi ne povas imagi, kiel mi antaŭgustumas la jaluzon de miaj hejmanoj! Hieraŭ, kiam la edzo ĵetis la panon sur mian kapon, ĉu vi pensas ke mi ofendiĝis? Pro ĝojo mi preskaŭ saltis.

—Rilate vian edzon, estas indiferente. Sed estas alia, kiu suferas.

—Ĉu la knabo?

—Jes, via filo. Kaj ŝajnas al mi, ke li estas la plej enamiĝinta kaj kiun plej dolorigas mia ĉeesto.

—Pro tio estas necese fari al li krudan kuracadon. Vinagro

kaj salo, sur la vundon. Eĉ fajro, se nepre. Ke li ne rezultu kiel la patro kaj la unuenaskito. Super ĉio, vi venu. Ni forlasu la du fratinojn pro nenio en la mondo. Pensu ke vi faras al mi favoron. Vi reportas al mi la gajon kaj la pacon. Tion mi petegas, je la memoro de *Jaume*. Se tiu perdiĝis, ke mi ne perdu ĉi-tiun alian...

Estis io teruriga kaj samtempe kortuŝa en la stranga peto de tiu virino, kiu konsideradis necese suferigi sian filon por resanigi lin el neebla amo.

—Ĉu vi promesas al mi veni ĉiutage, kiaj ajn estos iliaj faroj?

—Jes—diris la studento.

—Mi helpos vin en ĉio—rediris kontenta la maljunulino.

Stranga situacio, tiu de *Marti Gaia*. Ĉio lin puŝis al sama celo. La petego de la maljunulino, tiu de *Lina*, lia propra inklino por tiu-ĉi lasta, inklino kiun li intencis deklini al *Cori*; la interese kazo de la *Cogull'oj*, ilia konduto kiu incitis lin lukti kontraŭ ili... Ĉio, ĉio postulis ke, el observanto, kia li al si proponadis esti, li ŝanĝigu en aganton, eble en naskanton de la okazontaĵoj kiuj ĝermis en la merigardebla fundo de la tempo. Tiel la ventegoj formiĝas en la altega spaco, kiam la homoj ankoraŭ ne vidas la nubojn, kiuj ilin portas en sia sino, ŝvelajn kaj kvietajn.

Malsuprenvenis la du fratinoj, kun kanabŝuoj kaj pajloĉapelo, kokete ornamitaj. Ili entreprenis kun la studento la vojon post la domo, kiu supreniris al montego. Kiam ili transpasis la interlimon de la arbaro kaj la vinberejo kaj malaperis sub la duonlumo de la pinoj, la *Cogull'oj*, patro kaj filo, de sur la monteto, ankoraŭ longan tempon okulsondatis la arbaron, nostalgiante klarumadon de juĝoj en la orumita verdo.

Ambaŭ malrapide reprenis la laboron. Illi montris la koleron kaj la ĉagrenon, pentritajn sur la vizaĝo. Precipe ĉe *Biolet*, la koro elforkuradis al *Lina*. Li koleris, esti devigata sin klini al vinbertrunkoj, dum ŝi saltadetas kun la studento tra boskoj. Kaj ili rifuĝis ĉe ombro de fonto, kuŝiĝos sur malvarmeta musko, *Lina* kun la studento apude, *Cori* iom pli malproksime... Malĝojo kaj kolero elprenis de li la emon labori.

Ĉe la patro, tio efikis alie. Li malbonhumorigis, lia cerbo pleniĝadis de malbonaj pensoj. Vidinte la studenton, vageme ĝuantan la akompanion de *Lina* dum li devas klini la kapon al la tero, li sin sentis viktimo de la socia maljusteco. Tial ke li ne povis kuniri kun *Lina*, brakon ĉe brako, tra la valo, vidante sin rifuzita kiam la studento estis akceptata kun tiom da ceremonioj, en momentoj kiel tiu, kiam li vidis ilin foriri montsupren, ekbruladis tia kolerego en lia brusto ke ĝi povus elflamigi la mondon. Li ne konsideradis sian aĝon, nek sian edzecon, nek sian senkulturecon. Li nur rimarkadis, ke la alia kuniradas kun *Lina*, kaj li ne. Kaj tion li kredis maljusta, tiel maljusta kiel

la neposedado de la tero, dum aliaj posedas ĝin je miloj. Kaj li silentadis kaj sin enpuŝadis al laboro kun sovaĝeco. Ju pli li silentadis, des pli plivigliĝis lia enpuŝo, ĝis klakado de dentoj, ĉar li apartenis al fortuloj, kiuj moderigas la pasiekscitojn per agado.

Por li, la plej granda diferenco inter riĉuloj kaj malriĉuloj konsistis el tio, ke la riĉuloj, kiam ili avidas iun virinon, ŝin alproprigas al si per la mono, per siaj elegantaj manieroj, per siaj grandsinjoraj vestoj kaj siaj vortoj de kleraj viroj. En sia malsukceso kun *Lina*, li ne vidis malsukceson de la viro, sed malsukceson de lia socia situacio. Ĉiam, kiam li pensis ĉion-ĉi, pro la miksiĝo en lia koro de envio, kolero kaj ĵaluzo, li eksplodadis kun siaj edzino kaj filo per senkaŭzaj kriadoj, ne montrante la blankon de la okuloj, aŭ silentante dum du sinsekvaj tagoj.

Biolet, kontraŭe, velkis kaj sopiris, nostalgianta kaj revema.

Ili rekomencis labori, pripensante ĉiu siamaniere siajn aferojn. La patro, vidante la filon tiel senvigla, rigardadis lin strabe. Li divenis sub lia frunto la melankolion de liaj pensoj. Kaj li des pli enkoleriĝis, ju pli li vidis ke la filo malĝojiĝas. Li sondadis lian rigardon. Ŝajnis al li vidi malsekan helon en liaj okuloj. Momenton post momento li plikoleris. Tio ne plu estis furiozo pro la malforteco de la filo, sed la ĵaluzo ponardo aliajn fojojn sentita, precipe antaŭ la alveno de la studento, kiam *Lina* akceptis la komplimentojn de *Biolet* kun plaĉa rigardo. Denove tiun posttagmezon la ĵaluzo revenis kun la kolero kaj la furiozo, ĵaluzo pro lia filo, nun pli forta kaj pli kaŝita ol tiu antaŭe sentita pro la studento. Kaj tio ne estis ĵaluzo pro flataĵoj, rigardoj aŭ alridetoj, sed envio pro la amsento kiun *Andreu* volonte eltranĉus el la koro de sia filo. Li sentis furiozon pro tiu pura kaj naiva amo, freŝa kiel la unua helo de la tagiĝo, apud lia amo, malklara kaj densa kiel acidiginta vino. Ju pli la posttagmezo progresis, des pli la malvigliĝo de *Biolet* kreskis, kaj *Andreu* sin sentis pli kaj pli furioza kaj ĵaluzo. Li devigis lin labori pli ol liaj fortoj permesis. Kiam li vidis lin senfortiĝintan, li incitis lin tute same kiel oni faras kun mallaborema azeno, kaj diris al li:

—Nu, nu, peco da azeno! fantaziulo! Ĉu vi hodiaŭ trinkis sorĉaĵojn?

La knabo ne respondis. Atakita de sia patro, li ploris super la vinberujojn. Ekrimarkinte tiujn larmojn, *Andreu* ne plu povis sin deteni. Li suprenlevis la brakon kaj preskaŭ estis fraponta lin per bato de fosilo.

—Hundo! maldiligentulo! — li diris kun la fosilo altenlevita.

La knabo forkuris de lia flanko, plorante. Li ne plu povis rezisti.

Vidante lin supre de la deklivo, *Andreu* ekkriis:

—Anstataŭ plori kiel suĉinfano, pli bone estus, se vi lasus lin senviva, per ŝtonbato, por ke ne restu al li deziroj reveni al la *Comba*.

La knabo haltis subite. Li aŭskultis kvazaŭ li atendus el la patraj lipoj aliajn vortojn.

—Se vi, ja, ne faros tion, ĝin faros mi mem! — finiris *Andreu*.

Biolet foriris plorante. Li estis fininta siajn fortojn. Li ne havis emon reiri al la laboro. Kaj li sin sentis honta, ke lia patro divenis liajn koraferojn. Kvazaŭ plenaĝa viro, li klopodadis reteni sian pasion fermita en sia brusto, kaŝita al ĉiuj krom al *Lina*. Sed lia patro malkaŝis ĉiujn liajn pensojn. Tio furiozigis kaj dolorigis lin, ĉar li komprenis ke, se lia patro ne estus enamiĝinta je *Lina*, neniam li estus kapablinta eniri tiel ĝisfunde en lian fermitan bruston. Kaj li ankaŭ sentis ĵaluzon je sia patro. Kelkafoje eĉ pli ol je la studento. Kaj tiel same kiel ĵaluzon, li sentis honton, ĉar tiu amo de lia patro al *Lina*, ŝajnis al li abomena kaj malklara.

Estis la vesperiga horo. *Biolet* malsupreniris la deklivon, plorante. Ĉe la alia deklivo, *Andreu* havis la bruston skuita de diversaj kolerkirloj: kontraŭ sia filo, kontraŭ sia edzino, kontraŭ *Lina* kaj la studento, kontraŭ la mizero, kontraŭ la tero subtenanta lin, tial ke ĝi ne estis lia.

Kvazaŭ el tiuj kolerskuoj iu ero estus atinginta al *Biolet*, tiu-ĉi subite ĉesis plori, tute instigita de tiuj vortoj: Estus pli bone, ke vi sensentigu lin per ŝtonbato, tiel ke ne restus al li deziro reveni al la *Comba*.

Instinkte la infano prenis ŝtonon kaj ĝin ĵetis tra la aero, rapidan kaj siblantan, kvazaŭ ĝi estus elirinta el ŝtonĵetilo. Oni dirus, ke li provlernadas.

Trad. ARTUR DOMÈNECH MAS.

LLORENÇ RIBER

(1882)

Bibliografio.—Els camins del Paradís perdit; Els Sants de Catalunya; Vida i actes del B. Ramon Lull. Klasikaj tradukoj: Eneido, de Virgilio; La conjuració de Catilina; La guerra de Jugurtha (Sahlusti).

AL VIRGILIO

(*Komencaj kaj finaj versoj de Antaŭparolo al kataluna traduko de "Eneido"*)

Tremante, ho Pontifo de l' Mistero,
antaŭ vin venis mi kun fuŝa liro
de nokta gril', kun lango tre malmola
kaj animo barbara.

Kaj mi komencis la lacigan taskon:
kunlaboradis jaroj kun monatoj,
la noktoj kunlaboris kun la tagoj,
kun horoj de l' tagiĝo, la vesperaj.
Apud min vi venadis nevidebla,
vestita per purpur', melankolio,
sub amika silento de la luno
aŭ sub la steloj brile tremetantaj.
Eble, nedaŭra fajro de lampiro
eklumigis al mi sencon de vorto;
eble la sono de kaŝita fonto
revelaciis pri muziko via;
eble la dolĉiangvoro de papavo
rompita de plugilo, memorigis
min pri tiu laŭjunka kapkliniĝo
de Eŭrial' malforta kaj mortanta,
kaj eble la papav' peza de l' pluvo
memorigis pri l' kapo de Kamilo,
pezigita de troo da hararo...

La Viron kantis mi, kaj la Armilojn...

Finiĝis la labor', kaj liro krakas
de la grava pezec' de l' Epopeo;

sed restis mi kun la anim' pli pura
de via serenec', la man' pli dolĉa,
kaj la brako pli freŝa de l' senlaca
martelad' sur l' amboson.

La Viron kantis mi, kaj la Armilojn...

El la purpuro de Tirio faris
katalunecan ŝtoton mia Muzo,
fidela kiel vigla Penelopo
en la lumeco de la nokta lampo.
Ho fil' de miaj penoj, kara libro,
ekflugu tra l' ĉiel' kvazaŭ Ikaro,
kun flugiloj el vakso, pruntpetitaj.
Jen stelo de l' Vesper'. La horo estas!
Dormiĝas la birdar' ĉe l' foliaro.
La dia najtingal' de ĉmola plumo
deliras en la poplo dukolora,
kvankam nun ne ankoraŭ estingiĝis
la gloro de la lasta lumohelo
kiun lasas la Suno sur la montojn,
kiuj, serenaj kaj majestoplenaj,
ja estas via frunt', Katalunujo!

JOSEP CARNER

(1884)

Josep Carner, naskiĝinta en Barcelona, estas plej eleganta poeto kaj delikata prozisto. Multaj konsideras lin la plej bona el la vivantaj poetoj katalunaj. Kiel prozisto, li montras specialan humoron, iel similan al tiu de la anglaj aŭtoroj. Ni ne studos la personecon de Josep Carner, pro tio ke li estas ankoraŭ en la mezo de sia vivo kaj de sia verko. Ni citu nur tion, ke li, krom originala aŭtoro, ankaŭ estas pacienca kaj majstra tradukinto de multnombraj verkoj.

Simile kiel ni faras pri Carner, kies verkon, tiel aktualan, ni ne kuraĝas prilakti, ni ne plu faros ian komenton al la sekvantaj aŭtoroj *post Carner*.

Bibliografio: Llibre dels poetes; Els fruits saborosos; Primer llibre de sonets; Segon llibre de sonets; La malvestat d'Oriana; Verger de les galanies (1911); Monjoies (1912); Auques i Ventalls (1914); La paraula en el vent (1914); Bella terra, bella gent (1918); Les planetes del verdum (1918); L'oreig entre les canyes (1922); La inútil ofrena (1924); El cor quiet (1925); Les bonhomies (1925). Tradukoj: El malalt imaginari, de Molière; Faules, de La Fontaine; El burgès gentilhome, de Molière; Una cançó natalenca, de Dickens; Les aventures de Tom Sawyer, de Mark Twain; L'elefant blanc robat, de Mark Twain.

* * *

Eterna Di', Sinjor' de mirindaĵoj:
por ĉi-tiuj graciaj delikataj
de Vi verŝitaj sur miljaran teron
per nur unu rigard' de kontentiĝo,
por la steloj helvivaj, malgrandetaj,
por la neĝo sur supr', rozkoloriĝa,
por l' akvo de laget', iĝinta blua,
por la arbeto, kiu ŝajnas tremi,
por la floroj ĉe herbo, tiel timaj,
por la ĉarmo de pomoj vintrottempaj,
por sonor' de novaĵoj roznuancaj,
por la vojetoj preskaŭ nevideblaj,
por la fumovualo de vespero,

JOSEF CARNER

343

faru, Sinjor', ke l' amatino estu
mistera, bela, delikata, milda,
ke ne forkuru, kiam mi ŝin kisos,
ke la kapon ŝi turnu hontbedaŭre
esti lasinta la patrinan sinon,
ke estu blanka kaj estiĝu ruĝa,
ke timigita de folibrueto,
ankoraŭ pli enbraken ŝi rifuĝu
de la amanto, kiun ŝi evitis.

Trad. JOSEF GRAU CASAS, L. K.

ELTROVO DE LA KISO

Nu, fratoj estis *Amo* kaj *Forges'*
kaj inter ili regis harmonio.
(*Am'*, la pli aĝa, skuas nin sen ĉes';
la pli juna, kurac' estas por ĉio.)

—Mi trovis— diris *Am'*— (granda sukces'!)
ion novan; la kis, flor' de pasio,
de la buŝoj sigel', milda kares'
kun mallaŭta kaj longa melodio.

Sed mi timas ke l' homo, sen prudent',
mortos sentante tian dolĉan ĝuon,
ĉar ja difektas lin vivi tro ĝoje.

—Por ke ne venu la danĝer-moment'
—diris *Forges'*,—mi metos dorm-enuon
en ĉiun troan kison ĉiufoje.

LA BRAKOJ DE LA AMATINO

Ho brakoj akceptemaj de l' amata
brilantaj en la nokto kiel stel',
de l' ambuked' ligaĵo delikata
kaj por ĉia malb' konsola bel'!

Promesas vi, kvazaŭ tagiĝ' benata,
de ŝia korp' pri la sekreta hel';
vi estas, kvazaŭ branĉo parfumata,
por mamoj-kolombinoj ripoz-cel'.

Vi promesas pri amo fantazia
kaj vi levadas vin, girland' gracia,
kiam ŝia rigard' proponas sin.

Sed kiam, kuŝe, l' amatin' esperas,
vi sub ŝian hararon malaperas,
hontaj ne scii kiel teni min.

DIANTO

Pri diant' revas mia kor',
kiu ĉe viaj dentoj estas,
pri l' ruĝa flor' kun la kolor'
de tiu buŝ' kie ĝi restas.

Donu l' dianton, amikino,
ne pro l' kolor', nek pro l' odor';
por mi—la flor' de l' am-inklino,
de via sino l' am-fervor'.

Mian vivadon plen-venenas
ia tre stranga sorĉ-potenc',
kaj de mortigo la intenc'
al mia pens' subite venas.

De vi mi iĝus mortigant'
nur por atingo de l' diant'.

MALFIDO

Mi povas vin atendi, ho virino,
mi povas atendadi sen konsol',
pro via gajo aŭ kruel-inklino:
sed ne kun esperema firma vol'.

Ĉar amo ne gajniĝas ĉiutage
per honesteco kaj per saĝa sent':
ĝin neniu donadas merit-page,
ĝin gvidas kaj kondukas nur la vent'.

La amo mokas je la leg' uzita:
ĝi fermas la okulojn ĉe abism',

ĝi elektas je l' flor' plej venenita,
tra rifoj iras ĝia ŝip' sen tim'.

Jen pruv' ke mia dir' estas kredinda:
amata estas nur la neaminda.

KANTO TIMEMA

Ne scias ŝi ke premas min
ŝia vidiĝo graciplena,
ke por turmenti montras sin
ŝia rigard' tiel serena,
ke ŝia helo pelis for
la tagan lumon kun envio.
Iru kun tim', ho plend-sonor'
de poezio,
al l' amatin' de mia kor'
en agonio.

Mi nur konfuze vidas ŝin
post la fenestr', en malproksimo;
ne estas kisoj pli sen fin'
ol ardaĵ revoj de amtimo;
ŝin malproksiman kun pasio
ofte mi kisis en dolĉ-plor'.
Iru kun tim', ho plend-sonor'
de poezio,
al l' amatin' de mia kor'
en agonio.

Iru, ne diru pri l' sekret':
ke ŝi ne sciu min am-svena;
se ĉe l' eliro de vojjet'
al mi ŝi venus amoplena
kaj de ŝi trafus min l' odor',
mortigus min amemocio...
Ekiru for, ho plend-sonor'
de poezio,
al la trezor' de mia kor'
en agonio.

KANTO VARIEMA

Vi, en frua flugo-krozo,
vagas jam en am-promen';
ne por rozo—la ripozo
ĉe l' venteto de l' maten'.
Vi kliniĝu kiel rozo
ĉiufanken, en ir-ven'.

Iu amo por etern'
por vi estus troa prozo;
por la rozo, ĉe garden',
senmov' estus furiozo.
Ĉiufanken, en ir-ven',
vi kliniĝu kiel rozo.

Najtingal' kantas kun glosa
pri malĝoja, ama pen'.
Ne por rozo—bela pozo
amsopiri kun ĉagren'!
Vi kliniĝu kiel rozo
ĉiufanken, en ir-ven'!

ĈE STACIDOMO

Ĉar mia intima amiko, per sia telegramo, diras nur ke li alvenos vespere, sen pliaj detaloj, kaj du vagonaroj estas eblaj, unu je la deka kaj alia je la dekdua, mi decidis pasigi la verperon en la stacidomo. Kompreneble, mia devo estis tie stari antaŭ alveno de la dekhora vagonaro, sed mi ja konjektis ke mia amiko aperos nur noktomeze — sendube la plej oportuna tempo por aperaĵo. Kion ajn mi vetus pri tio ke mia amiko neniel venos pli frue. Mi estis, tial, libera viziti kafejon aŭ kinematografon, aŭ teatron, ne forironte ĝis kvarono antaŭ la dekdua. Je kvarono antaŭ la dekdua en kafejo restas nur jam de longe geedziĝintaj paroj, en la kinematografejo komenciĝas tiu kvara parto de vi jam vidita ĵus post eniro, kaj en la teatro vi jam povas fine diveni kiu estos la solvo. Sed mi havis senbruan, obstinan volon fari al ĝentila amikeco ian akran sinoferon. Du horojn mi decidis restadi en la stacidomo. Mi konfesas ke mi havis la malfortecon aĉeti ĵurnalon.

Ridetigos vin, kaj tute prave, la penso kredi ke tia malgrandaĵo kia estas ĵurnalo, kiun lerte falditan vi enŝovas en veŝtopoŝon, povas ŝajni taŭga rimedo al persono kiu havas antaŭ si du horojn. Krom tio, mi, por kompreni ĵurnalon, devas ĝin legi rapide. Se mi provas ĝin legi malrapide, mi pensas pri aliaj afe-

roj. Se mi provas relegi malrapide tion kion mi malatentis pro la sensenca imaga elŝteliĝo, tiam mi ne komprenas. Mi ne povas legi ĵurnalon de komenco ĝis fino de linio, kaj jen alia post alia, kvazaŭ pacience plugante per la rigardo. Mi devas legi zigzage.

Mi konsumis, do, mian ĵurnalon dum la kvin minutoj de atendado de la dekhora vagonaro. Mi memoras ke la ĉefartikoloj estis nur ŝaŭmo, kaj la telegramoj preskaŭ ĉiuj represitaj el la matena eldono; kompletigis tiujn trompajn paĝojn listo da amortizitaj notoj el Ŝtatsuldo, ampleksa meteorologia bukteno, kaj du aŭ tri novaĵoj kiujn ĉiuj ĵurnaloj konservas jam kompositaj kiel rezervmaterialo por plenigi angulon: la morto de Lenin kaj la nova falo de la marko.

El la dekhora vagonaro elfluis sufiĉe da vojaĝantoj. Tio estis vibranta momento. La viroj aspektis ĉiuj junaj, kun molaj ĉapeloj kaj malpezaj survestoj kaj ĵetis la valizojn al portistoj kun ĝoja vigliĝo. Al virinoj la okuloj ridetis sub la elektraj arkoj. — Jam ni estas hejme — ĉiu diris al si. Neniu pensis: — Vi restos en la stacidomo atendante tiun aŭ alian vagonaron. — En tiu horo la homoj ne ŝatas kombinaĵojn. Ili volas kuŝiĝi. Ilin puŝas la egoista penso pri baldaŭa dolĉa komforto. Kvietiga sento de la neniam ŝanceliĝanta domo, akvoŝprucoj, noktovesto, enlitiginte dormi... Ilia urĝo estas videbla. La vico organiziĝas, malaperas en unu momento.

Mi ne diros ke ĉe la stacidomo, dum sekvantaj horoj, tute mankas spektakloj. Tute malpura viro iras laŭflanke de senhoma vagonaro, kun vergo en la mano, kaj eligas, per frapado en la malsupro de ĉiu vagono, metalajn sonojn. Post dek-kvin minutoj pasas alia fervojisto kiu trovis tri malplenajn botelojn de mineralakvo. Poste venas aŭ formarŝas tute sola lokomotivo. Plej emocia momento estas kiam ili organizas longegan ŝarĝovagonaron; sur la vagonoj, hermetike fermitaj, troviĝas kabalaj signoj, krete desegnitaj, kiuj sukcesas vin okupigi. Kiam tio finiĝis ni povas rigardi la aŭtojn: tiu de la marbordo kaj la palmo estas plej konata, sed, por pasigi la tempon, plej efikaj estas tiuj kiuj konsistas tute el literoj, pro ilia ŝato al detalaj instrukcioj. Por unu sekundo povas vin allogi la impresa soleco de la atendejoj, sed oni ne longe tie haltas; skulpte kompreni ke vi atendas por du horoj, ne plezurigas vin; vi preferas ŝajniĝi sencelecon. La restoracio-kafejo ne multe proponas: tiuj du aretoj da oranĝoj kaj bananoj preskaŭ ĉiam malgajigas vin; la tabloj pretaj kun tasoj de kafo kaj lakto kaj sukeroj malagrabla rememorigas vin pri la unuagrada lernejo, okaze de la nomfesto de la direktoro. Mi ankaŭ ne apartenas al tiuj kiujn ĉarmas la tasko de la telegrafistoj, vidata tra unu el malplej maldiafanaj vitroj de illa pordo. Sed tiam oni havas ankoraŭ plezuron kiu longe daŭras. Tio estas la okulojn turni al sennombraj lumetoj el la stacidomo, blankaj, ruĝaj, bluj; oni povas ilin rigardadi per animo iom po-

pola, kiel la stelojn rigardis ja la paŝtistoj el Kaldeo, kaj sufiĉe da tempo oni havas por teksti fabelojn. La vico de blankaj lumetoj estas la pretendantoj de tiu blua lumeto, kiu estas princino, sed la reĝo, ŝia patro, kiu estas la ruĝa lumeto, diris ke tiu kiu volos ŝin edziniĝi devas sukcesi en tri provoj kiuj estos...

Mi rigardas la horloĝon: mankas duonhoro por alveno de nia amiko. Decas ke mi pretigu min. Mia penso ne plu disvagos. Nun mi povas jam preni la mienon de persono kiu efektive atendas alian, kaj kiun tio grave interesas. De tempo al tempo mi sondas per la rigardo la malproksimon. Per serena rigardo. Post dek minutoj mi povos ja permesi al mi unuan senpaciencaĝan geston. La afero plivigliĝas. Jen venas dek aŭ dekdu portistoj, kaj interparoladas sidante sur vagonetoj. Ili estas kvazaŭ tiuj birdoj kiuj anoncas bonan veteron. Oni aŭdas kriojn de fervojistoj malproksime, en la fervojo. Oni komprenas ke tiu vagonaro, per kiu veturas mia amiko, estas iel grava, kaj ili celas nenion maltrafi.

Oni aŭdas la sopiratan sonorilon... Kaj ne malfruas la apero de la vagonaro. Kun surprizo mia la vagonaro antaŭenpuŝas kun tro da malrapideco. Kaj tro malhele estas. Ekiras vojaĝantoj. Soldatoj kaj malgajaj proletarioj kun infanoj surdorse, kaj virinoj kiuj transportas grandajn pakojn, kaj du aŭ tri profesiaj almozuloj. Tio estas triaklasa vagonaro. Unuj foriras oscedante, aliaj maĉante rosmarenan branĉeton, kelkaj infanoj ploretas, malproksimiĝas la bastonfrapoj de blindulo.

Mia amiko ne venos. Nun tiu penso venas al mi. Tio estus tro frapanta fino por vespero en kiu, relative, pli oftaj estis la preskaŭ malvigilaj momentoj. Li estas eble maltrafinta kombinaĵon; certe mi ricevos morgaŭ matene novan telegramon dirantan ke li alvenos, simple kaj mallonge, *vespere*. Ĉiu laŭ propra ŝato.

Sed ĝuste kiam mi mallevis la kapon, kvazaŭ fulmo preterfluas min, brue malfermiĝas pordetoj, la koro premiĝas. Mi aŭdas mian nomon, mi ne scias el kie, mi volas min orienti kaj jam paro da brakoj min sufokas. Homoj fluas apud mi, terura valizfrapo ŝanceligas min, kaj tuta mia estaĵo trempas sin en grandegan, en revan infanan feliĉecon.

Trad. MARIAN SOLÀ, L. K.

HEJME EN MALVARMA VETERO

Kiel okazas en ĉio homa, estas eble ke la agrabla ŝirmiĝo en la limoj de nia kutima loĝejo, kion ni esprimas per tiu frazo *a caseta* — hejmen —, havas siajn por kaj kontraŭ. Iom aĝaj personoj asertas ke nenie oni tiel bone sidas kiel hejme: kontraŭe ŝajnas ke iuj fraŭlinoj edziniĝas por forlasi tiun dolĉegan enfermiĝon, kaj

eĉ iam mi aŭdis de familiido diri, en tramveturilo, ke li volas edziĝi ĉar li jam estas laca loĝadi en Sarrià.

Nia alkroĉiĝo al la ŝelo de etaĝo, klarigas multajn el niaj karakterizaĵoj. Ni estis personoj saĝaj, sed ankaŭ tro hejmemaj. En Barcelono, tre longe, regadis tiuj kiuj loĝas en pensionoj. Nun, estas eble ke la sporto iom ŝanĝos tion. Se ni sukcesos fariĝi samtempe hejmemaj kaj sportamantaj, ni estos tiel fortaj kiel la angloj. La hejmo sola, moligas.

Decas, tamen, konstatigi ke se iam la frazo *a caseta* logas nin, tio estas en la nuna tempo. En somero la hejmo volas sentigi nin kvazaŭ en liberaero. Sunevitiloj, kanabtolajoj, la videbla ornamaraĵo kiel eble plej forŝovita, verdaj ĉie videblaj... Ĉio-ĉi dumtage, kiam la varmo nuligas nian diskutemon, povas ŝajni akceptinda, sukcesinta. Sed, vespere, revigligataj per tranĉaĵo da akvomolono, ni deklaras ke tio estas kuvo kaj elmigras sur la imperialon de tramveturilo. Sed nun, kontraŭe, kiam malvarmas, la hejmo estas oazo plena de koketeco. Ĝi estas remburita, plena da kurtenoj, da tapiŝoj, ĉie estas komfortaj dikaĵoj, molaj densaĵoj. Brilas, per varmeta kaj gaja brilo, ĝiaj ceramikoj, ĝiaj argentajoj, ĝiaj lampoj: ĝi havas helaĵojn ruĝajn kaj malvaj kaj flavajn kaj el estingiĝanta rozkoloro. Troviĝas tie brakseĝoj kiuj englutas homon eĉ kun libro; vi nur vidas super ĝi travagi iom da cigarfumo. Serenaj, trapaŝas tre dekolitaj virinoj, kaj, en la mangoĉambro, sur tropike kuraĝa, salika tableto, — taŭga afero, ĉar tie estas la kafanĝulo, — veraj rozoj troviĝas, ne pikitaj de la prujno. La hejmo povus ja efiki kiel vitra florejo, pro sia varma atmosfero. Malvarmo ja ne ŝovas sin en tiun sorĉan ŝirmejon, kaj la hejmo metis, rikane, kiel standardon de sia venka batalo, ĉe siaj fenestroj, por ke la malvarmo ĝin vidu, sian plej subtilan riĉaĵon, delikatan aranejaĵon el punktoj.

Neniam ankoraŭ la hejmo estis tiel gaja. Oni ĝuas la saman, kolektivajn ĝojon leviĝi super la naturo, rideti kontraŭ la grizaj kaj plataj ĉielo, kaj kontraŭ la sinteno de la ĝardenarboj kiuj flustras al si unu la alian tragikajn aferojn kun konvulsiaj frapoj de la nigraj branĉoj. Poste venas la egoista ĝuo: tiu kiun vi sentas kiam vi aŭdas, kuŝante sur lito, ventegon, aŭ kiam vi vidas neĝon mangante oranĝon apud tablo kie violoj diskuŝas. Sed mi precipe estas kontenta de mia ĝojo, kiu ja estas ia vanta ĝojo. Familiestro devas celi — por la prestiĝo de sia aŭtoritato — ŝajnigi iajn legendajn heroajn meritojn. Mi, do, alvenas hejmen malfrue. Jam de la kuirrejo estas anoncote al ceteraj dompartoj ke la ŝtofo en la galerio pendantaj estas tute rigidigitaj. Rigardi el la balkono la stratlanternojn, nur tio, frostigas. Ĉiu scias, krome, ke mia plej ŝatata vojo por hejmenveno, devigas min al trairo de placo kie libera vento vipas dorson kaj krurojn kvazaŭ marfrapo, kaj de mallarĝa strato, kie la tropremata vento vin pikas kvazaŭ lanco. Mi alvenas, do, kaj ĉiu riproĉas min ĉar mi malfruis kaj ankoraŭ en tiel frosta

tago. Sed funde ili ne ripročas min. Funde de sia koro ili min admiras. Ili scias ke malfrui estas viraĵo, grava fakto, de nekorekta idealismo. Kaj plie, nun kiam frostas, plilongigita foresto vestas min per la prestiĝo de polusa esploranto. Mi estas homo ne timanta la blovojn de la mallumo, plenajn de kaŝataj pneŭmonioj; mi estas la brava junulo malŝatanta la kolŝirmilon, kiu, kaŝante niajn nazojn, donas al ni en tiu tempo, kiam oni incensas per la naztruoj, vilaĝanan aspekton de formiko-nestoj; mia silueto elreliefiĝus alte kaj trafe antaŭ la fono de iceberg. Mia familio, alpremiĝanta apud mi, kvazaŭ rehavanta min post grandaj danĝeroj, vekrias kiam mi, senzorge, eldiras la gradojn de la temperaturo kiujn ĵus la termometro montris, kaj malkovras en la fundo de miaj kuraĝaj okuloj mi ne scias kiajn misterajn ekbrilojn de borealaj aŭroroj.

Trad. MARIAN SOLA, L. K.

LA PUNINSTRUO

Lasu min ekpreni tiun tramveturilon kun imperialo. Mi estas kolebrbruliĝinta. Mi bezonas aeron. Ĝi ja estis bona puninstruo! Oni min ne rekapto per tio!

Oni faru servojn al bestoj! Mi, kiu karesis tiom da iluzioj kiam mi iradis kolektante miajn kvar soldojn! — Ni eliros el la vivtrenado, — mi diradis al Joakinjo — kaj ekfaros la aferojn pogranda. Mi ne konsentos ke oni suferu apud mi. Mi volos ke miaj amikoj, miaj konatuloj havu parton en mia abundeco, tuj kiam estos negociataj la terpropraĵoj kiujn la onklo heredigis al Graŭpera kaj mi. Vole-nevole mi devis travivadi vivon mizerpreman; sed de post nun ĉiuj vidos ke mi havis naturinklinon de princo.

Vere admonlaciĝis Joakinjo:

— Leono, pripensu ke en tiu-ĉi lando estas nur malnobluletaro. Neniu ekzistas kun koro tiel granda kiel ĉi. Nur ĉi rikoltos disreĝiĝojn kaj malĝojojn. Ne estas iu afero tiel dolĉa kaj tiel multe riska, kiel celi hejmoportunon.

Kaj mi... sencerba kapulo!... Nur pasis kvar tagoj, kvazaŭ mi dirus, de post kiam mi havas la aferojn en ordo: la tri kvaronojn de mia kapitalo ĉe la bankiero kaj tutan kvaronon en ludomoj, por travivadi kaj fari disdonojn. Blindigita de mia tutviva revo, ĵen mi invitadi du tagojn posemajne kelkan amikon kuntrinki kafon; ĵen fordoni sufiĉe da objektoj el la malnova salonetornamara por tombolo; ĵen pagadi tramveturilan sidlokon al ĉiuj konatuloj; ĵen starigi pension el dudek duroj jare al la vidvino-fratino de mia edzino, tiu kiu kudras por la publiko; ĵen donaci skatolon da cigaroj kontrabandaj al la notario, kiu ne estis volinta ion enspezi al mi ĉar ni estas interparencoj.

Kaj.. vidu: hodiaŭ ni intervidiĝas kun kuzo Graŭpera, kun kiu ni ambaŭpartigis la onklan heredaĵon, por difini kion ni devos fari el la tartano kaj la ĉevalo kiujn la onklo havis por iradi al la vinberkampoj. La fakto ke, laŭ la testamento, ili apartenas al ni ambaŭ, implikis unu kaj alian ĉar neniu el ambaŭ povis disponi je ili laŭplaĉe; kaj mi pensis ke ni povos tion solvi tute bonakorde.

Graŭpera aĉetis kulturajn terpecojn, tiamaniere ke la tartano povas al li taŭgi; al mi apenaŭ iras bone ĝin pruntepeti por iri kelktage al Sankta Medi aŭ al la riverbordo de la Besòs, vespermanĝeti. La utilo kiun li povos eltiri el la tartano (tute klare mi ĝin al li diris) estas pli ol kvaroblo de tiu kiun mi atingus. Tion mi pruvis al li blanke kaj nigre; li ne havis alian rimedon ol ĝin elkonfesi.

Kaj mi, tiam, por kaŭzi frapon kiu blindigus tiun malnoblan animon, aldiris al li: — Do ĵen, kvankam vi devus proponi kvaroble pli ol tio kion mi proponus por ĝi, por tiu afero kiu por mi estas neniel taŭga kaj kiu por vi estas uzilo de unua neceseco, mi al vi faras tiun proponon: aŭ mi donos al vi tricent pesetojn kaj la tartano restos mia, aŭ vi al mi donos nur kvarcent kaj ĝi restos via.

Ve, al mi, ja! Anstataŭ malfermi la buŝon antaŭ mia grandanimco, Graŭpera alnomis min ĉiel! Li diris al mi, malnobla, li diris al mi, mizeranima, li diris al mi, avara, li diris al mi, montrompa.

Sed tio estis bona leciono; tio estis puninstruo. Jes, tute efektive! Oni min ne ekkaptos plu montriĝi malavara! Ĉar vere estas tio kion diras Joakinjo: montriĝante malavara, KION ONI GAJNAS?

Trad. JOSEP VENTURA,

MIQUEL DE PALOL

(1885)

Bibliografio.—Poezio: Roses; Poemes de tarda. Teatro: Senyoreta enigma.

SCHERZO

...Pri tiu kis' bongusta, ŝtelita kun kuraĝ'
kiam en la rigardoj ekfloradas admir' ,
en la moment' plej juna de nia juna aĝ' ,
kiam nian solecon trapasas rev-dezir' ,

neniam, ho knabinoj, forflugos la memor' !
ĉar ĝi vivos kun vi dum tuta vivo via,
ĝi brilos en l' okuloj, en la vizaĝ' radia,
kaj gvidos la serenajn ĝojecon de la kor' ...!

Eĉ kiam viaj haroj blankiĝos, vivos ĝi;
eĉ se am' pli konscia viajn fruntojn ekkronus
kaj de kisoj pli noblaj diademon proponus,
tamen kiso ŝtelita ĉiam floros en vi.

Ĝi havos la ŝatindan volupton de sekret' ;
ĝi estos rev' subtila pri ĝuo la plej bela;
kaj vi estos fieraj je l' estinta kiset'
kvazaŭ en via kor' vivadus lumo stela.

Malĝoja estos tiu, ĉe kiu plu ne restos
pri tia ŝtela kiso la ĝojiga memor' ...
Mi diros: la feliĉo al ŝi plena ne estos,
nek ridos ŝiaj lipoj, en atendo de l' mort' l...

GEEDZIGO

Ora vesper' kaj horizont' radia;
saltas ĉevaloj en herbej' sen fin'.
En plenliber', kun emocio dia,
du junaj gepaŝtistoj ligis sin.

Flugis en tiu sunsubira horo
arom' de geedziĝo tra l' aer',
kaj la brutar'—jen friso de amforo—
ekscite kapresaltis en liber'.

L' edzino, kies karn' forte ricevis
la sanktoleon de la aminklinoj,
de l' edzaj brakoj ĝoje sin eklevis;

kaj pensis ŝi, revante ja mirbelojn,
ĉu akuŝos kentaŭrojn ĉevalinoj
kaj la pomarboj fruktedonos stelojn...?

JOSEP MARIA LÓPEZ-PICÓ

(1886)

Bibliografio: Intermezzo galant (1910); Turment-Froment (1910); Poemes del Port (1911); Poemet de la germana imaginària (1911); Amor senyor (1912); Espectacles i mitologia (1913); Epigrammata (1914); L'ofrena (1915); Paraules (1916); L'infantament meravellós de Schaharazada (1917); Cants i allegories (1917); L'instant, les noces i el càntic serè (1918); Les absències paternals (1919); El meu pare i jo (1920); El retorn (1921); Popularitats (1922); Les ensenyances del món (1923); Elegia (1924).

VIA RIDO KANTA

(Muziko de Armand Fluvià)

Via rido kanta
kiel ŝprucigil',
kun arĝenta bril'
fluas radianta.

Akvofal' sonanta
kiel sonoril',
fluas en trankvil'
via rido kanta.

Ho, se rido via
estus font' magia
por mia soif'!

Unu guto sola
estus ĝoj' konsola
por la tuta viv'.

JOSEP MARIA LÓPEZ-PICÓ

355

MI ENVIAS JE L' MATEN'

(Muziko de Armand Fluvià)

Mi envias je l' maten'
ĉar ĝi kisas vin serena,
rozo rozeto matena
de ros' plena.

Mi envias je l' maten'
ĉar ĝi viajn harojn tenas;

mi envias je l' maten'
ĉar ĝi viajn kisojn prenas;

mi envias je l' maten':
vian amon ĝi divenas.

Mi envias je l' maten'
kiu scias vin amplena,
rozo kun roso matena,
roz' serena.

PLEZURO EN LA HAVENO

Vir' kun grizaj okuloj, plenaj de nordnebul' ,
elsuĉadis oranĝon en haveno-angul'

Lia rigard' al mi: — Kia sungusto! — diris.
Kaj de liaj okuloj la nebulo foriris.

AGUSTÍ CALVET (GAZIEL)

(1887)

Bibliografio: Sentiment (novelo); Hores del Viatger Espiritual.

NOVA VOJAGO SENTIMENTALA ANKAŬ NOMITA LA APOLOGIO DE KATALUNUJO

PROLOGO

Vojaĝante tra la mondo, en tero de Francujo kaj malfrunkte, je la alveno en stacio facile forgesbla, kredante trovi dolĉan ripozon, la Vojaĝanto konsideris vagonŝanĝon kiel eblan plibonigon.

Etendita tra la dezerta kajo, griza pro la polvo de la kamparoj kaj malseka pro la nokta nebulo, kun la fenestroj fermitaj, estingitaj la lampoj, la vagonaro ripozadis. La Vojaĝanto, kun la lankovrilo sur ŝultro, eniris silente en la internon de nova vagono. Briladis en la duonlumo la randoj de la lakitaĵoj, la malvarmeco de la vitroj kaj la orumita varmeto de la metalaj vejnoj, tra kiuj la varmiganta akvo cirkulas senbrue.

Ĉar alproksimiĝadis la paska libertempo, la vagonaro estis plena de lacaj kaj malgajaj personoj, nostalgie pensantaj pri la hejma dormoĉambro. Sed unu el la kupeoj estis okupata nur de du pasaĝeroj. Dankinte la ĉielon, la Vojaĝanto sin instalis tie.

Jen, do, ni havas jam pretaj la scenejon kaj la ĉefajn komparsojn de tiu ĉi granda historio. La vagono en la duonlumo. La Vojaĝanto, vizaĝe al la lokomotivo, sidante libere, komforte, tute laŭdezire. Antaŭ li, apud la fenestro, maljuna oficiro de la Franca armeo; ĉe la alia ekstremo, apud la koridoro, mezaĝa Monsinjoro, (1) de bela kaj nobla aspekto. Inter ĉiuj tri restas ankoraŭ, tute enigma, la spaco okupota de la veraj protagonistoj de la grava agado kiu nun prepariĝas. Kaj super ĉio, nevidebla sed reganta, —kiel dum la tagoj de la nostalgianta Grekujo—la serena mano de la Destino, malvolvante senkompate la fortan fadenvolvajon de la Tempo, kiu neniam rompiĝas.

Ĉar la protagonistoj alvenos post nelonge kaj nenio estas farota

(1) Ĉefpastro.

nun, dum la vagonaro ripozas ni povas atente rigardi la mutajn kaj senmovajn figurojn de la komparsoj. Pri tiu de la Vojaĝanto, tamen, nenio estos dirata, ĉar la tradicia modesteco de la bonaj aŭtoroj devigas lin, por ke li ŝajnu tia, lasi sin mem en la ombro. Nu, komencante per la maljuna oficiro de la Franca armeo, vi vidos tuj, ke, en la senmovo kaj rigideco de lia figuro, la agla profilo de la nazo, daŭrigata vertikala linio per la akuta harfasko de la barbo, estas tranĉata krucforme, horizontale, per la flankoj grizaj, molaj, abundaj, de la lipharo severa. La okuloj, estingitaj kaj fermitaj, dormetas en la fundo de la ombraj kavoj. Rigardu kian mildecon kaj energion havas lia korpo rigida, malgrasa. La manoj, maldikaj kaj fortaj. Kaj la ruĝa ĉapo apude, kun branĉoj kaj palmoj el oro malnova.

Sed diru al mi ĉu tiu belaspekta monsinjoro ne estas ankoraŭ pli malfacile observebla, kun tiaj okuloj klaraj kaj brilantaj, kiuj eltenas vian rigardon neperturbeble, kun grandsinjora arroganteco. Strabe lin rigardante, oni vidas, tamen, ke li estas tre muskola, alta kaj fortika kaj ke li havas la altkvalitan alkutimiĝon interparoli kun altrangaj sinjorinoj. Kaj diru ĉu vi ne miras je tiu lia glora kapo el pompa delikateco, la frunto kiel spegulo, roze kaj cindre nuanca la koloro, liaj lipoj ondantaj pro la melodia parolado, kaj tiuj longaj bukloj glitantaj sur la ŝultro.

Estas necese diri—por la plej bona kompreno kaj grandiozeco de tiu ĉi eksterordinara historio—ke tiajn du personojn vi devas konsideri, de nun, kiel simbolojn. Imagu ke tiu maljuna oficiro povus esti la revata heroo, kiu, laŭ ĉiaj antaŭdiroj, estas alkondukonta al la venko, en proksima tago, la novan junularon de Francujo. Estas vero ke li ne havas la potencan korpan strukturon, nek la grasan abundecon de iu Napoleona marŝalo; sed ankaŭ, tute certe, lia severa figuro ne aspektus malbele, rajdanta sur ĉevalo, sub la Arko de la Stelo kaj enirante Parizon tra la Eliseaj Kampoj, post la kaleŝo de la princo de Orleans. Aliflanke, tiu ĝentila monsinjoro eble estas kiu denove alportos la pacon al la Franca eklezio. Eĉ lia figuro havas tiun simplan kaj serenajn majestecon de la statuo de Bossuet, ĉe la nordokcidenta flanko de la "Fontaine des Quatre Evêques", en la placo Saint-Sulpice.

Se tiaj estas la komparsoj, kiaj estos la ĉefaj ludantoj? Mi devas konfesi, ke, dum la vagonaro ripozadis, laŭlonge de la soleca kajo, la Vojaĝanto, nesciante la gravajn okazontaĵojn amasiĝantajn super nia vagono, ne multe atentis ja tiujn du simbolojn de Francujo. Kaj mi ankoraŭ memoras, ke la lasta ago de lia cerbo estis, antaŭ ol senti super la kapo la pezan manon de la Destino, kompari dolĉe, sub la faldoj de la lankovrilo, la absolutan, adorindan ripozon en tiu eŭropa vagonaro, je la terura bruo de liaj libertempaj tagoj tra la suda Hispanujo, en vagonoj malkomfortaj, tumultoplenaj, kie la gitaroj zumadis unutonaj, la tutan nokton, sub la dolĉega plenluno de Aprilo.

Jus je la forveturo de la vagonaro ekdisvolviĝas tiu ĉi granda historio. Nun ni alvenas al la unua akto. La tri sonoradoj estas faritaj kaj la kurteno levigōs. Tial la aŭtoro preĝas al la ĉiopovaj dioj, kiel estas dece, ke ili bonvolu helpi lin en la rakontado de tiu ĉi Nova Vojaĝo Sentimentala, ankaŭ nomita La Apologio de Katalunujo.

AKTO UNUA

La pordo de la koridoro malfermiĝis subite kaj aperis, kiel fantomo en la ombro, viro ne alta, kovrita per polvŝirmilo. Tiu-ĉi estas (kaj pardonu la ripetadon, kiun la kutimo pravigis) la unua protagonisto. Li enrigardis malrapide kaj poste foriris. Sed li revenis, kaj ĉi tiun fojon li retiris la kurtenon de la lanterno pendanta en la plafono. La sceno plene lumiĝis kaj ni rigardis unuj la aliajn. Post la viro noveveninta, eniris ankaŭ, kiel en familio, sinjorino nigrevestita, malgraseta knabo kaj juna servistino, ĉiuj kovrataj per la neoportuna polvŝirmilo, ĉar la nokto estis pluva kaj malvarma.

Kun takta, solena gesto, tute sen vortoj, la kvar ĵusalvenintoj plenigadis metode sen atento pri ni estantaj malsupre, la malplenaĵajn retbretojn. Ili alportis skatolojn, kestojn, valizojn, bastonojn, pluvombrelojn kaj, krome, ian grandegan paperkornon, en formo de piramido, kiun la juna servistino, meze de ĝenerala mirego, metis sur breton, super la majestecan kapon de monsinjoro, dum siaj kunuloj rigardis ŝin agi emocie kaj korpeme.

Pli poste, kiam la intereso de la rakonto tion postulos, estos farata la detala priskribo de tiuj ĉi novaj pasaĝeroj. Nun ne povas esti; ĉar la viro estingis denove la grandan lanternon, kaj li kaj la sinjorino ripozas, iom nekomforte, inter la maljuna oficiro kaj monsinjoro. La malgrasa knabeto kaj la juna servistino sidas apud la Vojaĝanto, kiu rigardas ilin kun sekreta malamikeco.

La vagonaro rapidas tra la kamparo kaj la nokto estas pli malluma kaj peza. La tri vojaĝantoj de antaŭe, tre ĉagrenitaj, rezignis je sia dormado. La maljuna oficiro kovras nun per la ĉapo sian palan vizaĝon, kvazaŭ ne volante rimarki la sekvojn de la bedaŭrinda invado. La bona monsinjoro, timeme rigardante la paperkornon balanciĝantan super li, primeditas kun ĝojo, ĉar li kredas kaj havas esperon, la nestaremecon de la homaj aferoj. Kaj la kompatinda Vojaĝanto, kiu tiel ĝojis pro sia feliĉa ŝanĝo, nun kredas terure je la malbonsorto, kaj, rigardante la enirintojn, komencas demandi al si: Kiu estas, de kie venas kaj kien diable iras, en malfruaj horoj de pluva nokto, tiuj kvar silentaj fantomoj, kun siaj ridindaj vestoj, de polvo kaj somero? Estas evidente ke tiuj kvar ne estas francoj. Pli eble, tiuj personoj estas el time-ma aŭ soleca karaktero, sed faranta sian volon. Kaj dum li diris tion al si, la Vojaĝanto vidis ilin ĉiujn rigardantajn, en la mallumo

kaj strabe, la bonan monsinjoron kaj la maljunan oficiron, kaj rimarkigis ke, post ol rigardi, ili meditis. Sed en la fundo de la okuloj ili montris grandan bonecon; kaj la sinjorino nigrevestita kaj la juna servistino havis tiel mildan mienon de honesteco kaj tiel pacan gracion, ke la Vojaĝanto ekdeziris koni ilian landon.

Tiam estis kiam la sinjorino krucsignis sin, tre malrapide, kaj la knabo kaj la servistino ŝin akompanis. Kaj la sinjorino diris, tiele, kvazaŭ ŝi troviĝus ĉe ni:

—Sanktan nokton.—

Kaj flustris la servistino, kun granda dolĉeco:

—Sanktan nokton havu ĉiuj.—

La oficiro kaj monsinjoro eĉ ne aŭdis ilin. Sed la Vojaĝanto eligis profundan sopiron, por penetrigi en sian animon tiun senkomparan voĉon de nia frateco. Jen la dolĉa Katalunujo, en plena nokto, tra la koro de Francujo!...

La aŭtoro opinias ke tiu ĉi momento estas tiel bela, ke per ĝi devas finiĝi la unua akto. La sceno estas definitive starigata. La terminoj de la problemo estas prezentitaj. Kvar katalunoj iras tra la mondo, noktomeze, inter la du vivantaj simboloj de la plej pura, delikata kaj nobla tradicio de Francujo. Alia kataluno, kaŝita, alivestita, sekvas—kun la animo pendanta de faden—la agadon de la protagonistoj. Kaj nun estus konvena, por fini per grandioza maniero, la plena voĉo de la Wagner'aj trumpetoj demandanta la Destinon:

Kio okazos?...

La respondo estos la celo kaj la ĝojo de la akto dua, kiu komenĉiĝos, akurate, je la unuaj horoj frumatene. Sed, por se iu trovus necese kompletigi tiun unuan parton de nia bela historio per la priskribo de la kvietaj horoj kiuj mankas ĝis la tagiĝo, la Vojaĝanto diros, ke, dum ĉiuj aliaj maldormis ĝene, embarasataj kaj palaj pro la laciĝo kaj sendormo, la sola kiu dormiĝis en profunda paco estis la kataluno de la polvŝirmilo. Kaj ne nur dormadis por ripozo kaj balzamo de sia spirito, sed ankaŭ, por kaŭzi pli da envio al la nedormantoj, li brue spiradis de korpa ĝuo, kaj ĝemetis, kaj fandiĝis en dormon tiel bonan, kvazaŭ estus en plena somero, ĉe ni, kiam zumas la cikadoj kaj la okuloj fermiĝas malrapide en la dolĉa ombro de la pajlejo.

AKTO DUA

La akurateco estas tute ŝatinda duonvirto. Tial la aŭtoro, homo akurata, reprenas sian belan sentimentalan historion ĵus kiam, el la fundo de la horizonto, ekfloris pala naskiĝanta klareco, super la vasta paco de la tero dormiĝinta.

Povus okazi, afabla leganto, ke — post la esperoj kiujn al vi mi ekvidigis — la historio de mi rakontita ŝajnus al vi banala. Sed se via saĝeco scias grati sub la maldikan ŝelon de la eksterŝajnoj,

ĝi certe trovos la agrablan molajon de diskreta instruo. Kaj, ĉiukaze, bonvolu kulpigi la Destinon pri la negravaĵoj de mi rakontataj. Ĉar mi estas la skribanto kaj ĝi la tirano kiu diktas.

La tagiĝo, amata de Homero, kovris la vizaĝojn per pala fosoreska koloro. Ĉiuj, fine, estis ekdormiĝintaj. La lampo estingiĝadis kaj la oleo, verda kaj densa kiel likvoro, briladis en la fundo de la sfero, en kiu rebrilis per oraj kaj rozaj nuancoj, kiel miniaturoj, la forglitantaj bordoj kaj la ombroj de la forkurantaj aĵoj. Ekstere, perle briladis ĉe la vitroj la grizeco de l' mateno kaj tio igis pli dolĉa la varmeton de la vagono. Tago nova, animo laca, horo profunda.

Sed atendante ke la dormantoj vekigu, vi ja povas diri, leganto — vi, kiu amas la spektaklon de la kampoj kaj la akvoj kaj la ĉieloj nepenetreblaj, ĉar vi havas en la koro guton de la viruso de Rousseau kaj estis, feliĉe aŭ malfeliĉe, samtempulo de l' impresionismo — vi ja povos diri al mi ĉu ne estas ja admirinda, en tiu matena horo, la gracia abundeco de Francujo.

Rigardu, ekzemple, je la dekstra flanko, tiujn lumoplenajn ulmojn, tiel klarajn, vice starantajn en la malproksimo, kronitajn per griza aro da kolomboj. Kaj maldekstre la malnovan farmodomon, el ruĝkolora tegmento, kun la ĉaroj apud la pordo, sub la ombro de la arboj. En tiu malgranda ĉambro rigardanta okcidenten, kiam estis dek-kvinjara kaj ellitiĝis je tagiĝo por iri al siaj aĉetoj, faris sian tualeton, sub la lumo de la fuma lampo, Mme. Bovary. Sed rigardu, ankaŭ, tiun senliman verdecon de la semitaj kampoj, kiun la spiro de la nevidebla rivero malheligas per freŝa fumvualo. La kanejoj, zumantaj kaŝite en la malseka ombro de la torentoj, faras bruon akran kaj sonorant kiel sovaĝaj flutoj. La frumatena venteto estas freŝa kiel roso. Tero glata, tero fruktodona, tero milda. Kaj super ĝi la ĉielo, ne kun la alta delikateco de la ĉielo de Italujo, nek kun la seka kaj profunda brilo de Kastilujo, nek kun la trankvila paco de nia lando, sed pli apudtera kaj nebula, kaj tamen delikata kiel silko.

En nian vagonon, meze de plena silento, la sunleviĝo penetrigis, iom post iom, helan lumradion. La figuro de monsinjoro iĝis orita. La bukoj el arĝento briladis sur la ŝtrumpo silka kaj klara. La vestaĵo, tre pura. La kapo, aŭreolita kiel suno.

La luma franĝo leviĝadis. Super la kapo de monsinjoro, la granda paperkorno de la katalunoj, banita en la taga klareco, iĝis mistere diafana. La suno ĝin transpasis per oraj sagoj. Tiam aŭdiĝis el ĝia interno malforta brueto, kiel tiu de plumfasko. Kaj kanto de birdo elŝprucis tre pura, en tiu pacoplena horo, kun ĝojo intima kaj serena. Ĉiu ekvekiĝis, turnante supren la okulojn, kaj kun mano ĉe la koro. La maljuna oficiro rigardadis surprize la Vojaĝanton, kaj la Vojaĝanto rigardadis kun surprizo la bonan monsinjoron. Poste ĉiuj ridetis, ĉar la birdo bele trilis kaj neniu atendis tiun bonan-tagon.

Tiam la sinjorino nigrevestita, kiu estis el la ĉirkaŭaĵoj de Girona, diris tiel al la juna servistino:

— Knabino, vi devus ŝanĝi la akvon al la kardelo kaj aranĝi ĝian manĝaĵon.

Katalumujo venkis je la unua batalo. Por mallevi la grandan paperkornon, la bona monsinjoro stariĝis, kaj lasis lokon. Malkovrinte la kaĝon simple plektitan el kanoj ili ne sciis kion fari el la paperkorno. Sed la maljuna oficiro prenis ĝin inter la manojn kaj ridetis feliĉa kaj silentis. Kaj la Vojaĝanto, kiu ankaŭ volis partopreni la feston, havis la ĝojon teni per siaj mallertaj fingroj la malgrandetan vitran trinkvazon, kiam la juna servistino, kliniĝante al la fenestro, aranĝis la manĝaĵon.

Jam prizorginte la kardelon, la sinjorino, la infano kaj la knabino, kunigitaj ĉirkaŭ la patro severa, matenmanĝetis panon kaj ĉokoladon. La sinjorino uzis ankoraŭ ian reton, ĉe la kombajo, kiel en forpasintaj tempoj. Ŝia vizaĝo estis kvieta kaj fidela. La servistino humile mallevis la okulojn. La knabo strabe alrigardis la maljunan oficiron. Kruĉeto el lado, kun klara akvo, pasis de mano en manon. La tri spektatoroj, logitaj de tioma simpleco, rigardadis silente.

Ĉu vi scias de kie venis ĵbona Dio! la kvar katalunoj kun la gaja kardelo?... Tiu severa viro kun kapo ronda, grizaj kaj hirtaj haroj, frunto mallarĝa kaj ruza, rigardo senbrila sed saĝoplena, tiu ĉi viro razita kaj modesta, kiun vi vidas kontraŭ vi, vendadas lignon, feron, teksaĵojn, ŝtonojn kaj korkon dum ĉiuj tagoj de la jaro. Tiu viro naskiĝis apud Tossa, en la hejmo de mizera lignaĵisto. Hodiaŭ, post kvindek jaroj da batalo tage kaj nokte, tiu viro havas vastajn magazenojn kaj loĝas en Barcelono. Lia knabo naskiĝis jam en la granda ĉefurbo kaj klinos sin, eble, al la advokateco. Tiu viro, je sia dek-kvinjara aĝo, falis mezen de Londono, kiel en mezon de dezerto. Sekve de tia falo, tiu viro konas la komercon en ses lingvoj, la malsaton, la malvarmon kaj la nigran mizeron. Tiu viro komencis labori je sia propra profito en la jaro 1887. Ses tagojn semajne li laboradis ĉe la strato Moles, sen aero kaj sen lumo. Ĉiun festotagon li supreniris al la monto Montjuic kaj rigardadis la senliman urbegon. "Tiomaj manmezuraĵoj da tero — li diris al si — kaj neniu estas ĉi!" Tiam li sentis densan mallumon en la fundo de l' animo; sed dum la semajno, kun la ŝvito de la laboro, ekardis en ĝi la lumeto de l' espero. Tiu viro estis honesta kaj, por ne diboĉi, baldaŭ edziĝis.

Ian dimanĉon, kondukante al Montjuic sian edzinon tiu viro ekvidis de malproksime la Universalan Ekspozicion kaj tiun legendan hotelon, kiun tie konstruadis la arkitekto Domènech. Tiu viro, tiam, timiĝis pro miro. Kaj diris al la edzino: "Edzino, ĉi tion ja ni devas vidi. Se estus en Londono aŭ Parizo, mi dirus al vi ke ne. Sed ĉi tie estas ĉe ni". Per tiel simpla maniero tiu viro eniris la socian sferon.

Kiam la aferoj marŝis pli bone, tiu viro ridadis ĝis kredo ĉe la unuaj teatroludoj de la verkoj de Pitarra. Pli poste, pro sekreta kaj neklarigebla instinkto, li abonis la ĵurnalon "La Renaskiĝo". Tiam estis kiam tiu viro prudenta, kiu ĉiam allasis la insultojn por la personoj nekalkulemaj, ian vesperon dum kantado de "Segadors" ¹ en plena Ramblo, ekkriis — Dio pardonu lin! — "nacian" blasfemon kaj poste, forkurante, ricevis bastonbaton ĉe la kruro. Tiu viro sentis naskiĝi en sia interno novan forton, kiam li legis la paroladojn de doktoro Robert. Tiu viro prenis la Orient-Eks. presan vagonaron kaj perdis bonan negocon pro la deziro esti alveninta en Barcelono la 20an de Majo 1906, okaze de la Kataluna Solidareco.

Tiu viro travojaĝis la tutan Eŭropon kaj vidis dek-dufoje la riĉegan foiron de Niĝji Novgorod. Sed li fariĝis maljuna laboranto kaj ne havis ja emon por la literaturo. Lia filo sin dediĉos al ĝi, eĉ troe. Li, nekontraŭstareble, estas de longe malamiko de ĉia afekteco. Kaj, preter ĝia praktika aŭ morala aplikado, la intelekto facile iĝas afekteco pura. Ĉar estas tiel fundamenta ĉe ni tia viro, rigardu lin sidantan, masivan kvazaŭ trunko, sekan kvazaŭ radikoj. La ekstera mondo aperas antaŭ liaj okuloj kiel vasta foiro, kie fariĝas tre malfacile vendi kaj aĉeti. Tamen li konas la sekretojn pri tio kaj tie li movas sin akre, kiel meze de batalo. Sed alie la domo kaj la hejmo estas al li mole karesaj kiel monkesto de infano. La domo fermita kaj la knaboj kaj virinoj en ĝia interno. Kaj li, dum la vesperoj, post la laboro, sidigas meze de ĉiuj, kun la frunto hela de saĝo kaj forto.

Tiu viro nun revenas el Rigo, kie li havas multe da komercaĵoj kaj kien li kondukis por dek-kvin tagoj, ĉirkaŭ la Pasko, la edzinon, la filon kaj la servistinojn kiu portas la kardelon.

—Panjo, mi soifas, — diris ĉirkaŭ la deka horo la maldika knabo.

Kaj la sinjorino nigrestita — kies nigra vesto ne montris funebrojn, sed nur, ke ŝi estas humila kaj simpla, — konsultinte la virojn de sia edzo respondis:

— Nun ne trinku, ĉar vi perdis la apetiton por la tagmanĝo. —

Je la tagmezo, monsinjoro, la oficiro kaj la Vojaĝanto eliris al la vagono-restoracio. La severa kataluno rigardadis ilian foriron per riproĉaj okuloj, kvazaŭ ili irus al diboĉejo.

Je ilia reveno en la vagono, imagu kian miron: el meze de delikataj paperoj kaj rubandoj, la katalunoj eliris rondforman "tortell". De kie estis veninta tia deserto, tiu bongusta "tortell" plena de konfitaĵo, hejma krono de la Pasko? Ĉu ĝin preparis la sinjorino mem, en Rigo, dum la libertempaj horoj, helpata de la juna servistino? Aŭ ĉu la propra Sankta Jako, patrono de la nacia bakejo, mirakle alportigis ĝin per manoj nevideblaj?...

(1) Kataluna himno.

Finita la tagmanĝo, la tagmezo estis peza kaj malhela. Nubo kaj nebuloj ruliĝis tra la ĉielo kaj la folioj de l' arboj bruidis apud la malsekaj legomkampoj... Nun preterpasas granda kaŝtanujaro kaj la tero resonas sub la densaĵo de la senfinaj branĉaroj. La ombro estas densa kaj akvosaturita kiel en la fundo de la keloj. Kaj pikitaj de la soleco, kiu maskas la dezirojn, la frenezaj hederoj preme alkroĉigas al la korpo solida de la brunaj trunkoj. Maljuna paŝtisto, kuŝanta surtere, rigardas ilin bonvola kaj serena, kvazaŭ senmorta dio... Revenante al la klara kamparo, oni blindiĝas pro la heia lumo. Tagmezo malrapida, horo peza. La animo saturiĝas de unutoneca laciĝo.

Sur la brusto de la edzo la fidela edzino ekdormiĝadis. La knabo, de la fundo de la molaj kusenoj, rigardadis la ruĝan ĉapon de la oficiro. De tio venis al li ideo; sed de tiu ideo naskiĝis forta deziro. Iom post iom li stariĝis kaj per la fingropintoj karesis la orajn palmojn ĉirkaŭantaj la ĉapon. La maljuna oficiro vidis tion. Kaj preninte la ĉapon li ĝin metis sur la kapon de la malgrasa knabo. La infano tremis de ĝojo kaj honto. Tiam la oficiro levis lin inter siajn brakojn kaj kisis lin ĉe la frunto.

Jam en la malfrua vespero, la aŭtoro sentas ke la lasta horo alproksimiĝas kaj granda melankolio invadas lian koron. Tiam, laŭ ordono de la patro, la katalunoj stariĝis. Ili prenis la kestojn, la bastonojn kaj pluvombrelojn, la valizojn, kaj la kaĝo eniĝis denove en la grandan paperkornon. Je la alveno en la proksima stacio, kie ili devis ŝanĝi je vagonaro, la kvar katalunoj de tiu ĉi bela historio adiaŭis nin. Monsinjoro kuntiriĝis por cedi la lokon al ili. Kaj la maljuna oficiro ridetis, rigardante la knabon. Ili foriris. Tra la koridoro eĉis la forta voĉo de la patro, plena de saĝo:

— Zorgu, paŝu atente. —

Kaj la bona Vojaĝanto vidis ilin unu fojon ankoraŭ, malproksimajn, sur la kajo, kovritajn per la polvŝirmilo, apudiĝintajn al la patro.

Se eble, la Vojaĝanto estus plorinta tiam. Ĉar tiel tiu vojaĝo povus esti alnomata, tute prave, sentimental. Sed, kiam la vagonaro ekmoviĝis, la maljuna oficiro, ekparolante meze de granda silento, demandis al monsinjoro, kiu lin rigardis kaj ridetis:

— De kie estas tiuj bonaj homoj?

La pastro respondis:

— Mi ne scius diri tion, sinjoro. La lingvo kiun ili parolis estas al mi nekonata. —

Tiam, ambaŭ samtempe, ili rigardis demande la bonan Vojaĝanton.

Kaj ĉi-tiu parolis:

— Tiuj homoj, kiujn vi, sinjoro oficiro, kvalifikis "bonaj" kun la konsento de monsinjoro, loĝas tiel apude de Francujo, ke eĉ oni povus diri ke ili estas ĉe vi. Tiu-ĉi estas familio de katalunoj. —

— Estas katalunoj; — ekkriis monsinjoro; — tiam ili estas hispanoj.

Kaj la Vojaĝanto respondis:

— Tute certe, monsinjoro; ili estas hispanoj. Sed... —
Kaj tie-ĉi komenciĝas La Apologio de Katalunujo.

AKTO TRIA

— Ĉu vi volas ke mi parolu pri Hispanujo, dum la vagonaro rapidas, ĉar nenion ni estas farontaj? — diris la bona Vojaĝanto, per voĉo tremanta de deziro, al la oficiro kaj monsinjoro.

Ambaŭ rigardis sin reciproke, kun dolĉa rideto. Kaj divenante la kaŭzon movantan la Vojaĝanton, ili respondis, krucigante la manojn sur la brusto:

— Parolu, sinjoro, se al vi plaĉas; parolu pri via hejmo. —

Ĉu vi ne sentis iam en la animo la profundan kaj tumultan ekremon de la elokventeco? Estas kvazaŭ spirito de dio subite penetras en vin. Lia senmorta spiro, kiel furioza vento, levigas la sentojn kiuj dormas, kvazaŭ flekseblaj junkoj, sur la vastaj ebenaĵoj de la spirito. Ĉiuj vibras kaj resonas tiam, kvazaŭ kordoj de harpo. La okuloj heliĝas de lumo de eterneco. Kaj la lipoj, ardaĵ de la parolo kiu ŝprucas vivanta, aŭdigas la voĉon de la dio kaj ĝian profundan harmonion.

Neniam dum sia vivo la Vojaĝanto estis ricevinta en la koro la dian viziton. Lia parolo, ĉiam malriĉa kaj senforta, ne povante iĝi hela kaj glora, nur provis resti ĝis tiam ĝusta kaj humila. Sed tiun tagon, vojirante tra teroj de Francujo, ĉirkaŭ la Pasko, post la spektaklo kiun al li prezentis la kvar katalunoj, li konis dum momento la sanktegan virton kortuŝi la homojn.

La maljuna oficiro kaj monsinjoro lin aŭskultadis senmove. Kaj la bona Vojaĝanto mem dum la parolado ekstimigis. La Katalunujo de niaj praaĵoj, la Katalunujo patrujo nova de niaj patroj, tiu de niaj hodiaŭaj amoj, kaj tiu vidota iam de tiuj nehavantaj ankoraŭ vivon, nek formon, nek nomon, ĉar ili dormas en la fundo de la eterneco, kiu ame ilin gardas al ni; la Katalunujo sankta, kiun Dio igu senmorta, jen ĝi pasas antaŭ la okuloj de la Vojaĝanto, entenata en milda parabolo. Kiam la Vojaĝanto rememoras tiun vizion, li falus sur la genuojn. Sed de vi ĉiuj li nur petas ke vi legu, dum horo de amo kaj kvieto, tion kio nun restas el liaj iamaj vortoj. Jen la parabolo de la bona Vojaĝanto:

— La nacioj de la tero — li komencadis, — kiujn vi vidas nun, plenaj de gloro kaj prospero aŭ falintaj en la ombro de la malŝato kaj de la sklaveco, estas kvazaŭ Gastejoj de la homaj gentoj, etenditaj laŭlonge de la senfina vojo de la Tempo.

Se la vivo estus facila kaj la daŭro de la homoj eterna, neniu estus imaginta konstrui por la siaj la Gastejojn kiujn ni vidas. Sed la morto kaj la danĝero ĉiam renoviĝantaj, kaj la forto kiu ĉiam

malpliĝas, donis al la homoj la instinkton serĉi al si rifugejon kaj la lertecon fari ĝin tiel forta, ke ĝi elportu la furion de la senindulgaj ĉieloj kaj la malutilan envion.

Sed la tasko konstrui Gastejon daŭras ĉiame. Tage kaj nokte, ĉiumomente, oni devas atenti la perfidon de la horoj kiuj paŝas nudpiede, por ne fari bruon. La laboro estas pena kaj malfacila. Kaj, jam pretigita la tuta Gastejo kaj ŝirmitaj la kampoj ĝin ĉirkaŭantaj, kiam la raso tie ripozas kaj konas la grandajn tagojn de brileco kaj starigas pliajn turojn sur la malnovaj fundamentoj, tiam estas necese atenti ke la traboj ne putriĝu kaj ke la muroj ne fendigu sub la pli malfacila pezo de prospera stato. Se la grenejoj estas tutplenaj, la keloj elverŝiĝas kaj la legomejoj kaj fruktarbaroj ĉirkaŭantaj la Gastejon dormiĝas peze sub la heleco kaj abundo de la maturaj fruktoj, tiam la gastejmastro tro fidus je la faritaj klopodoj, kaj ĉiujn tagojn li festas kaj elpretigas la manĝotablon. Sed kun la grasaodoro de la viandoj, la dolĉa frezezo de la vinoj kaj la ritmo de la dancoj kaj la ĝuado kun la karesemaj virinoj, la malforta koro de la viroj eligas iom post iom l' acidan fluidaĵon de l' egoismo. Kaj kiam oni aŭdas la bruon de la venantaj malamikoj, kiam la gastejmastro levigas el la lito por voki alarmon, ĉiuj forkuras tra la kampoj, timante sinoferon kaj morton.

Grandaj Gastejoj estas falintaj en ruinon kaj polvon, kiuj estis alitempe ĝojo por la okuloj kaj fiereco de la mondo. Aliaj ekzistas, kiuj perdis la honoron kaj gloran brilecon, vendis siajn trezorojn kaj nun vivas rememorante la virtojn de siaj praaĵoj. La malnova standardo pendas kvazaŭ morta super la malluma portalo kaj neniu kuraĝas tie enpenetri. Aliaj, ankoraŭ, perdinte la propran nomon, estas kvazaŭ servemaj farmantoj de la Gastejoj pli potencaj. Kaj aliaj eĉ ne lasis postsignon sur la tero, kaj nun iliaj filoj iras dungiĝi por peco da pano, kaj, je ilia pordfrapado, al ili oni elliberigas foje la ĉashundojn...

— Bona Dio! — ekkriis monsinjoro, rigarde al la Vojaĝanto, — kiel admirinda estas via parabolo!

— Se ĝi plaĉas al vi, — diris la Vojaĝanto, — ĝuste nun mi troviĝas en punkto, kie mi povas ĝin plilongigi.

— Agu laŭplaĉe, sinjoro, — respondis la oficiro; — ĉar plilongigante ĝin vi ne faros alion ol ĝin plibeligi.

— Se estas tiel, — daŭrigis la Vojaĝanto, — ni povas rigardi dum momento la grandajn Gastejojn kiujn ni renkontas laŭlonge de la vojo. Jen estas, ekzemple, tiu-ĉi vasta kaj gastama Gastejo de Francujo, kun la emblemoj de la ora koko super la pordo. Pardonu, monsinjoro, kaj pardonu min, mia bona oficiro. Sed, eĉ kun sia dekadenco, ĝi ne havas similulon en la mondo. La volboj de la keloj similas abatejon. La kampoj ĝin ĉirkaŭantaj brilas sub la suno la fruktojn orajn kaj purpurajn, kaj estas tiel atente zorgitaj, ke vi kredus ilin ĝardenoj. Ĉu vi aŭdas la gajan parolon elirantan

tra pordoj kaj fenestroj? Konfuza bruado foje supreniras de la mallumaj profundajoj, kie trinkas la vagantaj vendistoj kaj ĉaristoj, de malafabla animo. Estas malkvieteco de lukto kaj teruraj krioj. Sed tie, plej supre, sub la lumo gaja kaj viva de la ruĝkolora tegmento, estas legio da spiritoj kiuj laboras en silento kaj donas al la domo la brilon de eterna lumhelo.

La Gastejo de la malnova Anglujo estas griza kaj silenta kiel fortikaĵo. Sep ringoj de akvo verda kaj profunda ĝin ĉirkaŭas kaj malproksimigas de la vojo. Estas ĉe ĝiaj bordoj ia soleco dezirata kaj evitema. La kampoj de la Gastejo ekvidiĝas de malproksime, dubeverdaj sub la blanka vualo de l' nebulo. Kaj meze de la kampoj staras la domo kun cent turoj levigantaj al la ĉielo kaj perdiĝantaj en ĝin kvazaŭ pintoj solecaj kaj melankoliaj. Sed dum la vesperoj, de sur la vojo, meze de la nebulo kaj nubaro, vi vidus ke la fenestroj de la Gastejo eklumiĝas mistere. Kaj vi aŭdus interne de ĝi, en la paco de la nokto, la voĉon de la gastoj kiuj preĝas kaj kantas la Bibliion, laŭ la sonoj de harpo malrapida, estingiĝanta kvazaŭ degutejo.

Guste kontraŭ ĝi, ĉe la alia flanko de la vojo, troviĝas la Gastejo de la forta Germanujo, ĉirkaŭata de senlimaj arbaregoj. Ĉu vi aŭdas kiel resonas la kornoj de la ĉasistoj kaj la bruado de la aproj tra la sovaĝa kreskajaro? El la densa verdecado de l' foliaro eliĝas ĉe la fundo la bruna korpo de la Gastejo. Neniame estis vidita en la mondo konstruaĵo tiel forta kaj peza. Dum la tuta tago aŭdiĝas en ĝi la akra sono de la militaj trumpetoj, kiel en kazerno, la bruado de la junecaj luktoj kaj la tintado de la grandaj vazoj argilaj ŝvitantaj la freŝan bieron. Sed, nokte, kiam ĉio estiĝas kaj brilas en la aero la stelaj lumoj, sonoras grandega orkestro ĉe la dormiĝinta arbaro kaj la koro dronas en ondegono de harmonio, kiu ruliĝas kaj vastiĝas kvazaŭ fluabunda rivero.

Ĉi-tiuj tri estas la plej grandaj Gastejoj de tiu peco da vojo kiun ni nomas Eŭropo. Interne de ili la traŭranto ĉiam trovas fajran varmon kaj bonan ripozon por lin serenigi. Kaj ĉiuj homaj elpensitaĵoj estas tie ekspozitaj. Aliaj Gastejoj estas ankoraŭ, vastaj kaj komfortaj. Sed estas necese preterpasi ilin por alveni en la koron de la parabolo.

For sur la vojo, la lumo iĝas malpli abunda, la krutaĵoj pli oftaj. Ĉi tie jam estas mallume kvazaŭ ni tuŝus la ekstremon de la mondo. La malseka vento de la soleco iĝas la mallumon pli densa. Kaj la tero de la ĉirkaŭaĵoj estas senfrukta, kvazaŭ ĝi estus malbenita de l' Sinjoro. Sed, bona Dio, jen meze de la mallumo kaj la polvo estas iu kiu parolas en sonĝoj. Rigardu. Ni estas ĝuste kontraŭ la Gastejo de Kastilujo. Vidu ĝin elfalintan apud la vojon, kun la aspekto de malgaja ruino. Anstataŭ "Gastejo", oni legas "Venta" de Kastilujo.

Ĉi-tio signifas, ke ni ne eniru tien; ĉar ne estos viando, nek fajro, nek bona lito, nek la konversacio kiu logas la homojn, sed

malĝoja kaj terura soleco, inter kvar muroj saviĝintaj el forbruliĝo, sub la ŝtala brileco de la steloj.

Ĉu vi konas, eble, la historion de tiu malnova Gastejo? Antaŭe ĝi estis forta kaj altestara, malmola kvazaŭ viva roko. Sed ĝiaj gastoj—kiuj neniam atentis pri la signoj de la Tempo—starigis ĝin, malfeliĉe, ĉe la mezo mem de la vojo. En tiu tempo, la peco da vojo kiun ni nomas Eŭropo ne estis ankoraŭ tute pretigita. Kaj la Gastejo de Kastilujo atingis en sia regado vastegajn terojn. Sed la senfina vojo de la Tempo antaŭeniradis senĉese kaj ĉiuj aliaj Gastejoj lasis ĝin pasi. Kiam la Tempo alvenis ĉi-tien, ĉirkaŭata de sia timeginda armeo el centjaraj laboristoj, ĝi vidis ke la Gastejo de Kastilujo baras al ĝi la vojon. "He! bonaj homoj,—diris la Tempo antaŭ la pordoj;—deflankiĝu iomete, bonvolu, ĉar mi devas pasi". Neniu respondis. Tiam la Tempo, kiu ne povas halti, ordonis al unu el la siaj ke li forte frapu la pordon per hakilo. En la supra parto, sub la grenejo, tiam ekaperis la malgrasa kaj osta figuro de viro, armita de kapo ĝis piedoj. "Kion vi volas?", li demandis per akra voĉo. "Bona homo,—diris la Tempo;—eble vi jam scias ke mi devas pasi tra ĉi-tie. Mi volus, do, ke vi iom deflankiĝu, vi kaj la domo via". Ĉe la fundo de la malplena kasko, la okuloj de la Gastejmastero brilis kiel fajreroj. "Mi scias nenion,—li diris.—Kaj kiu estas vi, malgentilulo, por veni tien-ĉi trakti min "bona homo" kaj "domo" mian Gastejon, kvazaŭ vi estus iu apud mi?". La bona maljunulo, la Tempo kun barbo arĝentita kiel l' akvo de la neĝoj, ridetis bonkore, rigardante lin per la klaraj kaj misteraj okuloj. "Mi estas la Tempo", li diris al li tre dolĉe. Tiam la mastro de la Gastejo de Kastilujo eljetis ĉi-tiujn memorindajn vortojn: "Mi ne konas vin, nek mi volas!"

Kaj li malaperis.

La Tempo, sklavo de la Destino, ordonis tuj ke oni detruu kaj disfalu la Gastejon. Ĉar la Gastejo estis fama, ĉiuj gentoj el la ĉirkaŭaĵoj eliris rigardi tion. La armeo de la Tempo estas nekalkuleble multenombra. La generaloj estas la jaroj, kiuj surportas ĉirkaŭ la kapo ian Sunan kronon. Ĉiu el ili havas dekdu kapitanojn lin servantajn, kiuj portas la galonojn arĝentitaj kiel la Luna klareco. La granda korpuso de la armeo konsistas el la Horoj, rapidaj kaj flugilhavaj, kiuj elglitas kaj forflugas sen ia bruado. Kaj ĝi havas fine la malbonfaran legion de la insektoj, la Minutoj sennombraj, kiuj mordetas per dentoj kvazaŭ dornoj la koron de la homoj.

Je la unuaj pordofrapoj, la loĝantoj de la Gastejo eliris defendi ĝin plenatente. La milito komenciĝis sange kaj fajre. La muregoj el viva roko ekfendiĝis; la tegmentoj ekbruliĝis. Kiam oni vidis ke la Gastejo jam ne povas saviĝi, tiam okazis terura tragedio. La najbaroj de la ĉirkaŭaĵoj, logitaj de la envio kaj deziro je la trezoroj, almetis sin ĉe la flankon de la armeo de la Tempo.

Sola kontraŭ la tuta mondo, la Gastejo de Kastilujo faladis iom post iom, ŝtonon post ŝtono, firma kaj persista. "Kapitulacu, — kriadis de tempo al tempo iu pia voĉo; — la batalo estas senutila. Kapitulacu, kaj, kolektante la restaĵojn de via grandeco, vi povos ankoraŭ konstrui novan Gastejon apud la vojo fiksita de la Destino". Sed la Gastejmastro, flava de furiozo kaj tremanta de malamo, respondis el la supra parto, meze de tordiĝantaj flamoj, fajreroj de falantaj traboj kaj turniĝado de sufokanta fumo: "Neniam, neniam! Mi kapitulacas neniam!". Kaj tiele mortis la brileco de la Gastejo de Kastilujo.

Hodiaŭ la vojo de la Tempo estas elpretigita kaj libera. La trezoroj konservataj de la Gastejo distribuiĝis unu post unu tra la najbaraj teroj. Kaj tio restanta el la iama gloro estas tiuj nigriĝintaj ruboj, kun la nobla standardo pendanta, sen aero, sen viando, sen ardanta fajro, sen lito, sen ripozo, sen konsolo. Kaj la kompatinda Gastejmastro, kiu loĝas meze de l' ruinaĵoj, kiam li sentas malvarmon kaj rememoras la bonajn tempojn forpasintajn, tiam li kovras sin per la malnova armajo tiel troampleksa, kaj li revas, revas...

— Silentu, sinjoro, — ekkriis la oficiro. — Via parabolo estas tiel fidela kaj forta, ke ĝi sentigas al mi ĉe la koro la teruron je la Destino.

— Sed, kie vi lasis vian Katalunujon? — demandis ridetante monsinjoro, kiu deziregis aŭdi pri ĝi.

— Nun venas, monsinjoro, nun venas. Ĉar ĝi estas tiel dolĉa kaj bela, ke por ĝi mi gardis, intence, la koron de mia parabolo.

Kiam tra la mondo, nuntempe, oni aŭdas pri la ruino de la Gastejo de Kastilujo — reprenis la Vojaĝanto, — oni imagas la malnovan apanaĝon de Iberio nedividita, tute kovrita sub la polvo de la ĉagrenaj cindroj. Sed, vi, monsinjoro, kaj vi ankaŭ, mia bona oficiro, ne kredu ĝin tiel.

Kion havas el Kastilujo ĉi-tiuj bonaj katalunoj kiujn ni vidis ĉi-tie kun ni? Kaj se ili havas nenion el ĝi, do kion el ĝi havas la tero nutranta ilin?... Rigardu ĝin, nerifuzema kaj ama, ĉe la flanko de Oriento kie resonas la mara voĉo. La patra domo ne estas ja falinta inter la ruinojn, sed male ĝi leviĝas blanka de kalko kaj orita de la tutjara suno. La arko de la pordo estas firma kaj solida kiel romana verko. Kaj antaŭ ĝi staras granda aro da juglandarboj kie trilas la merloj. Ĉe la unua etaĝo, balkono kun fera balustrado kaj planko el koloraj brikoj. Super la balkono estas la sunhorloĝo. Kaj pli supre ankoraŭ, la malfermita buŝo de la subtegmento, kiu elspiras la varmetan bonodoron de la grenejo. Supre de ĉio, la mildaj tegmentoj ŝirmas la hirusdajn nestojn, kiuj gracie prenas. Oriente, troviĝas korto el rondaj arkadoj, ornamita de sunfloroj kaj diantoj. Post la domo, la ora pajlejo ĉirkaŭata de kortbirdaro. Kaj sude, alkruciĝinta al la domo, retordita kaj sin alprema, abundoriĉa, plena de sul-

fura pulvoro, la verdeco, la freŝo kaj la pompo de senmorta vinberarbo.

Vespere, venante de la fundo de Oriento, de tie kie la malsupraj teroj eniĝas en la ŝipokovritan maron, trakuras tutan tiun-ĉi landon nian la freŝa marventeto. Kaj la ombroj falas serene sur ĝin el la rokaroj kie brilas la akraj helecoj de la neĝoj.

Lando dolĉa, lando kaŝita, lando karesema. Preskaŭ neniu konas vin laŭ via propra nomo. Ĉar la patra domo, solida kaj forta, aperas antaŭ la mondo kiel peco de la imperio de cindro kaj ĉagreno de la kaduka Hispanujo. Sed la primitivaj kaj severaj virtoj en vi koviĝantaj donis al vi forton. Vi ne havas ja la luksan elegantecon kiu ravas, nek la ĝojon kiu malplugas la ĉagrenojn, nek mienon imponan de purega tradicio, nek prosperon timigan, nek riĉecon vekantan la envion. Sed en via koro, kia kvieto! Ĉar tio estas vi: forto kaj kvieto, Katalunujo.

Mi deziras, monsinjoro, kaj mi petas vin, mia bona oficiro, ke vi neniel ridu pri tio kion mi diros. Estas ĉe ni, en nia lando, ia speco de homoj, kiujn, se vi ilin konus, vi eble ne tute priatentus, kaj se vi aŭdus ilin vi dirus ke ili estas vizuiloj. Sed la fido kiun ili portas en si estas tiel fortika, tiel firma, ke se Dio volas ke ĝi daŭru kvin generaciojn, ĝi aliigos la aspekton de Iberio. Tia speco de homoj estas elirinta el nia malnova Gastejo. Tia speco de homoj estas naskita ĉe la koro de la raso de tiu bona kataluno kiun ni ĵus havis kun ni. Tia speco de homoj, tia gento havas la kuraĝon — mi petas al vi pardonon — starigi novan Gastejon kaj planti ĝin apud la vojo de la Tempo, **POR KE TIE DISVOLVIGU IMPERIO MEZE DE LA IMPERIOJ...**

— Sed, kiaj estas tiuj mirindaj homoj? — demandis ĉe tiu punkto la bona monsinjoro. Kaj la Vojaĝanto respondis:

— Kiel mi klarigos tion al vi, sinjoro?... Tiuj homoj amataj, tiu gento mia, ĉar mi estas tute ilia, estas ankoraŭ, neeviteble, iomete konfuza, laboranta senlibere sub tero, stariganta fundamentojn sur la viva roko.

Lasu min ridi, permesu, pri iuj vortoj, kiujn nun mi memoras. Ĝi estas dirinta lasttempe, ke, en la pena konfuzo de nia nacia renaskiĝo, li distingis, klaraj aŭ malklaraj, tri ciklojn plenumitajn? Kiu parolis pri malproksima infaneco, pri pasinta juneco kaj pri nuna maturaĝo, ĉe ni, kvazaŭ li volus diri ke ni baldaŭ jam falos en dekadencan? Kiu montris ĉe ni nian Homeron, nian Pindaron kaj nian Platonon? Ho ironio de la dioj, kiu distriĝas akcentigi ankoraŭ pli la naivan miopecon homan! Ni ĵus naskiĝis kaj jam estas iu, kiu kredas nin indaj je la morto.

Mi diras al vi, sinjoroj, ke, aŭ ni, la hodiaŭaj katalunoj, estas farontaj nenion, aŭ ĉio kion ni faris estas nur senherbigi kaj fari sulkon. Estas en la komenco de ĉiuj popoloj generacio fidelega al la spirito de la raso, silenta, forta, oferema, kompakta kaj malluma, senhela ĉar ĝi eniĝas sub la teron, kiel bazo de templo.

Ĝi estas generacio iom unutona, sen grandaj individuajoj, kiuj eliĝas pli poste, kiel la turoj kaj sonorilejoj.

Tia generacio en Katalunujo, ĉiuokaze, estas la nia. Kaj ankoraŭ, iomete, la venontaj. Kiam pezos sur tiu-ĉi fundamenta generacio la pezo de la kolonoj kaj la eleganta arko de la volboj, niaj nomoj restos konfuzitaj en la malseka ombro de la kriptoj. Ne havos ja tiu fidelega generacio la mildecon de l' argento, la fieran brilon de l' oro, nek la longan daŭron de l' diamanto. Sed ĝi estos forta kaj humila kiel la ŝtono kiu ne taŭgas kiel ornamajo, sed kiel fundamento. Pli, tute certe, ol la persona valoro, estas ŝatinda en ni la valoro de la tuto kaj la impona kuraĝo de la amaso. Por Katalunujo, ni ne estos "la geniuloj" sed "la generacio".

En venontaj tempoj, nur la varmaj instruituloj, homoj esplotemaj, havos okazon kaj plaĉon malsupreniri en la kriptoj de la templo por nin viziti. La plej paciencaj el ili atingos, eble, koni detale, unuope, niajn nomojn. Ĉio-ĉi aperos sur la revuoj kaj kelkaj interesiĝos pri ĝi. Sed tiam la sankta gloro nia estos aperita al la okuloj de la katalunoj kun la majesta krono de la Rezigno, perditaj en la fundo de la jarcentoj, mallumaj kaj senmovaj kiel aro da patriarkoj, kun la fruntoj sulkitaj de ĉagreno kaj revo, kun la lipoj kuintiritaj de peno kaj doloro, plenaj de timoj kaj esperoj, kaj kun la okuloj brilantaj de amo kaj fideleco.

Kaj tiu gloro, al mi, jam de nun estas dolĉa!...

EPILOGO

Kiam la bona Vojaĝanto finis la paroladon, fariĝis profunda silento. La vagonaro veturadis malrapide kaj vidiĝis jam la ĉirkaŭaĵoj de la granda urbo celo de la vojaĝo. Subite, la maljuna oficiro, metante manon sur la bruston, diris al la bona Vojaĝanto kun plena simpatio:

— Permesu ke mi diru al vi, sinjoro, ke la amo kiun vi sentas por via lando estas sento kiu vin honoras. —

La Vojaĝanto ekridetis. Monsinjoro aldonis:

— Tute certe, mia oficiro, kaj mi diros al vi ke unuj kaj aliaj vekis ĉe mi la deziron koni tiun specon de promesita tero. —

Ĉar la vagonaro ekhaltis sub la volbo de la grandega stacidomo, la tri vojaĝantoj stariĝis. Kaj ĉiuj tri, ĝoje premante la manojn al ĉiu, disiĝis eble por ĉiam plu.

Tie-ĉi finiĝas precize ĉi-tiu granda historio, de rakontado tiel bela kaj dolĉa, ke, se vi, kara leganto, enuis dum ĝia legado, mi diros al vi sentime ke la kulpo pri tio estas nur via.

AMBROSI CARRION

(1888)

Bibliografio: Versaj tragedioj: Epitalami (1 akto); Tribut al mar (1 akto); El fill de Crist (1 akto); Periandre (3 aktoj). Drama idilio: Testa d'Or (1 akto). Dramo: El fogueral (3 aktoj). Poezio: Els tres Himnes d'Eupolis. Tradukoj: Hero ĉi Leandre, el la greka Museu.

TESTA D'OR

Drama idilio unuakta

La Prologo	La du Infanoj
La Sinjorino malsana	La maljuna Pilgrimanto
Testa d'Or	La horo de Knabinoj
La tri Fratinoj de la sinjorino	La horo de Pilgrimantoj

PROLOGO

(Kun kurteno fermita)

Post mallonga antaŭludo, aperas la Prologo vestita per mezepoka vestaĵo. Li estas la trobadoro kiun la sinjorinoj afable akceptis; kiu sciis kanti per vibranta voĉo la heroajn farojn de la krucmilitantoj en la Sankta Tero; kiu diris per misteraj vortoj terurigajn legendojn de sorĉo kaj sakrilegio; kiu kun kruda esprimo igis sonore ridi la nobelojn per liberaj historioj; kiu sciis kanti kun allogaj paroloj la ĝojojn kaj la suferon de amo. Li estas tiu, en kies hararo diveniĝas la paso de virinaj manoj avidaj je liaj karesoj; kiu havas en la brakoj la katan geston lernitan en la noktoj de plezuro kaj en la atakema svingado de l' ponardo. Li kliniĝas gracie antaŭ la aŭdantaro kaj diras:

LA PROLOGO

Spirit' mi estas de l' legendo. Aŭdu.

Sajnas ke mi per mia man' deŝiris
florojn kreskantajn tra la longaj vojoj
kie mi vagas, de la sort' ĉetite.

Mi deŝiras la florojn kaj proponas
 ilin dum halt'. Por vi nun delikatan
 elektos floron mi: unu lilion.
 Lilio deŝirita ĉe l' silento
 de fieraj ruinoj. Lilieto
 mortinta nostalgie je purega
 sunradi', kiu venis iam kisi
 ĝin en ŝtela ludad'. Mi ĝin deŝiris
 en la purec' triobla de l' silento,
 de la solec' kaj de plenluna nokto.
 La lilio jam velkis, sed aromas
 ankoraŭ nun; ĉar estas ĝi kaliko
 tutplena de parfum', kiun por tiuj
 kiuj min aŭskultadas, nun mi levas.
 Ĝia parfum' estas jejur'; la vivo
 pro ĝi prenos fiktivon, kiun scias
 vi jam, ĉar diris mi l' alegorion.
 De violonoj milda kant' min vekis
 el la ripozo en kvieto paca
 de forpasinta temp'. Ke l' kant' revoku
 nun l' agadon songitan dum pezadis
 sur mia brust' la flor', kvazaŭ flugilo
 de papilio... Se l' aromo dolĉa,
 kium mi sentis, ankaŭ vin atingas,
 mi ĝojos. Sonu, notoj elvokantaj
 kiuj elvekis min. Ke estu mola,
 via kanzon' kaj mi al dorm' revenu,
 ĉar tiel de ankoraŭ pliaj floroj
 l' aromo transformita en songadon
 estos legendoj por vi ĉiuj... Fine,
 riverencon al vi... Sonu, muziko!
 Ekfloru nun mirige la legendo!

Li malaperas, revenas muziko, kaj iom poste malfermiĝas la
 kurteno.

JOAN ARÚS

(1891)

Bibliografio: Cançons al vent (1914); Sonets (1915); Noves
 Cançons (1916); El llibre de les donzelles (1917); El Cant dis-
 pers (1918); In Memoriam (1918); La nostra expansió literà-
 ria (1919); La mare i l'infant i altres poemes (1919); Evolució
 de la poesia catalana (1922); Llibre d'amor (1922); Idillis i Ele-
 gies (1922); Nous Poemes (1924); Notes sobre creació poèti-
 ca (1925). Tradukoj: El pas dels gegants, de Pierre Benoit.

LA DEZIRO

Dum sia vivo kaj viglec', la floro
 deziradas la akvon kun pasi';
 dum en ni dolĉe vivas l' iluzi',
 novajn ĝuojn esperas nia koro.

Ia ajo, tre ofte, nin altiras—
 floro, virino, verso aŭ kanzon'—
 sed, pli ol en la ajoj, l' ama don'
 troviĝas en la kor', kiu sopiras.

La kor', en sia vol' nedifnebla,
 amas nur tion ne estantan ebla—
 najtingal' kun dezir' pri brila stel'—

kaj se venas la ajo sopirata,
 ĝi estas tre malvarme ricevata,
 ĉar ĝi jam ne plu estas nia cel'.

LA AMIKINO EN LA PREĜEJO

Bezonas la animo por sin levi
 kaj flugi en la gloron de l' Sinjor',
 pri io alta kaj spirita revu
 kaj forgesi pri ĉiu monda glori'.

Ho, amikino bela kaj distrita...
Vi estas en preĝej', ĉe via seĝ',
kun via kara libro malfermita
kiu vin gvidas tra mistika preĝ'.

Sed viaj lipoj preĝon ne murmuris
kaj ĝin forlasas, ĉar vi pli plezuras
je l' librornamoj el ebur' kaj or'...

Se tio ĝenas vian preĝon, finu.
En vin mem enpeniĝu, kaj destinu:
Por unika preĝlibro—via kor'!

LA ETERNA KANTO

Ho kantanta sen ĉes', ĝoja virin'!
Ĝojigas per la kant' ĉiu momento.
Vi kantas kiam ĝojas via sin',
kaj eĉ se premas ĝin ĉagrena sento.

Vi frue kantas kun infana tril'
kaj kiam Amon via jun' ekvidas;
vi kantas ĉar alvenos via fil'
kaj ĉar li kreskas, saltas kaj alridas.

Kiam al vi paliĝos la vizaĝ',
vi kantos ankaŭ en maljuna aĝ',
—ne tiel klare via voĉ' sonoros—

kaj eĉ post mort' la kant' daŭros sen fin',
ĉar via geidar' reprenos ĝin
kaj por eterne via kanto floros.

LA POEZIO

La fonto estas ja en l' arbaro kvieta
tra kiu vagas ni en serĉo de la voj':
kantadas en soleco ĝia fluo kun ĝoj'
kaj perdiĝas tra l' herbo freŝmola kaj diskreta.

La fonto estas ja en l' arbaro kvieta,
sed estas malfacile al ni trafi pri l' voj',

ĝis kiam, en proksim' de l' akvo flua ĝoj',
ni aŭdas ĝian kanton tra la herbo diskreta.

Kaj tiam de la akvo pleniĝas nia man' ;
ni trinkas kaj en ni la akvo iĝas kant' ...
La fonto estas ja en l' arbara kvieto:

necesas, por ĝin trafi, de l' spirit' la graci',
ĉar ne tra l' aŭdo venas ja ĝia melodi'.
Kiu tiel ĝin trafos, tiu estos poeto.

E. M. FERRANDO

(1891)

Bibliografio: Histories i Fantasies. Tradukoj: Miquel Koh-lhaas, de E. Kleist; Tres anglasos s'esbargexen, de Jerome K. Jerome.

PRI KIEL LA SANKTULOJ VOLIS MANGI FRAGOJN

En iu marborda vilaĝo, ne tre distance de la Franca landlimo, konserviĝas malgranda romarta preĝejo kie ankoraŭ nuntempe okazas la diaj servoj. Se la religia fervoro aŭ la simpla scivolemo igas vin eniri en tiun preĝejon, en la unua momento vi restos envolvita en densa mallumo kaj samtempe sentos sur la vizaĝo kaj sur la manoj freŝan kareson, tiele kiel se vi vin metus en akvokruĉon. Tuj vundos vian vidon gutoj de lumo de kandeloj kaj iom poste iu fenestreto tra kiu eniras malforta heleco. Dronintajn en la duonlumo kaj en la silento vi renkontos kelkajn pensemajn sanktul-statuojn, kiuj travivas la tutan jaron, tagojn kaj noktojn, aŭdante la murmuron de la proksima maro kaj la bruojn kaj kriojn venantajn el la vilaĝo de fiŝkaptistoj, situita apud monteto. Kvankam la tempo elfluas malrapide — vintraĵ pluvoj, ardanta suno somera, ĉarmaj printempoj —, la sanktuloj, tamen, restos senmovaj, konservante ĉiam sian mienon ĉagrenan aŭ solenan; ili turnos rigardon al vi nur kiam vi pasigos antaŭ ili — se tia estas via deziro — alumeton aŭ lanternon; tiam ili rigardas tiel fikse, tiel fikse, ke ne estus strange se vi eksentus ian timon aŭ ian skrupulon elteni ilian rigardon.

Ĉiun Aprilan monaton, komence de la printempo, spiro de vivo ŝajnas penetri en la preĝejon. Oni dirus ke la okuloj kaj lipoj de tiuj bonecaj sanktuloj moviĝas preskaŭ nepercepteble; ke en la aero tremas la vibrado de iu vorto ĵus elparolita; ke, se moviĝos la pordo por lasi eniri iun saltetantan akoliton aŭ iun preĝantan maljunulinon, la sanktuloj timeme penos, el siaj altaroj aŭ pentraĵoj, streĉi la kolon kun deziro rigardi eksteren, ĉar tie en la fundo ili jam divenas ĉarman pejzaĝon de florinta printempo. Sed tio, kio plej ravas la sanktulojn, sendube estas la bonodoro je rozoj, je fenkolo, je fragoj pretaj esti rikoltataj, kiu akre sentigas sin kaj plivastigas vole-nevole la naztruojn.

— Jen estas tie-ĉi la belvetero — ili ekkrias — vidu, vidu, kia bela printempo.

Kaj malpreciza brueto supreniĝas tra la malvasta volbo de la preĝejo.

Alvenis iu jaro, kiam la sanktuloj ne povis elporti sian dezi-
ron, tre kompreneblan, ree manĝi fragojn.

Tio estis dum la Pasko de 1917. La antaŭtagon, kiam la bonaj fiŝkaptistoj jam estis enlitiĝintaj, okazis ke lumo tre hela kaj blindiganta projekciĝis antaŭ la ĉefaltaron mem, verŝigante de supre malsupren kaj briligante oron, arĝenton kaj perlamoton; la interno de la humila preĝejo ŝajnis esti por momento riĉega templo. La sanktuloj, en tiel dolĉa heleco, levis siajn rigardojn al la alto kaj tie vidis Dion Ĉiopovan. Unu el ili, la plej hardita, parolis tiamaniere:

— Sinjoro, ni estas en Maja monato; la monato plej bela de la jaro. En tiu-ĉi epoko, la mondo kreita el la nenieco de vi, ho admirinda Artisto, akiras sian plej grandan belecon. En tiu-ĉi epoko ankaŭ, la tero produktas la fragon, la frukton plej bongustan por la homaj lipoj. Sinjoro, ni dezirus manĝi fragojn; ne baru al ni tiun naivan kapricon.

— Sinjoro, ne baru al ni tiun naivan kapricon — ripetis la aliaj kvazaŭ eho.

Tiam el la alto venis voĉo ripoza kaj harmonia — sendube tiu de la Ĉiopova Dio —, kiu respondis la jenon:

— Morgaŭ, dimanĉon, mi havas ordonite al la Suno ke ĝi levigu je la kvara horo, dek minutoj kaj du sekundoj. Nu, je la ektagiĝo, kiam la tagaj helecoj aperos ĉe la horizonto, vi reakiros vian antaŭan homan kvaliton, kiu restos al vi dum aŭroro, ĝis iom antaŭ la apero de la unua sunradio.

Aproba murmuro aŭdiĝis tra la tuta preĝejo; estis virgulino kiu iĝis tiel kontenta, ke ŝi ne povis deteni sin de aplaŭdado, sed kelkaj sanktuloj, la plej gravmienaĵ, rimarkante ke la Ĉiopova volas diri ion plu, ordonis silenton.

— Ssssit! sssit! — ili diris — iom da respekto!

— Dum tiu tagiĝo — daŭrigis la kara voĉo — ĉiu fiŝkaptisto, ĉiu terlaboristo, havos sur la palpebroj du sablerojn pli ol kuintime kaj tial la dormo estos al ili pli peza ol ordinare. Nu, kiam je la tria kaj duono vi vidos trapasi ŝarĝvagonaron al Port- Bou ne malkvietiĝu, ĉar mi en tiu momento plidensigos la vualon de la roso kaj viaj figuroj iĝos nevideblaj al la fervojistoj gvidantaj la vagonaron. Interkonsentite?

— Jes, jes, jes...

Novaj murmuroj de aprobo kaj kontentiĝo.

Ĵus la voĉo de la Sankta Patro estingiĝis en la alto, la ĉiela lumo malfortiĝis ĝis malapero; denove la mallumo envolvis la preĝejon; denove la sanktuloj perdiĝis en la malhelon, kaj tiam

murmuro de preĝoj supreniĝis tra la aero, kvazaŭ tiu-ĉi subite estus pleniĝinta de multnombraj abeloj.

Jam finita la danka preĝado, komenciĝis la preparoj por la eliro. Tie-ĉi aŭdiĝis brueto kvazaŭ de iu ciranta siajn ŝuojn, tie la metala kaj subita "klak" de iu broĉo, pli malproksime diveniĝis iu lavanta al si la vizaĝon; en anguleto, sonis virina voĉo demandanta: "Ano, ĉu vi havas broson?". Iom poste ĉiu petis la broson kaj ne mankis ia diskuto subtenata per flustra voĉo...

Subite, tra la alta fenestreto, ŝajnis enfali iaj palaj lilioj: tio estis la unua taga heleco. La miraklo komenciĝadis.

Unue eliris tra la sonorilturo tri flugilhavaj infanoj, kiuj, en sia senpacienco, ne povis atendi ĝis la preĝejoj pordoj malfermiĝos. Tiuj tri infanoj sin jetis tra la spacon, dezirante flugi en libereco sub la steloj ankoraŭ brilantaj.

Fine la pordoj de la malvasta templo malfermiĝis en sia tuta larĝo, solene. Kiu malfermis ilin? Neniu scius diri tion; eĉ ne la aŭtoro de tiu-ĉi rakonto.

La unuaj en la eliro estis kvin virgulinaj malpezaj kiel kvin nubetoj de fosforeska nebulo; ĉiuj kvin ridadis, ĝojaj sin vidi denove havantaj sian homan kvaliton.

— Ni iru rigardi nin en la rivereto — diris unu, dezirema kaj gaja.

— Ni iru!

Kaj ili foriris tra iu strato, en direkto al la kamparo.

Poste malsupreniris la ŝtupojn de la preĝejo, kun tre solena sinteno, iu romarta sanktulino portanta infanon ĉe la brako. Tiu virgulino, kiu havis sian riĉegan purpuran veston tre difektita, troviĝante ĉe la placo de la vilaĝo kaj ekvidante en la malproksima la florintan pejzaĝon, malforte lumigatan de tagiĝo, tute malfermis la okulojn kun miro; la trajtoj de ŝia vizaĝo kaj ankaŭ tiuj de la vizaĝo de ŝia filo montris esprimon simplan kaj naivan. — Mirinde! — ekkriis ambaŭ ĉiun momente, ĉiam surprizitaj. Iliaj karnoj estis el juglandarba ligno kaj la voĉo de la sanktulino havis sonon de soprano. Kvankam ili parolis katalunan lingvon iom barbaran, forte miksitajn je latina, ili sin komprenis perfekte.

Iom post iom la ŝtuparo pleniĝis de sanktuloj. Tie troviĝis Sant Francisc, Sant Fructuós, Sant Bernat kaj Sant Cugat, Santa Agnès, Santa Mònica, Santa Margarida, Sant Jeroni, Sant Bonifaci, kaj aliaj. Tiu portanta siajn okulojn sur plado estis Sankta Luĉio; tiu alia portanta krucon. Sankta Heleno; tiu kun la korpo trapikita de sagoj, Sankta Sebastiano; kaj tiel, multaj pliaj, kies nombradon ni neniam finus. Baldaŭ la placo de la vilaĝo estis malgranda por tiom da sanktularo.

Kiam ili parolis, la sanktuloj faris mildan brueton, kvazaŭ la marventeto traitante pinarbaron. Unuj vojiradis en grupo, la aliaj, solecaj; kelkaj flugadis super la musko kvazaŭ malpezaj nebule-

toj... Ĉe la alveno en la kamparon, ho! kia plezuro enigi la manojn en la klaran akvon de la riveretoj, rigardadi denove la stelojn, kiuj briladis en la ĉielo kiel diamantoj, kiel rubenoj, kiel smeraldoj, kiel topazoj; serĉadi bongustajn fragojn, kanti malnovajn kanzonojn, ridi, dancadi en rondo sub la cipresoj aŭ sur la rokoj borderantaj la maron kolorbrilan kaj kvietan!

De la ĉielo faladis la roso aliĝinta en plej delikatan purpuron. La aero estis tute saturita de parfumoj kaj vibranta de mirakla bruo de malproksimaj sonoriloj. La naturo sin montris tute sen tema al la dia efiko de la subita mirindaĵo okazanta.

Fine la preĝejo restis dezerta. Nur Sankta Mikaelo restis apud la pordo kun elingigita glavo, kiu ŝajnis ardanta flamo. La pia militisto ne havis ja deziron manĝi fragojn. — Al mi ili ne plaĉas se ili ne estas trempitaj en sukono de oranĝo — li diradis, kaj li preferis stari en sia loko, gardante pri la ordo de la preĝejnterno, ĉar tiunokte en la sankta domo restis nur drakoj, vespertoj, strangaj monstroj de nekonata nomo, strigoj, otusoj kaj ĉiuspecaj kondamnitoj.

La ĉielo estis kvazaŭ ĝardeno de blujaj lilioj, en kiu floradis la steloj diverskoloraj. Perlamota kareso akcentiĝadis ĉe la horizonto. La luno malheliĝis iom post iom, antaŭsentante la alvenon de la tago. Jam de oriento venis sur la maron kaj la teron iu pala klareco, kiu tie en la fundo pentradis la montojn per diafana violkoloro.

Dume la sanktuloj manĝadis fragojn...

Apud akvofluejo, iu sanktulo klarigadis al alia la kulturadon de la frago.

— La frago bezonas varmon kaj ombron; teron delikatan, sen buloj, sed malsekan, bone sterkitan.

Sub ĉerizarbo renkontiĝis du virgulinaj; unu sidadis apud la trunko de la arbo, la alia trairadis la vojeton.

— Kaj ci... kial ci ne manĝas fragojn?

— Mi ne scias; mi preferas la ĉerizojn.

— Nu, manĝu ilin.

La virgulino levis la kapon kaj, rigardante la frukton, respondis:

— Ili ankoraŭ ne estas maturaj.

Tiuj kvin virgulinaj, kiuj estis kvazaŭ fosforeskaj nebuloj, sidadis sur roko, apud la maro. Ĉiuj kvin rigardadis atente la horizonton kolorigitan de la briloj de la tagiĝo.

Unu el ili diris, melankolie:

— Ni havas tempon, nur dum la daŭro de la aŭroro.

— Rimarku; baldaŭ aperos la unua sunradio.

Soleca sanktulino, ĉe la mezo de la vojo, observadis la suprojn de la montoj en la norda flanko.

— Kion vi rigardas kun tiom da intereso? — demandis al ŝi kelkaj trapasantaj sanktuloj.

— Mi estas observanta ĉu aperas iu nubeto — ŝi respondis kun v ĉo de virino tre sentema. — Kiu scias? Eble ankoraŭ tondros kaj pluvos hodiaŭ.

— Ne ŝajnas al mi facile — diris Sankta Telmo, kiu estis maristo kaj konis la veterŝanĝojn.

Tiam la sanktulino, tre ĉagrenita, turnis la dorson kaj iris al la kampoj de fragoj, ekkriante malgaje:

— Sinjoro, neniu memoras, pri mi.

Kiam ŝi jam estis foriĝinta, sanktulo demandis al alia:

— Ĉu vi ne konas ŝin?

— Ne; kiu ŝi estas?

— Ŝi estas "Santa Bàrbara".¹

Cirkaŭ la tegmentoj de la fiŝkaptista vilaĝo, la tri infanoj flugilhavaj, tiuj kiuj unue eliris el la preĝejo, flugadis malfermante la fenestrojn kaj surprizante la dormantojn. Tie-ĉi ili haltis por aŭskulti mokeme la sonorajn ronkojn de iu viro kaj haltigi la iradon de la vekhorloĝo kiun tiu havis apud si; pli malproksime ili ĵetadis ŝtonojn tra la kamentuboj kaj tuj rapide forkuris; al dormanta knabineto ili metis lacerton en la manon... Iliaj petolajoj ridigis ilin gaje kaj tre brue; tamen neniu aŭdis ilin, nek vekigis.

Subite, ĉiuj sanktuloj faris movon de scivolemo; ili estis aŭdintaj la fajfon de la vagonaro, de tiu sama vagonaro kiun ĉiutage ili aŭdis trapasi, ne tre distance de la preĝejo, tremigante la murojn.

— Jen estas tie-ĉi la vagonaro.

— Jes; jes; tio estas la vagonaro.

— Maloportuna vagonaro!

— La vagonaro! la vagonaro! — kriis multaj voĉoj, kaj la sanktuloj, pelitaj de granda scivolemo, eliris el la kampoj de fragoj kaj turnante la dorson al la maro rigardis al la tero; tiel la purpuro venanta el la horizonto, fandiĝinte en la klarecon de la aŭroro, metis oritan aŭreolon super la kapojn.

— Observu, Oleguer — diris Sankta Ramono, formetante la seruron kiun malpiuloj estis metintaj al li sur la lipojn, por fermi al li la buŝon — observu, Oleguer; en tiu-ĉi momento ni ŝajnas pentraĵo el tiuj pentritaj de Fra Angelico en Firenze.

— Kamarado, vi estas prava — respondis Sankta Oleguer.

La vagonaro al Port-Bou pasis rapida, fumoplena, fiera. Niaj

(1) Aludo al la kredo de la popolo, ke "Sankta Bàrbara" helpas al siaj preĝantoj, kontraŭ tempestoj kaj ŝtormoj.

sanktuloj preskaŭ ne vidis ĝin. Tra la densa nebulo ili nur povis distingi mallaran vermon glitantan tra la kampoj kun ruĝa lumeto ĉe la vosto kaj iu trak-trak, trak-trak, ritma kaj samtempe malbela, kiun la montoj imitis en la malproksimo, kun ironio.

— Ĝi devas esti tio kio moviĝas sur la ponto.

— Mi vidas nenion tie.

— Jes, jes; ĝi estas la ruĝa lanterno, estas la ruĝa lanterno! — ekkriis multaj voĉoj samtempe.

— Tiu vagonaro portas nur komercaĵojn — rimarkigis iu senluziiginta.

Jam la ĉielaj lilioj aliformiĝis en rozojn. La steloj mortigis en maro da lumo, silente. Ankaŭ la luno malaperis, fandita en la perlamoto de okcidento, apud la supro de iu monto.

La sanktuloj komencis entrepreni la vojiron al la preĝejo. Longaj vicoj trapasis tra la kampoj en direkto al la vilaĝo. Unuj interparoladis amike; la aliaj vojiris kantante. Ĉiuj portis fruktojn kaj florojn kaj ne sentis ian ajn malĝojon forlasi sian homan kondiĉon, tiel nedaŭran, ĉar tie en la ĉielo atendadis ilin la paco de la Sinjoro.

Fine la multnombra sekvantaro solene eniris en la templon. Kiam ne restis iu sanktulo ekstere, la pordoj fermiĝis per si mem, sufokante malantaŭ ili tiun mildan bruon de sonoriloj kiu ĝis tiam estis harmonie vibranta en la aero.

Sed okazis ke iom antaŭ la apero de la unua sunradio, ankoraŭ oni vidis flugi tra la malseka aero unu el la tri infanoj plej frue elirintaj el la preĝejo, ĉe la komenciĝo de la miraklo. La kompatinda infano, trovante la pordon jam fermita, ne havis alian rimedon ol sin ĵeti tra fenestro de la sonorilturo, dezirema alveni akurate. Tamen, liaj penoj estis senutilaj, ĉar subite sunradio lumigis lian rozkoloran korpon kaj igis lin fandiĝi en la lumon egale kiel stelo de la firmamento.

Preskaŭ samtempe la fiŝkaptista vilaĝo vekigis.

En unu el la stratoj havantaj la maron kiel fonon, malfermiĝis fenestro kaj najbarino eligis la kapon kun la okuloj ankoraŭ dormemaj. Samtempe malfermiĝis la pordoj de la panvendejo, en la kontraŭa flanko, kaj eliris la panistino tute blanka de faruno kaj dika de kontentiĝo.

— Ĉu vi ne rimarkas, Mario, kian odoron je incenso? — diris la virino en la fenestro.

— Jes, strange. La pordoj de la preĝejo ankoraŭ devas esti fermitaj.

— Tute certe.

Subite, la panistino ĵetis ekkriion:

— Sinjoro! kia domaĝo de fragoj! Rigardu kian disĵeton!

La virino de la fenestro rigardis, kaj, vidante la frukton tra la strato, ruĝiĝis de indigno.

— Sed kiuj estas, kiuj faras tion? — ŝi ekkriis. — Mi volus ĝin scii! Mi prenis bonan vergon kaj komencus svingi ĝin. Ja korektiĝus tiu aro da sentaŭguloj.

— Infanaro... Tion faras la infanaro.

— Infanaro, ĉu? Nu, kiu ajn estus! — Kaj dum ŝi parolis, ŝiaj manoj krispiĝis, farante en la aero strangajn desegnojn.

— Ne ĉagreniĝu, amikino; ne ĉagreniĝu tiamaniere.

— Vi, ĉar vi ne havas kampojn, ne interesiĝas pri tio, sed mi kiu...

En tiu momento la unua sonorado al la diservo aŭdiĝis super la tegmentoj de la vilaĝo. La virino de la fenestro, tre fervora, urĝema sin direkti al la preĝejo, interrompis subite la konversacion, fermis la fenestron, kaj malaperis kvazaŭ mekanika marioneto.

Tiam la grasa panistino, kun unu mano en ĉiu flanko, kun la brakoj kvazaŭ preniloj, eligis sopiron — ve, Sinjoro! —, turniĝis kaj eniris sian domon manĝante kelkajn fragojn kiujn ŝi prenis el la planko. La dormemo, tiu peza dormemo kiu ankoraŭ daŭris al ŝi, ne lasis ŝin rimarki ke la frukto plipurpurigis ankoraŭ iomete ŝiajn lipojn sanajn kaj kolorplenajn.

CLEMENTINA ARDERIU

(1893)

Bibliografio: Cançons i elegies, poemoj (1916); L'alta llibertat, poemoj (1920).

LA ANIMO PAROLAS

Kiam en kot' ripozos vi, ho forto
de tiu karno peza per fioco,
la mond' helbrila, por promes' montrita
de malpeza l' amik' Neesprimebla,
estos tiam por mi patruj' amata,
kaj per brula sur ĝi sanktega fajro
—ho pleja ĝoj!—mi povos min purigi.
Nin tero, loko de doloraj gloroj
kaj ŝajna am', nevole-vole regas.
Malforta mia ŝtof' de homa vesto
ne ŝild' nek kask', sed ofendilo estas.
Malpezaj, jam liberaj kamaradoj,
mian plendon aŭskultu kaj jurvokon:
Al mi vi venu en anaro dia
kaj manojn donu, ke mi alteniĝu
per via pen' al region' serena.
Ke mi scios vin laŭdi per dolĉkanto,
kian ne aŭdis senmortuloj iam.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

ELEGIO

Mi vin scius mortintan, rememoro
via vivus en mi, sed ne amara:
fariĝus milda malfeliĉo mia,
kiam en nokto el turniĝ' de revoj
via figur' aperus heleglore
kaj el ĝia la voĉ' emociplena
florus la kanto "Amegata ĉiam".

Mi vin sciis mortintan, la malmolan
 leĝon de ombro, kiu ja nenion
 respektas, eĉ de Am' ne haltigeblan,
 obeus mi,—venkite aliĝinta
 kor' al prudent'—kaj kun malŝato pleja
 per dolor' mia mi serene dirus:
 nur Destinon je sorto mi kulpigas!
 Amanto kaj amat' por mi li estis:
 li min atendas preter kie iam
 lin alkondukis lia dezirego
 konkeri gloron, la harditan gloron,
 kiun por mi li serĉis... Kaj antaŭen
 ĉiam, sur vojo mia tiutempe
 iradus mi, haltante nur malmulte,
 nur la tempon al vi oferon fari
 de ĉiaj bon' kaj ind' al mi donitaj.
 Tiel, alvenus mia vico baldaŭ
 kaj estus al mi lumo de favoro
 senmova limosign' ĉe rand' de l' vivo.

Mortintan scii vin,
 ol malfidelan, mi pli multe volus!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

VENTURA GASSOL

(1892)

Bibliografio: Amfora, poemoj (1917); La nau, poemoj (1920);
 La cançó del vell Cabrés (dramo); El nacionalisme en el teatre;
 Les tombes flamejants, poemoj (1923).

SIMBOLOJ

IV

LA KANTO DE L' MARISTOJ

Catalunya pàtria nostra,
 vola! com una nau...

Per ĉi-tiu velo blanka,
 malpeza kiel dezir'
 en la maron eniradi
 kaj ĉielen levi sin:
 Kataluna lando nia,
 flugu! kiel vesel';
 estas, por sklaveco via,
 ja tro vasta la ĉiel'.

Per la ligno de l' boato,
 odora kvazaŭ incens',
 kiu scias laŭinstinkte
 la vojojn al liberec':
 Kataluna lando nia,
 flugu! kiel vesel';
 estas, por sklaveco via,
 ja tro vasta la ĉiel'.

Per la du fortaj remiloj,
 batantaj en hela bril'
 la lumgutan maran akvon
 kvazaŭ arĝenta flugil':
 Kataluna lando nia,
 flugu! kiel vesel';
 estas, por sklaveco via,
 ja tro vasta la ĉiel'.

Per la Vento velblovanta,
 kiu estas spir' de Di'
 forpelanta nin liberaj
 kiaj nin kreadis Li:
 Kataluna lando nia,
 flugu! kiel vesel';
 estas, por sklaveco via,
 ja tro vasta la ĉiel'.

CARLES RIBA

(1893)

Bibliografio.—Primer llibre d'estances (1919); L'ingenu amor, prozo; multaj klasikaj tradukoj, inter ili la "Odiseo", de Homero; Vides d'Alexandre i de Cèsar (Plutarc); Antigona-Electra (Sòfocles); Els Deu Mil (Xenofont).

Edgar A. Poe: Els assassinats del carrer Morgue; Grimm: Contes d'Infants i de la Llar; Gogol: L'Inspector.

ESTANÇA XLII

Finigās nun la kanto mia:
 mola, perfekta—ĉiu vort':
 sed vivofebro flugis for,
 ne plu ĉeestas ĝojo dia.

Ekkaŝis sin trans blua monto
 eterna flamo de la sun':
 sed, ĝis mallumo venkos, nun
 ankoraŭ lumas horizonto.

Lumo ne mortos, ho ĝoj' dia:
 sub trema bril' de iu stel',
 atendos mi je la fidel',
 je la reven' de l' kanto mia.

JOSEP MARIA DE SAGARRA

(1894)

Bibliografio: Poemoj: Primer llibre de poemes (1914); El Mal Caçador (1916); Cançons d'Abril i de Novembre (1918); Poemes i cançons (1922); Cançons de taverna i d'oblit; Cançons de totes les hores (1924). Novelo: Paulina Buxareu (1919). Teatro: L'estudiant i la pubilla, drama poemo (1921); El jardinet de l'amor, komedio (1922); El matrimoni secret, komedio (1923); Fidelitat (dramo); El foc de les ginesteres, versa dramo (1923). Tradukoj: L'escola dels marits, de Molière; El Barret de cascavells, de Pirandello; k. a.

EL FOC DE LES GINESTERES

(Historiaj scenoj de 1640)

Kvina Epizodo (fragmento)

Fra Anselm

Kion vi volas?

Johano, la falçisto

Rompi la skabion
kiun sur man' pro tim' ni havas nun,
kaj ni volas da honto kelkajn gutojn
sur la vangoj de ĉiu Katalun'.
Ĉar, post teruro de l' milito, vundas
nin la ungo de l' Reĝ' de Hispanuj',
verŝadas sian sangon nia lando,
kaj fini tion ja ni volas tuj.
Sen ia leĝa prav' oni nin punas,
nian domon mastradas la soldat':
do stariĝi ni devas kontraŭ tio
kaj resti ĉiuj ni kun nia rajt'.

Fra Anselm

Ho junul', vi parolas tro libere!
Kuraĝa gent' finiĝis tie-ĉi:
vi nur lekas de l' kuko la sukeron,
nenion faros kun tioma kri'!

Troviĝas tie-ĉi nur dorsoj molaj
kaj bestoj restadantaj en kaŝej',
de post kiam la kap' de Serrallonga
sur la teron ruliĝis kun solen'.
Tiu ja estis el plej forta ligno
kaj kuraĝe li batis per tranĉil';
tiu ne restis, fulm' tiel kviete,
kaj energie li defendis sin.
Nun ne plu estas viroj tiuspecaj.
Serrallonga! Se vivus lia brak',
tiujn soldatojn, kiuj vin timigas,
li vendus nun po funtoj tra la strat'.
Kia lup' estis li en sia kavolo!
En malsato kaj sat' mi trovis lin;
tiu-ĉi mano lian veston tuŝis,
mi parolis kun li, kiel kun vi.
Lia famo atingis ja ĝis Romo
kaj vane celis lin la persekut'!
Sur lin certe ne povus la Vicreĝo,
nek kuraĝus pri li la Grafo-Duk',
Ĉar en fingroj li havis bestungegojn,
kaj de vulp' estis lia salt-atak';
li starus kontraŭ Reĝ' de Hispanujo
kaj eĉ kontraŭe de la Roma Pap'!

Johano, la falçisto

Serrallonga, de vi tiel laŭdata,
dum sia viv' nur estis raba best'.
Viando, varma lit', flamanta fajro,
estis ja lia tuta liberec'.
Rabobirdo laŭ agoj kaj laŭ diroj;
se vi volas, l' unua en la mond';
sed la batoj de liaj mueldentoj
ĉiuj estis mordado nur pri mon'!
Kaj tiuj ja ne estos niaj vojoj,
tra tia voj' ni ne lacigos nin,
niaj ungoj ne estas ja malpuraj:
alia estas nia maltrankvil'!
Nia mien' ne estas fanfarona,
nek ni portas kokplumojn sur ĉapel',
ni ne havas tioman senhontecon,
estas ja pli humila nia cel',
sed la vol', kiu igas nin vojiri,
nin pelus al plej fora region',
kun pli granda forteco ĉe la ostoj
ol ĉiuj Serrallong'oj de la mond'!
Pro la mono neniam ni batalas,

nek estas por malbono nia far',
 nin ne incitas provizita poŝo,
 nek la lit' de l' edzino de l' najbar'.
 La landon, kiun paŝas niaj plandoj,
 ni vidas en dolora sven' de mort',
 kaj l' arda ploro de Katalunujo
 suferige nin tuŝas ĉe la kor'.
 Jen estas la rabitaj farmodomoj
 kun la cindroj ĉe l' kort' kaj ĉe l' grenej',
 la malĝojaj knabinoj perfortitaj
 forkurantaj de ĉia sovaĝbest',
 la sonorilo helpon preĝadanta,
 la Hosti' profanita sen kompat',
 la ardo kiu siblas en la vango
 vundita de la pugno de l' soldat',
 la Vicreĝo senĉese vipadanta
 kun mien' de kruela torturist',
 la terura karcero Barcelona
 kun la plej bona kunular' en ĝi.
 Kaj kun fask' tiel peza sur la ŝultroj,
 kun tiom da ĉagrenoj en la kor',
 ne necesas ja esti Serrallonga
 por tiom da malbonoj meti for!

La mastrino

Bone dirite! jen estas kuraĝo,
 ĉar viajn pensojn pensas ĉiu hom',
 sed la lacan kvieton ĉiutagan
 forigi scias vi per via voĉ'.
 Kaj kun via parol' tiel pasia,
 kun tia forta kor' kaj akra dent',
 ĉu vi ne havas iun amatinon
 kaŝitan en la fundo de la sent'?

Johano, la falĉisto

Se sur la haŭto glitis la ponardo
 kaj flagras la standardo tra la voj',
 la sento, ho mastrin! devas sin kaŝi
 kaj silenti l' aferoj de la kor'.
 Sed, ĉar vi al mi faris la demandon,
 mi diros: estas vera la supoz',
 ĉar kiam febro de la sang' aperas
 ni ne solaj sopiras en la mond'.
 Kaj en bon' kaj malbon' min akompanas
 de amata knabino la parfum',
 kiun mi alparolis nur du fojojn,
 sed kiun amos mi por ĉiam plu.

Kaj por vi tre facile estos kredi
 ke pro ŝi estas vigla mia paŝ',
 ke pro deziro vidi ŝin denove
 pli kaj pli fortiĝadas mia brak'.
 Kaj nun foriru ni! Salut', mastrino!

Fra Anselm

Bonan ŝancon, kuraĝa junular'!
 se vortoj vekas nur entuziasmon,
 pli efika ja estas via far'.

Johano, la falĉisto

Tiel volas la kor'! Nu, ni ekmarŝu!

La falĉistoj

Bonan nokton al ĉiuj, kaj bonfart'!

La vendistoj

Dio gardu la brilan kunularon!

Johano, la falĉisto

Kaj al vi estu bona vespermanĝ'!

TOMÀS GARCÉS

(1901)

Bibliografio: Poemoj: Vint cançons (1922); A l'ombra del lledoner (1924); kritikaj studoj en la antologia kolekto "Els poetes dara", la ĵurnalo "La Publicitat" kaj la "Revista de Catalunya".

BALADO DE L' MARISTO

Sidanta ĉe la marbord'
min atendas virineto.
Mi iam forlasis ŝin
ĉar min altiris la veloj,
la blanka ŝipo, la mar'
kvazaŭ knabino brulhela.
Mi iam forlasis ŝin
ĉe la mezo de l' sablejo.
Allogis min tiu sorĉ'
malbonfara de l' sirenoj.
Por forsavi min de ĝi
min atendas virineto.

Estis plena tiu nokt'
de ĝoj'. Faladis la steloj
sur la akvon de la mar',
tute nigra kaj soleca;
virineto kisis min
per kis' longa, dum sur tero
heligis raŭpoj de lum'
kaj parfumigis la herboj.
Sed ventet' portis al mi
la murmuradon de l' veloj.
Ĉe la bordo de la mar'
min atendas virineto.

Mi trakuris tra la mond'
kaj memor' pri l' kiso restas.
Kion taŭgas nokta vent'
kaj la pluvo de l' mateno,
kaj la kantoj de la mar'
kaj la spiro de la veloj?
Aŭdigas la dolĉa kant'
karesanta de l' sirenoj,
sed ja neniu siren'
kiel ŝi belega estas,
kaj al mi diras nur ŝi:
Vin atendas virineto.

Kamaradoj: lasu min
la ŝipon direkti hejmen,
kie bona rosmaren'
kaj akvo de la rivero,
la ĉiel' kaj la ventet'
vian vivon igos bela.
Mi trakuris tra la mond'
kaj la koro laca estas.
Mi trakuris tra la mond'
kaj mia koro bategas.
La ŝipon direktu mi:
min atendas virineto.

ADIAŬO

(Miquel Costa i Llobera)

Sur blua, roza, de maten' ĉielo,
mi vidis templon de marmor' purega
ĉe verdo de marbordo blankadantan
super la klaraj ondoj.

La kolonaroj de ĝentilaj strioj,
profiligante parelele, faris
tutaĵon harmonian, kiel kordoj
de la sanktega liro.

Fronton' skulptita, super la portiko,
elradiis plejnoblan serenecon,
kiel la hela serenega frunto
de Pallas Atenea.

Ekstervide, sanktejo tio estis
de l' Art' suprega. Kiel helebrila
l' interno estus! Kiaj orakoloj
kaj kantoj tie sonus!

Mi ja volis aliri, sed perdiĝis
sur voj' malcerta; min kuraĝ' forlasis,
kaj admonis terur': "Vi kial penas,
revanto senutila?"

Poste... mi ne plu vidis tiun templon
kaj supreniri ĝin mi plu ne revis.
Sed foje mi ankoraŭ, ĝin sur vojo
for malantaŭen vidas.

Mi vidas, kaj haltante ĝin rigardi
de mi neatingebla, mi ĝin montras
al forta junular' iranta kante
supren sur voj' de l' vivo.

Ho vi, la templon enirontaj iam,
mi ne petas por mi eĉ rememoron;
sed tie, kion volis mi gravuru:
la nomon de l' patrujo!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.